



**INTERNACIA KONGRESA
UNIVERSITATO**

60a sesio

Jokohamo, Japanio
4 – 11 aŭgusto 2007

Redaktis: Amri Wandel

Universala Esperanto-Asocio

Enhavo

Enkonduko	3
IKU kaj Esperanto en la scienco kaj tekniko	4
IKU and Esperanto in Science and Technology	7
IKU et Espéranto dans les sciences et techniques	10
La IKU-rektoro	13
AIS 1 WANDEL, Amri: Orienta astronomio: gasto-steloj en la Galaksia fervojo	14
AIS 2 VERGARA, José Antonio: Malegalecoj je sano kaj ties sociaj determinantoj	29
AIS 3 SIBAYAMA Zyuniti: Geografia Informo-Sistemo (GIS) en nia vivo	35
IKU 4 MACKO, Eugen: Orient-okcidenta dialogo laŭ Heidegger	51
IKU 5 GOTOO Hitosi: La Vortaro por Lernantoj	71
IKU 6 LEE, Chong-Yeong: Kapitalismo kaj Konfucea kulturo	78
IKU 7 YAMASAKI Seiko: Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto	89
IKU 8 ZHU En: Esperanto kaj Bakin	95
IKU 9 GORO Christoph: Ĉu malplimultaj lingvoj estas ekonomiaj malvenkintoj?	111

Programo:

IKU-AIS1 (inaŭguro)	5/08	15h00/16h30	Wandel
IKU-AIS2	5/08	17h00/18h00	Vergara
IKU-AIS3	6/08	15h30/16h30	Sibayama
IKU4	6/08	17h00/18h00	Macko
IKU5	7/08	09h00/10h00	Gotoo
IKU6	7/08	14h00/15h00	Lee
IKU7	9/08	09h00/10h00	Yamasaki
IKU8	9/08	14h00/15h00	Zhu
IKU9	10/08	09h00/10h00	Kimura

Ĉiuj IKU prelegoj okazos en salono Lapenna

AIS daŭrigaj prelegoj:

AIS 1/2	7/08	12h00/13h15	Wandel
AIS 2/2	7/08	13h30/14h45	Vergara
AIS 3/2	7/08	16h30/17h45	Sibayama
AIS 1/3	10/08	16h30/18h00	Wandel
AIS 2/3	10/08	12h15/13h45	Vergara
AIS 3/3	10/08	13h15/14h45	Sibayama

Enkonduko

La Internacia Kongresa Universitato (IKU) ĉi-jare festas sian sesdekan datrevenon. La IKU aldonas al la UK altnivelan klerigan kadron de prelegoj en variaj temoj. La ĉi-jara elekto de prelegoj estas granda kaj varia. Estas prelegoj pri astronomio, medicino, geografio kaj filozofio. Aliaj rilatas al la kongrestemo, "Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto ". Ankaŭ ĉi-jare okazos tri AIS-kursoj, kiuj konsistas el po tri prelegoj: unua enkonduka IKU-prelego kaj du daŭrigaj prelegoj, en kiuj la preleganto povos pli profunde kaj vaste prezenti la temon. Ĉi jare estas senprecedenca plimulto da prelegantoj el orienta Azio: kvar japanaj, unu korea kaj unu ĉina.

Komence de tiu ĉi IKU-libro vi trovos artikolon pri IKU kaj Esperanto en la scienco kaj tekniko. La artikolo kaj la resumoj de la prelegoj havas tradukojn en la franca, la anglan kaj (nur la resumoj) en la japana, por ekstera informado pri la scienca kaj eduka laboro en Esperanto. La IKU-libro povas esti utiligata por demonstri la sciencan, fakan kaj edukadan aplikadon de Esperanto al eksteraj instancoj, kiel Unesko kaj scienc-rilataj kaj universitat-rilataj organizaĵoj.

Fine, mi dankas ĉiujn kontribuantojn. La ĉefan meriton havas la prelegantoj kiuj preparis la tekstojn por siaj prelegoj, ĝustatempe por aperi en la libro. Gravan funkcion plenumis la IKU komisiono kaj ĝia sekretario Christer Kiselman, kiu havis la malfacilan taskon taksu kaj elekti la prelegojn. Provlegis Claude Nourmont, Andrej Grigoriejvski kaj Rob Moerbeek, kontrolis IKU1 Wen Jingen. La resumojn tradukis en la francan Yannick kaj Janine Dumoulin (reviziis: Claude Nourmont, kiu ankaŭ kunordigis la tradukojn), en la anglan: Edmundo Grimley-Evans kaj Rolf Fantom (reviziis Brian Moon) kaj en la japanan – la prelegantoj mem, kaze de la kvar japanaj prelegantoj, kaj por la ceteraj tradukis kaj reviziis Hitosi Gotoo kaj Usui Hiroyuki.

Amri Wandel
Redaktoro

IKU kaj Esperanto en la scienco kaj tekniko

Prof. Amri Wandel
UEA-estrarano pri scienca kaj faka agado

Resumo

En la lastaj jaroj pli kaj pli videblas ke Esperanto progresas sur la kampo de scienco kaj tekniko. La Internacia Kongresa Universitato (IKU) furoras, kaj ĝiaj tekstoj estas libroforme kaj rete haveblaj. Akademio Internacia de la Sciencoj okazigas studsesiojn en novaj universitatoj, kaj komunajn sesiojn kun la IKU dum la Universalaj Kongresoj. Sciencaj kaj teknikaj artikoloj en Esperanto abundas en la interreto: la esperanta vikipedio kreskas rapide kaj havas jam pli ol kvardek mil artikolojn, kaj la Scienc-Teknika Esperanto Biblioteko de Eventoj kunmetas rapide kreskantan datumbazon de malnovaj kaj novaj artikoloj kaj fakaj terminaroj. Ni klopodu bridi tiun momenton por vastigi la rolon de Esperanto en la scienc-teknika mondo.

La scienca kaj teknika lingvo

Ni ofte prezentas la argumenton ke Esperanto povas trakti kaj esprimi ĉiujn aspektojn de la homa kulturo same bone kiel aliaj lingvoj. Unu el la kampoj en kiu tiu defio estas plej granda estas la scienco kaj tekniko, ĉar tiu kampo estas fronto de rapide kreskanta profesia terminaro kaj samtempe postulas vastan kaj rapidan informadon pri novaj rezultoj. En la fruaj tagoj de Esperanto tiun taskon surpronis Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) kiu en 2006 festas sian centjaran jubileon. En ĝia bulteno Internacia Scienca Revuo (nun Scienca Revuo) aperis sciencaj artikoloj – originale en Esperanto.

Ni ne pretendu ke Esperanto estas la internacia lingvo de la scienco, sed provu demonstri ke ĉiuj atingoj de scienca esploro kaj edukado povas esti reflektitaj per Esperanto. Tio fariĝis pli malfacila dum la epoko de interreto. Ĝi tamen estas ankaŭ granda ŝanco por Esperanto, ĉar per la interreto ni povas facile kaj profesie demonstri al la mondo ke Esperanto serioze frontas tiun defion.

La nuntempa scienca mondo pli kaj pli uzas la anglan kiel laborlingvon por internaciaj kaj foje por naciaj aranĝoj. Tio povas malhelpi al la progreso de la scienco, kiu bezonas la liberan interŝanĝon de scioj kaj spertoj sur la persona nivelo. Sciencistoj el ne-angle-parolantaj landoj ofte spertas la lingvajn barojn kiam ili provas raporti pri sia esploro en internaciaj forumoj. Kontraŭe, universitata instruado kutime okazas en la nacia lingvo, kaj ekzistas do lingva breĉo inter la instrua kaj labora-konferenca nivelo. Esperanto povas solvi tiujn problemojn kiel internacia komunika lingvo.

Universitata agado per Esperanto: AIS kaj IKU

Universitat-nivelaj kursoj de Esperanto okazas en pli ol cent universitatoj kaj institucioj de alta edukado en la mondo. Sed kiam ni parolas pri universitat-nivela instruado DE scienco PER Esperanto elstariĝas du institucioj kiuj emfazas la rolon de Esperanto en la scienco kaj en universitata instruado: Akademio Internacia de la Sciencoj kaj Internacia Kongresa

Universitato.

La Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS, <http://www.ais-sanmarino.org/>) estas komuna kadro de faka elstaraj sciencistoj el la tuta mondo (proksimume 500 el dudeko da landoj) kiuj celas esplori kaj instrui sciencojn, teknikon kaj arton per Esperanto kaj per plibonigo de la internacia komunikado kaj de interfaka kunlaboro. En la lastaj jaroj AIS okazigis studsesiojn en Sibiu (Rumanio), Karlovo (Bulgario), Komarno (Slovakio).

La Internacia Kongresa Universitato (IKU) estas serio de fakaj prelegoj, kiuj estas ĉiujare prezentataj dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto. Ĝi ofertas al centoj da aŭskultantoj ĉirkaŭ dek prelegojn de spertuloj, profesoroj aŭ docentoj en siaj fakoj, pri temoj tre diversaj kiel lingvistiko, literaturo, etnologio, komputiko, astronomio kaj ekonomio. La IKU okazas ĉiujare ekde 1951 (komence sub la nomo Internacia Somera Universitato, kaj ekde la UK en Brazilo en 1981 kun la nuna nomo).

En la naŭdekaj jaroj, kadre de la scienca kaj faka agado de UEA, mi iniciatis komunajn AIS-kaj IKU-sesiojn. En 1995 okazis en Tampere la unua komuna sesio. De tiam preskaŭ ĉiujare estis aranĝita komuna sesio sub la nomo AIS-IKU. Ĝi konsistas el tri kursoj, plilongigo de IKU-prelegoj al AIS-kurso de 3-4 lecionoj. Tiaj kursoj permesas pli profundan traktadon de temo kaj donas al partoprenantoj la okazon fari ekzamenon kaj ricevi ateston de AIS. En 2005 estis subskribita nova kontrakto inter UEA kaj AIS pri la okazigo de AIS-IKU kongresaj sesioj.

La IKU-libro

Por havi presitan dokumenton de la prelegoj mi proponis eldoni la prelegojn kiel broŝuron antaŭ la kongreso. En la UK en Adelajdo (1997) unuafoje aperis broŝuro de la IKU-tekstoj. De tiam UEA regule eldonas la IKU-prelegojn broŝurforme dum la UK, kaj la tiel nomata IKU-libro fariĝis furora vendaĵo en la kongresa libroservo. Nacilingvaj resumoj de la prelegoj ebligas utiligi la IKU-libron por eksteraj rilatoj dum kaj post la kongreso. Lastjare la IKU-dokumentado plue progresis, kiam la IKU-libro de 2005 aperis ankaŭ en la interreto. Poste aldoniĝis du antaŭaj IKU-libroj (de 1998 kaj 2002), nun videblaj ĉe <http://www.uea.org/dokumentoj/index.html>. Plia signo pri la kreskanta prestiĝo kaj populareco de la IKU estas la multiĝo de preleg-proponoj: por la IKU en Litovio estis dek ok proponoj, kaj por la Florenca IKU alvenis kvardek.

Unesko kaj IAU

Ni povas uzi tiun universitat-nivelan aktivecon por disvastigi la rekonon de Esperanto en scienc-rilataj internaciaj forumoj kiel Unesko kaj ne registaraj organizaĵoj kiel Internacia Asocio de Universitatoj (IAU). En 2000 AIS estis akceptita kiel membro en la prestiĝa Internacia Asocio de Universitataj Profesoroj kaj Lekciistoj (IAUPL). Nuntempe okazas kontaktoj inter UEA kaj IAU por rekoni AIS kaj IKU kiel universitataj aranĝoj.

Terminologio

Alia grava tereno estas la prilaboro de fakterminoj. Pro la rapida progreso de scienco kaj tekniko en la lastaj jaroj tio estas eĉ pli granda defio por Esperanto. Kadre de la Akademio de Esperanto aktivas la sekcio pri faka lingvo. Dum la UK ofte okazas la Terminologia Forumo. La Terminologia Esperanto-Centro (TEC), fondita en 1981, havas nun propran retpaĝon

(<http://esperanto.net/tec/>). Dekoj da fakaj terminaroj en Esperanto aperis dum la jaroj kaj multaj estas rete haveblaj (ekzemple en la retejo de STEB menciita sube). Ni devas tamen konservi kaj aktualigi nian terminaran laboron kaj adapti ĝin al modernaj normoj. Ekzemple, eblas tiucele kontakti kaj kunlabori kun INFOTERM, la internacia informcentro por terminologio.

Scienc-teknikaj tekstoj

Unu el la plej gravaj manifestiĝoj de la potencialo de Esperanto estas la verkado kaj tradukado de sciencaj kaj teknikaj artikoloj en Esperanto. La interreto estas potenca rimedo por tion fari. Unu kanalo kiun oni lastatempe multe uzas por tiu celo estas Vikipedio – multlingva libera reta enciklopedio. La Esperanta Vikipedio (<http://eo.wikipedia.org/wiki/>) kiu ekzistas de 2001, enhavas jam pli ol 40,000 artikolojn, kaj plurajn sciencajn kaj teknikajn artikolojn. Tre valora iniciato sur la tereno de retaj artikoloj estas la Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko ĉe la retejo de Eventoj (STEB, <http://www.eventoj.hu/steb/>). STEB klopodas kolekti kaj re-disponigi sciencajn kaj teknikajn artikolojn en tre diversaj fakoj de natursciencoj, juro, medicino, ekonomio kaj aliaj. STEB provizas kreskantan datumbazon de malnovaj kaj novaj artikoloj kaj fakaj terminaroj, kaj povas servi kiel kerno de scienca kaj teknika eldonado en Esperanto.

Estonte

Kun rigardo al la estonteco, la Esperanto-kulturo evoluas ankaŭ en la direkton de scienco kaj tekniko, kvankam eble malpli intense ol sur la beletra kampo. Por garantii ke Esperanto ne stagnu en la scienca kaj faka medioj, ni devas daŭrigi kaj plu intensigi la verkadon de faka literaturo en Esperanto, ĉu originala ĉu tradukita kaj ĝisdatigi la fakan lingvon. Tre grava tasko estas publikigi tiujn entreprenojn sur la interreto, kaj por propra utiligo en la Esperanto-komunumo kaj por ekstera informado. Interne de la movado ni daŭrigu la popularigon de profesiaj kaj scienc-popularaj prelegoj en niaj kongresoj kaj kunvenoj. Ekster la movado ni provu informi kaj kunlabori kun ne-Esperantaj naciaj kaj internaciaj organizaĵoj pri faka kaj scienca agado kaj alta edukado.

IKU and Esperanto in Science and Technology

Prof. Amri Wandel,
UEA board member responsible for scientific and specialist activities

Abstract

In recent years it has become more and more apparent that Esperanto is making progress in the field of science and technology. The International Congress University (IKU) is very popular and its texts are available in book form and online. The International Academy of Sciences (AIS) is holding study sessions at new universities, and joint sessions with the IKU during the World Congresses. Scientific and technical articles in Esperanto are available in abundance on the Internet; the Esperanto Wikipedia is growing rapidly and already has more than forty thousand articles, and the Scientific and Technical Esperanto Library (STEB) of *Eventoj* is assembling a rapidly growing database of old and new articles and specialist terminological dictionaries. Let us harness this momentum to extend the role of Esperanto in the world of science and technology.

Scientific and technical language

We often argue that Esperanto can deal with and express all aspects of human culture just as well as other languages. One of the areas in which the challenge is greatest is science and technology because this area is at the forefront of a rapidly growing specialist vocabulary and at the same time requires wide and rapid dissemination of new results. In the early days of Esperanto that task was undertaken by the International Esperantist Scientific Association (ISAE), which will soon be celebrating its hundredth anniversary. In its newsletter "Internacia Scienca Revuo" (now "Scienca Revuo") it published scientific articles originally written in Esperanto.

Let us not pretend that Esperanto is the international language of science, but try to demonstrate that all the achievements of scientific research and education can be reflected in Esperanto. This has become more difficult in the Internet era. It is however also a great opportunity for Esperanto because by using the Internet we can easily and professionally demonstrate to the world that Esperanto is seriously meeting that challenge.

Today's scientific world is making more and more use of English as a working language for international and sometimes national meetings. This can hinder the progress of science, which requires a free exchange of knowledge and experience on a personal level. Scientists from non-English-speaking countries often experience a language barrier when they try to report on their research in international forums. In contrast, university teaching usually takes place in the national language, so there is a language gap between the teaching level and the working or conference level. Esperanto can solve those problems as a language of international communication.

University activity using Esperanto: AIS and IKU

University-level Esperanto courses take place in more than a hundred universities and higher-education institutions throughout the world. However, when we speak of university-level teaching of science by means of Esperanto there are two institutions that stand out, emphasising the role of Esperanto in science and in university teaching: the International Academy of Sciences (AIS) and the International Congress University (IKU).

The International Academy of Sciences of San Marino (AIS, <http://www.ais-sanmarino.org/>) is a joint framework for outstanding scientists from all over the world (about 500 from some twenty countries) who aim to research and teach science, technology and art by means of Esperanto and by improving international communication and interdisciplinary cooperation. Recently AIS held study sessions in Sibiu (Romania), Karlovo (Bulgaria) and Komárno (Slovakia).

The International Congress University (IKU) is a series of specialist lectures which are given every year during the World Esperanto Congresses. It offers to an audience of hundreds about ten lectures by experts, professors or lecturers in their various fields on topics as diverse as linguistics, literature, ethnology, computer science, astronomy and economics. The IKU has been held every year since 1951 (initially under the title International Summer University, and starting with the World Congress in Brazil in 1981 with the current title).

In the 1990s, as part of the scientific and specialist activities of UEA, I initiated joint AIS and IKU sessions. The first such joint session took place in Tampere in 1995. Since then there has been a joint session under the name AIS-IKU almost every year. It consists of three courses, which are extensions of IKU lectures into AIS courses of 3-4 lessons. Such courses allow a topic to be explored in greater depth and give participants the opportunity of taking an exam and obtaining a certificate from AIS. In 2005 a new contract was signed between UEA and AIS concerning the organisation of AIS-IKU sessions during congresses.

The IKU book

In order to have a printed document I proposed publishing the lectures as a booklet before the congress. A booklet of the IKU texts appeared for the first time the World Congress (UK) in Adelaide (1997). Since then UEA has regularly published the IKU lectures in the form of a booklet during the UK, and the “IKU book” has become a bestseller at the Congress bookshop. Abstracts of the lectures in national languages allow the IKU book to be used for external relations during and after the Congress. Last year IKU documentation took a further step forward, when the 2005 IKU book was also published on the Internet. Later two earlier IKU books were added (from 1998 and 2002), which can now be seen at <http://www.uea.org/dokumentoj/index.html>. A further sign of the growing prestige and popularity of the IKU is the increase in lecture proposals: for the IKU in Lithuania there were eighteen proposals, and for the Florence IKU there were forty.

UNESCO and IAU

We can use this university-level activity to spread recognition of Esperanto in science-related international forums such as UNESCO and non-governmental organisations such as the International Association of Universities (IAU). In 2000, AIS was accepted as a member of the prestigious International Association of University Professors and Lecturers (IAUPL). Currently there is correspondence going on between UEA and IAU to recognise AIS and IKU as university meetings.

Terminology

Another important area is the cultivation of specialist terminology. Due to the rapid progress of science and technology in recent years this is an even greater challenge for Esperanto. Within the Esperanto Academy there is a section working on specialist language. During the World Congress there is often a Terminology Forum. The Terminological Esperanto Centre (TEC), founded in 1981, now has its own web pages (<http://esperanto.net/tec/>). Dozens of specialist terminological dictionaries have appeared over the years and many of them are available online (for example in the web pages of STEB mentioned above). We must however maintain and update our terminology work and adapt it to modern standards. For example, one can cite to this end contacts and cooperation with INFOTERM, the international information centre for terminology.

Scientific and technical texts

One of the most important manifestations of Esperanto's potential is the writing and translation of scientific and technical articles in Esperanto. The Internet is a powerful tool for doing that. One channel that has been much used recently for that purpose is Wikipedia - a free online multilingual encyclopedia. The Esperanto Wikipedia (<http://eo.wikipedia.org/wiki>), which has existed since 2001, already contains more than 40,000 articles, with a number of scientific and technical articles. A very valuable initiative in the field of online articles is the Scientific and Technical Esperanto Library on the web site belonging to *Eventoj* (STEB, <http://www.eventoj.hu/steb/>). STEB endeavours to collect and make available again scientific and technical article in very diverse fields of natural sciences, law, medicine, economics and others. STEB provides a growing database of old and new articles and technical vocabularies and can serve as a kernel for scientific and technical publishing in Esperanto.

The future

Looking to the future, Esperanto culture is also evolving in the field of science and technology, although perhaps less vigorously than in the literary field. To ensure that Esperanto does not stagnate in scientific and specialist circles we must continue to intensify the production of specialist literature in Esperanto, whether original or translated, and keep specialist language up to date. A very important task is to publicise these activities on the Internet, both for the benefit of the Esperanto community itself and for information to others. Within the Esperanto community we must continue to promote professional and popular-scientific lectures in our congresses and meetings. Beyond the Esperanto community we must try to inform and cooperate with non-Esperantist national and international organisations concerned with specialist and scientific activities and higher education.

IKU et Espéranto dans les sciences et techniques

Pr. Amri Wandel, Membre du Bureau d'UEA, chargé de l'action scientifique et technique

Résumé

Ces dernières années, il est de plus en plus évident que l'espéranto progresse dans le domaine des sciences et techniques. L'Université Internationale du Congrès (IKU) remporte un succès phénoménal et ses actes sont disponibles en livre et sur Internet. L'Académie Internationale des Sciences (AIS) organise des sessions d'étude dans de nouvelles universités et des sessions communes avec l'IKU pendant les Congrès Mondiaux (UK). Les articles scientifiques et techniques en espéranto abondent sur Internet: la Wikipedia en espéranto prend rapidement de l'ampleur et comporte déjà plus de quarante mille articles, et la Bibliothèque Scientifique et Technique en Espéranto (STEB) d' *Eventoj* compile une base de données, qui se développe rapidement, d'articles anciens et nouveaux et de nomenclatures spécialisées. Profitons de cet élan pour développer le rôle de l'espéranto dans le monde scientifique et technique.

La langue scientifique et technique

Nous mettons souvent en avant l'argument selon lequel l'espéranto peut traiter et exprimer tous les aspects de la culture humaine aussi bien que les autres langues. Un domaine dans lequel ce défi est de la plus haute importance est celui des sciences et techniques, car il s'agit d'un domaine où le lexique professionnel s'accroît rapidement, et qui, en même temps, exige une diffusion large et rapide des plus récents résultats. Dans les premiers temps de l'espéranto, c'est l'Association Scientifique Internationale Espérantiste (ISAE), qui va bientôt fêter son centenaire, qui a assumé cette tâche. Dans son bulletin *Internacia Sciencia Revuo* (Revue Scientifique Internationale), aujourd'hui *Sciencia Revuo*, ont paru des articles scientifiques originaux écrits en espéranto.

Ne prétendons pas que l'espéranto est la langue internationale de la science, mais tâchons de démontrer que toutes les conquêtes de la recherche et de l'enseignement scientifiques peuvent être transmises par l'espéranto. Ceci est devenu plus difficile à l'époque d'Internet. Ce dernier est cependant aussi une grande chance pour l'espéranto, car par Internet nous pouvons démontrer facilement et professionnellement au monde que l'espéranto affronte ce défi avec sérieux.

Le monde scientifique actuel utilise de plus en plus l'anglais comme langue de travail lors de manifestations internationales et parfois nationales. Cela peut nuire au progrès de la science qui a besoin d'un libre échange de savoirs et d'expériences sur le plan personnel. Les scientifiques des pays non anglophones ressentent souvent l'effet des barrières linguistiques quand ils tentent de rendre compte de leurs recherches dans les forums internationaux. Au contraire, l'enseignement universitaire se fait habituellement dans la langue nationale, et il existe donc un décalage linguistique entre l'enseignement d'un côté, et le travail et les conférences de l'autre. L'espéranto peut résoudre ces problèmes en tant que langue internationale de communication.

Les activités universitaires en espéranto: AIS et IKU

Des cours d'espéranto de niveau universitaire sont donnés dans plus de cent universités et autres établissements d'enseignement supérieur dans le monde. Mais quand nous parlons

d'enseignement de niveau universitaire DES sciences EN espéranto, émergent deux institutions qui soulignent le rôle de l'espéranto dans les sciences et dans l'enseignement universitaire: l'Académie Internationale des Sciences et l'Université Internationale du Congrès.

L'Académie Internationale des Sciences à Saint-Marin (AIS, <http://www.ais-sanmarino.org/>) est le cadre commun à d' éminents scientifiques, originaires du monde entier (environ cinq cents, représentant une vingtaine de pays), qui ont pour but de faire de la recherche et d' enseigner sciences, techniques, humanités, au moyen de l'espéranto, en améliorant la communication internationale et la collaboration interdisciplinaire. Ces dernières années, l'AIS a organisé des sessions d'étude à Sibiu (Roumanie), Karlovo (Bulgarie), Komarno (Slovaquie).

L'Université Internationale du Congrès (IKU) consiste en une série de conférences de spécialistes, présentée chaque année pendant le Congrès Mondial d'Espéranto. Elle propose à des centaines d'auditeurs une dizaine de conférences d'experts, de professeurs ou de maîtres de conférences dans leurs spécialités respectives, sur des thèmes très variés comme la linguistique, la littérature, l'ethnologie, l'informatique, l'astronomie ou l'économie. L'IKU a lieu tous les ans depuis 1951, au début sous le nom d'Université d'Eté Internationale, et sous le nom actuel depuis le Congrès de 1981 au Brésil.

Dans les années 1990, dans le cadre des activités scientifiques et techniques de l'UEA, j'ai instauré des sessions communes de l'AIS et de l'IKU. En 1995 a eu lieu à Tampere la première session commune. Depuis lors, presque chaque année, une session commune a été organisée sous le nom d'AIS-IKU. Elle consiste en trois cours, chaque cours comporte trois ou quatre leçons. La première leçon de chaque cours est une conférence de l'IKU. De tels cours permettent de traiter un thème plus en profondeur et donnent aux participants l'occasion de passer un examen et de recevoir une attestation de l'AIS. En 2005, un nouveau contrat a été signé entre l'UEA et l'AIS pour l'organisation de sessions AIS-IKU pendant les congrès.

Le livre de l'IKU

Pour avoir un document imprimé des conférences, j'ai proposé de publier le texte de celles-ci sous forme de brochure avant le congrès. Au Congrès d'Adélaïde (1997), pour la première fois, a paru une brochure des actes de l'IKU. Depuis lors, l'UEA publie régulièrement pendant les congrès les textes des conférences de l'IKU sous forme de brochure, et le "IKU-Libro", comme on l'appelle, est devenu un best-seller à la librairie du Congrès. Des résumés des conférences en langues nationales permettent d'utiliser le "IKU-Libro" pour les relations extérieures pendant et après le Congrès. L'an dernier, la documentation de l'IKU s'est encore étoffée quand le "IKU-Libro" de 2005 a été mis en ligne sur Internet. Ensuite s'y sont ajoutés deux autres livres d'années antérieures (de 1998 et 2002), maintenant consultables sur <http://www.uea.org/dokumentoj/index.html>. Autre signe du prestige et de la popularité grandissants de l'IKU, la multiplication des propositions de conférences: pour l'IKU en Lituanie, il y a eu dix-huit propositions, et pour celle de Florence, il en est arrivé quarante.

UNESCO et IAU

Nous pouvons utiliser cette activité de niveau universitaire pour acquérir une plus vaste reconnaissance de l'espéranto auprès d'organismes internationaux à vocation scientifique comme l'UNESCO et d'organisations non gouvernementales comme l'Association Internationale des Universités (IAU). En 2000 l'AIS a été admise comme membre de la prestigieuse Association

Internationale des Professeurs et Conférenciers d'Université (IAUPL). A l'heure actuelle, des contacts sont établis entre l'UEA et l'IAU visant à la reconnaissance de l' AIS et de l'IKU en tant qu'institutions universitaires.

Terminologie

Un autre domaine important est l'élaboration de termes techniques. Du fait du progrès rapide de la science et de la technique ces dernières années, cela constitue un défi encore plus grand pour l'espéranto. Dans le cadre de l'Académie d'Espéranto il existe une section "Langue spécialisée". Pendant les congrès se réunit souvent le Forum sur la Terminologie. Le Centre Espéranto de Terminologie (TEC), fondé en 1981, dispose maintenant de sa propre page web (<http://esperanto.net/tec/>). Des dizaines de nomenclatures spécialisées en espéranto ont paru au fil des années et beaucoup sont disponibles sur Internet (par exemple sur le site de la STEB mentionné ci-dessous). Il nous faut cependant conserver et actualiser notre travail de terminologie et l'adapter aux standards et à la normalisation modernes. Par exemple, il est possible de contacter à cette fin et de collaborer avec l'INFOTERM, le Centre International d'Information sur la Terminologie.

Textes Scientifiques et Techniques

L'une des manifestations les plus importantes du potentiel de l'espéranto réside dans la rédaction et la traduction d'articles scientifiques et techniques en espéranto. Internet constitue un moyen puissant pour ce faire. Un outil très utilisé dans ce but ces derniers temps est la Wikipedia, encyclopédie multilingue libre sur Internet. La Wikipedia en espéranto (<http://eo.wikipedia.org/wiki>), qui existe depuis 2001, comporte déjà plus de quarante mille articles, dont des articles scientifiques et techniques. Une initiative très intéressante dans le domaine de la mise en ligne d'articles sur Internet est la Bibliothèque Scientifique et Technique en Espéranto sur le site du journal *Eventoj* (STEB, <http://www.eventoj.hu/steb/>). La STEB s'emploie à collecter et à mettre ou remettre à disposition des articles scientifiques et techniques dans des domaines très variés des sciences de la nature, du droit, de la médecine, de l'économie, etc. La STEB fournit une base de données croissante d'articles anciens et nouveaux et de nomenclatures spécialisées, et est ainsi au cœur de l'édition scientifique et technique en espéranto.

Perspectives

Si on regarde vers l'avenir, la culture espéranto évolue aussi dans le domaine de la science et de la technique, bien que peut-être avec moins d'intensité que dans le domaine littéraire. Pour que l'espéranto se développe dans les milieux scientifiques et techniques, il nous faut poursuivre et intensifier encore la rédaction d'une littérature espérantophone spécialisée, aussi bien originale que traduite, et actualiser la langue technique. C'est une tâche très importante que de publier sur Internet tout ce qui aura été entrepris, à la fois pour une utilisation interne dans la communauté espérantophone, et pour une information vers le monde extérieur. A l'intérieur du mouvement, continuons à promouvoir l'organisation de conférences hautement spécialisées aussi bien que de vulgarisation scientifique à l'occasion de nos congrès et de nos rencontres. Hors du mouvement, tâchons d'informer et de collaborer avec les organisations non espérantistes nationales et internationales dans le domaine de l'activité scientifique et technique et de l'enseignement supérieur.

La rektoro



GOTOO Hitosi

Profesoro pri lingvistiko ĉe la Universitato Tohoku, Sendai, Japanio specialiĝo: historia lingvistiko pri latinidaj lingvoj, informadika lingvistiko

marto 1978 finis la Universitaton Tohoku

marto 1983 finis postdiplomatian studon ĉe la Universitato Tohoku

aprilo 1983 asistanto ĉe la Universitato Tohoku

aprilo 1987 lektoro ĉe la Virina Kolegio en Yonezaŭa de Gubernio Yamagata

aprilo 1991 asist-profesoro pri lingvistiko ĉe la Universitato Tohoku

septembro 1999 - junio 2000 akademia vizitanto ĉe la Universitata Kolegio en Londono

aprilo 2004 profesoro pri lingvistiko ĉe la Universitato Tohoku

Vicprezidanto de la redakta komisiono de la Esperanto-Japana Vortaro(sub JEI)

1995--2004 membro de Akademio de Esperanto

Membro de:

Lingvistika Societo de Japanio (komisionano pri informado)

Japana Societo pri Latinidaj Studoj (estrarano)

Japana Societo pri Francaj Lingvo kaj Literaturo

Japana Asocio pri Anglalingvaj Korpusaj Studoj

Societo pri latinida lingvistiko (Strasbourg)

Internacia Asocio pri Okcitanaj Studoj (Montpellier) k.a.

Redaktaj komitatoj de Esperantologio / Esperanto Studies (Uppsala), Corpora (Edinburgo)

Verkoj: esperante

Esperantologii aziece (Esperanto, okt. 1994)

La Vortaro (la Revuo Orienta, junio 2006)

La okcitana lingvo (la Revuo Orienta, oktobro 2006)

Verkoj: japane

Nekrologo de G. Waringhien (La Movado, marto 1992)

Lingvistika teorio kaj lingvaj datumoj (Nihongogaku (japana lingvistiko), aprilo 2003)

Esperanto-Japana Vortaro (JEI 2006)

Orienta Astronomio: gasto-steloj en la Galaksia fervojo



Amri Wandel

Israelano (1954), profesoro pri astrofiziko en la universitato de Jerusalemo. Specialisto pri aktivaj galaksioj, nigraj truoj kaj astrobiologio. Estis docento en la universitatoj de Princeton, Maryland kaj Stanford kaj gastprofesoro en UCLA. Estis gasto de Waseda universitato en Tokio kaj de Pekina Universitato. Aŭtoro de pli ol cent profesiaj kaj popularaj artikoloj pri astronomio kaj astrofiziko.

Esperanto: iama TEJO-prezidanto kaj honora prezidanto. Estis Prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo. Estrarano de UEA 1995-1998 kaj ekde 2004. Prezidanto de la LKK kaj IKU-rektoro en la UK en Tel Avivo. Membro de la Akademio de Esperanto ekde 1992. Profesoro de Akademio Internacia de la Sciencoj. Iniciatis la AIS-IKU kursojn kaj la IKU-libro-serion. Ofta preleganto de IKU kaj kunaŭtoro de la libro "La Kosmo kaj Ni".

Plena listo de Esperanto-verkoj kaj prelegoj en http://eo.wikipedia.org/wiki/Amri_Wandel

Resumo

La ĉina astronomio estas unu el la du plej antikvaj (la alia estas la mezopotamia), sed certe la plej longdaŭra registrado de la ĉielo. La plej frua konata registro de suneklipso venas de Ĉinio, el la jaro 2136 aK. La ĉinaj astronomiaj observoj kovras seninterrompe preskaŭ tri jarmilojn ĝis la nuna tempo. La ĉina kalendaro aĝas preskaŭ kvar jarmilojn kaj estas, kiel la hebrea, kombinita luna kaj suna, bazita je precizaj astronomiaj observoj. Sed ĉinaj astronomoj registris ne nur la kalendarajn periodajn fenomenojn, sed ankaŭ rarajn okazaĵojn kiel kometojn kaj gasto-stelojn (novaĵoj), unu el kiu estas la fama supernovaĵo de la Krabo en la jaro 1054, kiu ne estis menciita en eŭropaj fontoj. Kiam en mezepoka Eŭropo la evoluo de astronomio estis bremsita de la eklezio, ĝi floris en Ĉinio kaj sekve en Koreio kaj Japanio. En la nuna epoko de spac-esplorado Ĉinio kaj Japanio ludas gravan rolon. En la jaro 2003 Ĉinio fariĝis la tria ŝtato kiu sendis homojn en la spacon, per la spacŝipserio Ŝenzu (ĉiela ŝipo). Ĝia ambicia spacplano celas interalie konstruadon de spacstacio kaj lun-esploradon. Japanio funkciigis du el la plej sukcesaj X-radiaj satelitaj teleskopoj en la naŭdekaj - Ginga (Galaksio)

kaj ASCA. Japanaj astronomoj malkovris plurajn kometojn (inter ili la fama Hayakutake). Kaj fine, la kontakto inter Japanio, Astronomio kaj Esperanto - "Nokto de la Galaksia fervojo" - konata Japana novelo, de la fama japana verkisto (kiu estis ankaŭ esperantisto kaj amatora astronomo) Kenji Miyazaŭa. Havante astronomian fonon, tiu fabelaro enkondukis astronomion por multaj japanaj gejunuloj kaj ontaj astronomoj. En ĝia filma versio la lingvo de la fantazia mondo estas Esperanto.

Eastern Astronomy: Guest stars in the Galactic railway

Amri Wandel

Chinese astronomy is one of the two most ancient mappings of the sky (the other being Mesopotamian), and certainly the most long-lasting. The earliest recorded eclipse of the sun was noted in China, in 2136 BC. Chinese astronomical observations are uninterrupted for the last three millennia. The Chinese calendar is nearly four thousand years old, and like the Hebrew calendar it is a combination of lunar and solar calendars, based on precise astronomical observations. Chinese astronomers did not register just regular phenomena, but also rare events such as comets and super-novae, one of which was the famous supernova in the Crab Nebula in 1054, which was not mentioned in European sources.

Whilst in the dark ages the development of European astronomy was halted by the church, it blossomed in China, and later on in Korea and Japan. In the current age of space exploration, China and Japan play an important role. In 2003, China became the third state to send humans into space, with the Shen Zu spacecraft series. Its ambitious space programme aims to build a space station and explore the moon, amongst other things. Japan ran two of the most successful X-ray satellite telescopes in the 1990s – Ginga and ASCA. Japanese astronomers discovered many comets, (including the famous Hayakutake comet). And finally, the link between Japan, Astronomy and Esperanto – “Night of the Galactic railway”, a well known novel by the famous Japanese writer (who was also an Esperantist and an amateur astronomer) Kenji Miyazawa. Having a basis in astronomy, this collection of fables introduced astronomy to many Japanese youngsters and future astronomers. In its film version, the language of the fantasy world is Esperanto.

Astronomie: les « étoiles invitées » dans le train de la Voie Lactée

Amri Wandel

L’astronomie chinoise est l’une des deux plus anciennes (l’autre étant la mésopotamienne), et assurément celle qui enregistre les phénomènes célestes depuis le plus longtemps. La plus ancienne mention connue d’une éclipse de soleil vient de Chine, et date de 2136 avant JC. Les observations astronomiques chinoises couvrent sans interruption presque trois millénaires jusqu’à nos jours. Le calendrier chinois est vieux de presque quatre millénaires et est, comme l’hébraïque, à la fois lunaire et solaire, et basé sur des observations astronomiques précises. Mais les astronomes chinois enregistraient non seulement les phénomènes calendaires périodiques, mais aussi les événements rares comme les comètes et les « étoiles invitées » (novas), dont l’une est la fameuse supernova du Crabe, observée en l’an 1054, et qui n’a pas été mentionnée dans les sources européennes. Alors que dans l’Europe médiévale, l’évolution de l’astronomie était freinée par l’Eglise, celle-ci était florissante en Chine et, par suite, en

Corée et au Japon. A l'époque actuelle d'exploration spatiale, la Chine et le Japon jouent un rôle important. En 2003, la Chine est devenue le troisième état à avoir envoyé des hommes dans l'espace, grâce à la série de vaisseaux spatiaux Shenzu (Vaisseau céleste). Son ambitieux plan spatial vise entre autres à construire une station spatiale et à explorer la lune. Le Japon a mis en œuvre, dans les années 90, deux des télescopes orbitaux à rayons X les plus performants, Ginga (Galaxie) et ASCA. Des astronomes japonais ont découvert plusieurs comètes (parmi lesquelles la célèbre Hayakutake). Et pour terminer, le lien entre le Japon, l'Astronomie et l'Espéranto - « *Train de nuit dans la voie lactée* » - roman connu du célèbre écrivain japonais Kenji Miyazawa, qui était aussi espérantiste et astronome amateur. Possédant un fond astronomique, ce recueil de contes a fait connaître l'astronomie à beaucoup de jeunes Japonais, provoquant quelques vocations de futurs astronomes. Dans sa version filmée, la langue du monde imaginaire est l'Espéranto

(Japana resumo)

天文学：銀河鉄道の客星たち

中国の天文学は世界でも最も古い二つの天文学の一つ（もう一つはメソポタミアの天文学）であり、天文事象の観測としては最も長期にわたるものである。今日知られている最も早い日食の記録は中国のもので、紀元前**2136**年に遡る。中国の天文観測は現代までほぼ3千年間、途切れることなく行われてきた。中国の伝統的な暦は4千年間用いられてきたが、ユダヤ暦と同じく正確な天文観察に基づいた太陰太陽暦である。中国の天文学者たちは暦のもととなる周期的な天体現象を記録したばかりでなく、彗星や客星（新星）といった突発的な現象も見逃してはいない。例えば、「かに星雲」を作った紀元**1054**年の超新星が中国の記録に見られるが、これはヨーロッパの資料では記録されていない。中世ヨーロッパにおいて、天文学の発展がキリスト教会によって抑制されていたのに対し、同時代の中国、そして朝鮮や日本ではそのような制約は存在しなかった。今日の宇宙開発の分野でも、中国と日本は重要な役割を演じている。**2003**年に中国は「神舟」計画によって、有人宇宙飛行に成功した世界で3番目の国となった。中国の宇宙開発計画の中には、宇宙ステーションの建設や月面探査が含まれている。日本は**1990**年代、「ぎんが」「あすか」という**2**つの宇宙X線観測衛星を稼働させ、多くの成果を収めている。日本の天文学者はいくつかの彗星を発見している（有名な百武彗星もその一つ）。そして日本と天文学、そしてエスペラントの結節点として挙げておきたいのが、宮沢賢治の「銀河鉄道の夜」である（賢治はエスペランティストで、アマチュア天文学者でもあった）。この童話は天文学的背景を持っていたため、そのおかげで天文学に興味を持った若者は珍しくなく、将来の天文学者を育てることにもなった。映画化された「銀河鉄道の夜」においては、エスペラントが幻想世界の言語として使われている。

Orienta Astronomio: gasto-steloj en la Galaksia fervojo

1. Antikva ĉina astronomio

Ĉina astronomio havas longan historion. Estis trovitaj oraklaj ostoj de la Yin dinastio (2a jarmilo a.K.) kiuj registras eklipsojn kaj novaĵojn. La plej frua konata registro de suneklippo venas de Ĉinio, el la jaro 2136 antaŭ Kristo. Detala kaj regula registrado de astronomiaj observoj ekzistas de la 6a jarcento a.K. La ĉina astronomio estas unu el la du plej antikvaj (la alia estas la Mezopotamia) sed certe la plej longdaŭra registrado de la ĉielo. La ĉinaj astronomiaj observoj kovras seninterrompe pli ol du jarmilojn, ĝis la enkonduko de okcidenta astronomio kaj la teleskopo en la 16a jarcento, kiuj funde ŝanĝis la Ĉinan astronomion.

Lun- kaj sun- eklipsoj


La antikva ĉina astronomo [Shi Shen](#) (4a jarcento a.K.) konis la rolon de la luno en suneklippo, kaj skribis instrukciojn por kalkuli la tempojn de suneklippo laŭ la relativaj pozicioj de la suno kaj luno. La antikva ĉina astronomo kaj inventisto [Zhang Heng](#) (78-139 p.K.) skribis pri ambaŭ, [suneklippo](#) kaj [luneklippo](#) en sia publikaĵo de *Ling Xian* (靈憲), 120 p.K., provizante la ĝustan klarigon de la eklipsa fenomeno:

*La suno estas kiel fajro kaj la luno kiel akvo. La fajro eldonas lumon kaj la akvo ĝin reflektas. Tial la brilo de la luno venas de la elradiado de la suno, kaj la luna mallumo (pho) venas ĉar (la lumo de) la suno estas barita (pi)... La suna lumo ne ĉiam atingas la lunon pro la barado de la Tero, kio estas nomata 'an-hsü', **lun-eklippo**. Kiam (simila fenomeno) okazas kun planedo (ĝi estas) okulatado (hsing wei); kiam la luno pasas trans (kuo) (la suno) okazas **sun-eklippo** (ŝih).*

Stel-katalogoj kaj ĉiel-mapoj

La ĉinoj estis la unuaj kiuj kreis stel-katalogon (ducent jaroj antaŭ la fama Hipparchos, kiu verkis la unuan okcidentan katalogon) kaj ĉiel-mapojn. En la kvara jarcento a.K. la astronomoj [Ŝi Ŝen](#) kaj [Gan De](#) kompilis la unan stel-katalogon de la mondo. Ĝi nomiĝis *Stel- Manlibro de la Mastroj Gan kaj Shi* (甘石星經). Dum la regno de imperiestro [Xuanzong of Tang](#) (712 - 756 p.K.) ĉinaj astronomoj analizis la verkojn de Gan De kaj Ŝi Ŝen, trovante pli ol 800 stelojn. Dum la [Han Dinastio](#) la astronomo [Zhang Heng](#) (78 - 139 AD) kreis katalogon de ĉ. 2500 steloj kaj pli ol cent konstelacioj. En la posta periodo de la Tri Reĝlandoj (220 - 280 p.K.), [Chen Zhuo](#) (陳卓) kombinis antaŭajn verkojn, kreante katalogon kiu listigas 1464 stelojn en 283 konstelacioj.

La ĉinoj estis ankaŭ la unuaj kiuj desegnis stelmapojn. La plej fama estas la mapo trovita en [1907](#), en [Dunhuang](#), [Gansu](#), far' la brita arkeologo [Marc Aurel Stein](#). Nun ĝi troviĝas en la [Brita Muzeo](#) en [Londono](#). La mapo reprezentas la kompletan ĉielon kaj havas pli ol 1,350 stelojn. La mapo estas verŝajne de la [Tang Dinastio](#), kredeble de la tempo de la imperiestro [Li Xian](#) (唐中宗李顯, 705 - 710 p.K.). La steloj en la mapo havas tri kolorojn, indikante lernejojn de astronomio: nigra por la steloj de Gan, flava por Shi kaj blanka por Wuxian.



Bildo 1. Stel-mapo de Dunhuang, de la [Tang dinastio](#). La parto en la bildo montras la nord-polusan regionon kaj eblas rekonii la konstelaciojn Granda urso, Arkisto (Sagittarius) kaj Kaprikorno. La koloroj de la steloj indikas lernejojn de astronomio.

2. La ĉina kalendaro

La ĉefa kialo por la astronomiaj observoj en antikva Ĉinio estis, kiel en multaj aliaj mondopartoj, registrado de tempo por agrikulturaj kaj historiaj celoj. La ĉina kalendaro aĝas preskaŭ kvar jarcentojn kaj estas, kiel la hebrea, kombinita luna kaj suna, bazita je precizaj astronomiaj observoj.

Orienta kaj okcidenta kalendaroj

La **Ĉina kalendaro** estas fakte [lun-suna kalendaro](#), kiu kombinas elementojn de ambaŭ kalendaroj, suna kaj luna. Kvankam en la nuntempa Ĉinio la [Gregoria kalendaro](#) estas uzata por ĉiutagaj aktivecoj, la ĉina kalendaro estas ankoraŭ uzata por la tradiciaj festotagoj, kiel la ĉina novjaro (la printempa festivalo) la [Duan Wu festivalo](#), kaj la [Mez-Aŭtuna Festivalo](#). La ĉina kalendaro estas ankaŭ uzata en la ĉina [astrologio](#), kiel por fiksi la plej taŭgan daton por geedziĝo aŭ inaŭguro de domo.

En [la ĉina](#), la tradicia kalendaro estas nomata "*agrikultura kalendaro*" (ĉine: 农历, pinyin: nónglì) dum la [Gregoria kalendaro](#) estas nomata "*komuna kalendaro*" (公历, gōnglì) aŭ "*Okcidenta kalendaro*" (西历 xīlì). Oni ankaŭ uzas por la ĉina kalendaro la nomon "[Yin](#) kalendaro" (阴历, yīnlì) por aludi al ĝia luna aspekto dum la okcidentan Gregorian kalendaron oni nomas la "[Yang](#) kalendaro" (阳历, yánglì) por indiki ĝian sunan karakteron. La Ĉina kalendaro ankaŭ estis nomata la "malnova kalendaro" (旧历, Tradicia Ĉina: 舊曆, jiùlì) post kiam la "nova kalendaro" (新历, 新曆, xīnlì), t.e. la Gregoria kalendaro, estis adoptita kiel la oficiala kalendaro.

La zodiakaj bestoj kaj la 12-jara ciklo

La ĉina kalendaro havas dek du monatojn kaj ciklon de dek du jaroj, kiuj portas la nomojn de dek du bestoj. Jen iliaj simboloj. La unua karaktero estas la nomo de la besto en la ĉina, la dua estas la karaktero uzata por reprezenti la astrologian signon de tiu besto.

1. 鼠子 [Rato](#)
2. 牛丑 [Bovo](#)
3. 虎寅 [Tigro](#)
4. 兔卯 [Kuniklo](#)
5. 龍辰 [Drako](#)
6. 蛇巳 [Serpento](#)
7. 馬午 [Ĉevalo](#)
8. 羊未 [Ŝafo](#)
9. 猴申 [Simio](#)
10. 雞酉 [Koko](#)
11. 狗戌 [Hundo](#)
12. 豬亥 [Porko](#)

(en nuna buŝa ĉina lingvo la ordo de karakteroj estas inversitaj, nome, 子鼠, 丑牛, 寅虎...)

La dekdu-jara ciklo estis konstruita de la orbito de la planedo [Jupitero](#), (Ĉine 歲星 *Suìxīng*, la "Jar-stelo"). Ĉinaj astronomoj dividis la ĉielan orbiton de Jupitero en 12 partojn, ĉar ĝia orbito ĉirkaŭ la suno daŭras proksimume 12 jarojn (la preciza daŭro estas 11.86 jarojn).

3. Konstelacioj

Ĉinaj konstelacioj estas tre diferencaj de la okcidentaj, kiuj estas bazitaj je la greka mitologio. La antikvaj ĉinoj dividis la noktan ĉielon en 31 regionojn, tri "fermaĵoj" aŭ "ĉirkaŭitaĵoj" (三垣 san yuán) kaj 28 "domoj" aŭ "bienoj" (二十八宿 er shi ba xiù). La

fermaĵoj okupas la regionon ĉirkaŭ la polusa stelo kaj inkludas stelojn kiuj videblas tutjare. La 28 domoj okupas la zodiakan regionon de la ĉielo. Oni povas ilin konsideri kiel ekvivalento de la 12 [zodiakaj konstelacioj](#) en okcidenta astronomio. Tamen, kontraŭe al okcidenta astronomio, domoj reflektas la moviĝon de la luno dum la luna monato, kaj ne de la suno dum la suna jaro.

Ĉinaj stelnomoj.

La "fermaĵoj" kaj "domoj" estas dividitaj en 283 "astrejoj" (angle [asterisms](#)). Ĉiu videbla stelo apartenas al unu astrejo. Laŭ la ĉina tradicio, ĉiu stelo havas nomon konsistanta de la nomo de ĝia astrejo kaj numero. Tiu metodo de stel-nomado estis kreita de ĉinaj astronomoj mil jarojn antaŭ la ekvivalenta okcidenta metodo de [Johann Bayer](#). (En tiu metodo ĉiu stelo havas nomon kombinita de ĝia konstelacio kaj greka litero kiu indikas ĝian brilon. Ekzemple, la plej brila stelo en la konstelacio Centaŭro nomiĝas "Alfa Centaŭro"). Ekzemple, la stelo konata en la okcidento per la nomo Altair nomiĝas en la ĉina 河鼓二 kiu konsistas el 河鼓 - la astreja nomo (laŭvorte, la tamburo en la rivero), kaj 二 ĝia numero (du). Tiuj nomoj estas ankoraŭ hodiaŭ uzataj, eĉ en la ĉina moderna astronomio.

La kvar direktoj/sezonoj

La [Ĉina konstelaciario](#) estas dividita en kvar **ĉielpartoj**. Ili havas kvar simbolojn ([Ĉine](#): 四象; [Pinyin](#): Sì Xiàng) de kvar [mitologiaj](#) estaĵoj:

- [Azura Drako de la oriento](#) (青龍)
- [Ruĝa Birdo de la sudo](#) (朱雀)
- [Blanka Tigro de la okcidento](#) (白虎)
- [Nigra testudo de la nordo](#) (玄武)

Ĉiu simbolo reprezentas direkton kaj sezonon de la jaro. Ili aperas en multaj historiaj ĉinaj mitoj kaj fabeloj kaj ankaŭ en modernaj japanaj komiksoj [kaj](#) desegnitaj filmoj.


4. Supernovaoj - la ĉinaj "gasto-steloj"

Ĉinaj astronomoj registris ne nur la kalendarajn periodajn fenomenojn, sed ankaŭ rarajn okazaĵojn kiel kometojn kaj "gasto-stelojn" (la ĉina termino por novaĵoj – "novaj steloj" – steloj kiuj abrupte ekbrilas por mallonga tempo). Unu el ili estas la fama supernovao de la Krabo en la jaro 1054, kiu ne estis menciita en eŭropaj fontoj.

La Krabo kaj aliaj supernovaoj

La plej frua skriba atesto pri apero de supernovao venas de ĉinaj astronomoj, en la jaro 185 pK. En la jaro 1054, precize 950 jarojn antaŭ la UK en Pekino, ĉinaj astronomoj observis kaj dokumentis novan stelon en la konstelacio Taŭro. Dum kelkaj semajnoj ĝi estis la plej brila stelo en la ĉielo, videbla eĉ dumtage, kaj post du jaroj ĝi ne plu estis videbla. La ĉinoj nomis

tiun fenomenon "gasta stelo". La supernovao observita de ili en la jaro 1054 estas unu el la plej famaj supernovaoj, kies restaĵo nuntempe videblas kiel la Krabo-nebulozo. La fama japana poeto Fujiwara no Teika, priskribis ĝin en sia taglibro 'Meigetsuki': *Ĉiunokte, kelkaj horoj post noktomezo, ne konata stelo tiom brila kiel Jupitero leviĝas en la orienta ĉielo.*



Bildo 2. La nebulaĵo de la Krabo, restaĵo de la supernovao registriita de la ĉinoj en 1054. Fotita la 12an de marto 2007 per la japana giganta teleskopo "Subaru".

La sekvantaj supernovaoj en nia galaksio estis spektitaj en la jaro 1572 de la fama astronomo Tycho [Tiĥo] Brahe kaj en 1604 de lia disĉiplo Johano Kepler. Por la venonta supernovao en nia galaksio la homaro devis atendi preskaŭ 400 jarojn. Ĝi estis la unua proksima supernovao en la moderna epoko, vidita en februaro 1987. En la moderna epoko astronomoj povas vidi per teleskopoj supernovaojn en aliaj galaksioj, ofte tre foraj. Kvankam en difinita galaksio supernovao okazas tre malofte (eble unu fojon en jarcento), en miliardoj de foraj galaksioj nun videblaj astronomoj observas ĉiujare dekojn da supernovaoj en foraj galaksioj.

Kio estas supernovao?

Evidentiĝis ke temas pri unu el la plej potencaj eksplodoj en la kosmo, miliardoble pli brilaj ol la Suno. Ilia maksimuma brilo povas superi la brilon de tuta galaksio. Supernovaoj, la spektaklaj mortoj de steloj, ankaŭ kreas vivon, ĉar ili estas la fonto de la kemiaj elementoj bezonataj por krei la biologiajn molekulojn bezonatajn por la evoluo de vivo. Supernovao-

eksplozoj postlasas nebulozojn, neŭtronajn stelojn, pulsarojn kaj nigrajn truojn. Per observo de la plej foraj supernovaoj astronomoj en la lastaj jaroj konkludis ke la universa ekspansio akceladas kaj sugestas la ekziston de malhela energio. Astronomoj kredas ke eĉ la Suno kaj la Tero ekzistas dank' al supernovao kiu eksplodis antaŭ 5 miliardoj da jaroj.

5. Gravaj datoj en la frua Ĉina astronomia historio

[2137 A.K.](#) [22](#) okt. - Ĉina libro, [Klasiko de Historio](#), registras la plej fruan konatan suneklipson

ĉirkaŭ [2000 A.K.](#) - Ĉinoj konstatas ke [Jupitero](#) bezonas 12 jarojn por fari kompletan orbiton.

ĉirkaŭ [1400 A.K.](#) - Ĉinoj registras la regulecon de sun- kaj lun-eklipsoj, la plej fruan konatan sun-erupcion kaj du novaĵojn (七日己巳夕有新大星并火, 辛未酉爻新星).

ĉirkaŭ [1200 A.K.](#) - Ĉinoj dividas la ĉielon en 28 regionojn ([Ĉinaj konstelacioj](#))

ĉirkaŭ [1100 A.K.](#) - Ĉinoj unuafoje fiksas la [printempan](#) ekvinokson.

[776 A.K.](#) - Ĉinoj faras la plej fruan fidindan registron de [suneklipo](#)

[613 A.K.](#), julio - [kometo](#), eble [Halley](#), registrita en la "Printempaj kaj aŭtunaj jardatumoj" (秋七月, 有星孛入于北斗).

[532 A.K.](#) - [novaĵo](#) estas menciita en la skribaĵoj de la historiisto [Zuo Zhuan](#) (周景王十三年春, 有星出婺女).

[28 A.K.](#) - Ĉina historio-libro de Han registras la plej malnovan observon de sunmakuloj.

[185 p.K.](#) - Ĉinoj registras la plej fruan observon de supernovao

[687](#) - Ĉinoj registras la plej malnovan observon de [meteora pluvo](#).

[1054](#) – 4a de [julio](#), Ĉinaj astronomoj observas *gasto-stelon*, la supernovao nun konata kiel la Kraba nebulozo, aŭ M1.

[1088](#) - La Ĉina sciencisto [Shen Kuo](#) publikigas akuratajn mezurojn de la diferenco inter la polusa stelo kaj la vera nordo, kaj pledas por la sfera formo de astroj.

6. La mezepoko kaj la okcidenta influo

Kiam en mezepoka Eŭropo la evoluo de astronomio estis bremsita de la eklezio, ĝi floris en Ĉinio kaj sekve en Koreio kaj Japanio. En [1088](#) - La Ĉina sciencisto [Shen Kuo \(1031-1095\)](#) publikigis siajn mezurojn de la diferenco inter la pozicioj de la polusa stelo kaj la vera nordo, kiu multe helpis al kompas navigado. Li ankaŭ pledis ke astroj havas sferan formon, uzante la formon de la ombro dum eklipsoj, kiu promociis la teorion de sfera Tero, kontraŭante la teorion de plata Tero. Shen Kuo kaj lia kolego Wei Pu lanĉis ambician projekton de astronomia observado ĉiunokta dum kvin jaroj, laborego kiu rivalis la laboron de [Tycho Brahe](#) en Eŭropo, plurajn jarcentojn pli malfrue. Shen Kuo kaj Wei Pu registris la precizajn

koordinatojn de la planedoj sur stel-mapo kaj kreis teoriojn de planedaj orbitoj kaj moviĝo, inkluzive de [retrograda](#) movado.

Okcidento en Oriento: la influo de la okcidenta astronomio

La alveno de okcidenta scienco pere de jezuitaj pastroj okazis ĉefe en la 16a kaj frua 17a jarcentoj, fekundigis sed samtempe bremsis la Ĉinan astronomion. La teleskopo estis alportita komence de la 17a jarcento. Ĝi estas unuafoje skribe menciita en Ĉinio de [Emanuel Diaz](#) (Yang Ma-Nuo), kiu verkis sian *Tian Wen Lue* en 1615. En 1626 [Adam Sĉall von Bell](#) (Tang Ruo-wang) publikigis ĉinlingvan artikolon pri la teleskopo konata kiel *Yuan Jing Shuo* (malproksimen-vidanta optika vitro). La [Chongzhen-a imperiestro Sizong](#) (明思宗, 1627-1644) de la [Ming dinastio](#) akiris la teleskopon de [Johannes Terrentius](#) (aŭ [Johann Schreck](#); Deng Yu-han) en 1634, dek jarojn antaŭ la falo de la Ming dinastio. Ĝia influo sur ĉina astronomio estis limigita.

La [Jezuitaj misioj](#) en la 16a kaj 17a jarcentoj alportis la okcidentan astronomion al Ĉinio. Post la [galilea proceso](#) komence de la 17a jarcento, la Rom-katolika Jezuita ordeno devis sekvi [geocentrism](#) kaj ignori la [heliocentrisman](#) teorion de [Koperniko](#) kaj liaj sekvantoj, malgraŭ ĝia kreskanta populariĝo en la Eŭropa astronomio. Sekve la Jezuitoj alportis al siaj ĉinaj gastigantoj la Ter-centrisman, antaŭ-Kopernikan astronomion (inkluzive de la malĝustaj [Ptolemeaj-Aristotelaj](#) konceptoj de la Helena epoko, ke la steloj troviĝas sur koncentraj kristalaj sferoj). Tio kontraŭis la ĉinan tradician vidpunkton, ke la astroj flosadas en malplena senfina spaco (ekzemple la antikva doktrino de [Xuan Ye](#)).

Kompreneble la teorioj de Koperniko, [Galileo](#), kaj [Tycho Brahe](#) fine venkis en la eŭropa scienco, kaj sekve iom post iom penetris Ĉinion. En 1627, la pola Jezuito [Michael Boym](#) (Bu Mi-ge) entuziasme alportis la tabelojn de [Johano Kepler](#) al la Ming korto en [Pekino](#). En 1640 Adam Schall von Bell verkis ĉinlingvan artikolon pri okcidenta astronomio. La nomoj de Koperniko (Ge-Bai-Ni), Galileo (Jia-li-lue), kaj Tycho Brahe (Di-gu) fariĝis konataj ankaŭ en Ĉinio. Estis ankaŭ jezuitoj kiuj subtenis la Kopernikan teorion, kiel [Nicholas Smogulecki](#) kaj [Wenceslaus Kirwitzer](#). Tamen, la kopernikaj konceptoj ne plene akceptiĝis en Ĉinio ĝis la frua 19a jarcento, kun la alveno de [protestantaj](#) misiistoj kiel [Joseph Edkins](#), [Alex Wylie](#), kaj [John Fryer](#). Kontraŭe en [Japanio](#), la kopernika universa koncepto estis plene akceptita pli frue. En 1725 [Nakane Genkei](#) fondis la unuan modernan observatorion en Japanio.

7. La Antikva Observatorio de Pekino


En Pekino oni povas viziti la ruĝon de la observatoria teraso de [Yuan](#)-dinastio. Ĝi estis konstruita ĉ. la jaro [1279](#). Sur la teraso de la observatorio antaŭe troviĝis 15 astronomiaj aparatoj (konstruitaj en [1442](#) dum la [Ming](#)-dinastio), sep el kiuj transportiĝis al la [Nankina](#) Ziĝinŝan-observatorio kaj Nankina Muzeo en [1931](#). La restintaj ok aparatoj estis faritaj el bronzo en la 17-a kaj 18-a jarcentoj. Oni uzis tiujn aparatojn por mezuri la pozicion de [planedoj](#) en la ĉielo. Sur la bazoj de la aparatoj estas skulptitaj [drakoj](#) kaj nuboj. Tiuj aparatoj havas ne nur sciencajn artan valoron. La korto ĉe la teraso servis kiel loko por studi [astronomion](#), kolekti kaj ordigi rilatajn materialojn. Nun ĝi servas por eksponi la atingojn de astronomio en la antikva [Ĉinio](#) kaj kolekti historiajn materialojn pri astronomio.



Bildo 3. Bronza astronomia instrumento (mezurilo de astraj koordinatoj) en la pekina observatorio

8. Moderna astronomio kaj spac-esplorado

En la nuna epoko de spac-esplorado Ĉinio kaj Japanio ludas gravan rolon. En la jaro 2003 Ĉinio fariĝis la tria ŝtato kiu sendis homojn en la spacon, per la spacŝipserio Shenzhou [Ŝenĝu] (ĉiela ŝipo). Ĝia ambicia spacplano celas interalie konstruadon de spacstacio kaj lun-esploradon. Japanio funkciigis du el la plej sukcesaj X-radiaj satelitaj teleskopoj en la naŭdekaj – Ginga (Galaksio) kaj ASCA (ĉiela birdo). Japanaj astronomoj malkovris plurajn kometojn (inter ili la fama kometo Hayakutake malkovrita de amato). En la naŭdekaj Japanio konstruis kaj funkciigas unu el la plej potencaj teleskopoj de la mondo, "Subaru" (japanlingve Pleadoj), kiu troviĝas en Hawaĥi, je alteco de 4000 metroj sur la monto Manua Kea. Ĝia spegulo havas diametron de 8.2 m, kaj ĝi uzas plej modernan instrumentaron.



Bildoj 4. La japana teleskopo "Subaru" sur monto Manua Kea en Hawaii.

9. Nokto de la Galaksia fervojo

Kio estas la kontakto inter Japanio, Astronomio kaj Esperanto? – "Nokto de la Galaksia fervojo" estas konata Japana novelo, de la fama Japana verkisto (kiu estis ankaŭ esperantisto kaj amatora astronomo) Kenji Miyazawa. Ĝi estis tradukita en Esperanton kaj en ĝia filma versio la lingvo de la fantazia mondo estas Esperanto.

Verkisto, esperantisto kaj astronomo

MIYAZAWA Kenji, 宮沢賢治 [Mijazaŭa Kenĵi], (27.10.1896-12.9.1933) estis poemisto kaj verkisto de fabeloj. Li naskiĝis en [Iŭate prefektujo](#), en [Hienuki](#). Post kiam li studis ĉe Morioka Alta Lernejo de Agronomio kaj Forstokulturo, li verkadis instruante en lernejo pri agronomio. Poste li ekŝiĝis kaj dediĉis sin al verkado.

Li amis sian hejmlokon, kaj la fikcia nomo "Ihatovo" kio aperas en liaj verkoj devenis de Iŭate. Li tre interesiĝis pri Esperanto. Liaj verkoj skribitaj en Esperanto estas ne multaj, sed multaj nomoj el Esperanto aperas en liaj verkoj. Post lia morto, oni tradukis liajn verkojn en Esperanton. Miyazawa ankaŭ estis amatora astronomo.

La spirito de liaj verkoj reflektas lian budhismon. Miyazawa sentis, ke ĉiuj vivantaĵoj estas fratoj, kaj ne eblas atingi veran feliĉon se oni ne egale celas la feliĉon de ĉiuj vivantaj estaĵoj. Laŭ Miyazawa tio ne estis nur ideo: vagante en la naturo li ofte pensadis pri bestoj, plantoj, ŝtonoj, vento, nuboj, ĉielarkoj, steloj. Li amis la naturan mondon kaj liaj historioj estas plenaj de ĉiaj estaĵoj, kiuj rilatas nature kaj frate.



Bildo 5. Kenji Miyazawa sur japana poŝtmarko

Kelkaj el liaj verkoj (en Esperanto)


- Haru to Shura (Printempo kaj Asura)
- Chumon no Oi Rjoriten (La Restoracio de Multaj Ordonoj)
- [Gooŝ la Ĉelisto](#)
- [La ĝemelaj steloj](#)
- [Nokto de la Galaksia Fervojo](#)

La verko

Nokto de la Galaksia Fervojo (銀河鉄道の夜 *Ginga Tetsudō no Yoru*) estas unu el la plej famaj fabeloj verkitaj de [Miyazawa Kenji](#). Pluraj [filmoj](#), [bildstrioj](#) kaj [dramoj](#) estas verkitaj surbaze de ĉi tiu fabelo. Havante astronomian fonon, ĝi enkondukis astronomion por multaj japanaj gejunuloj kaj eĉ astronomoj. Ĝi estis tradukita en esperanton de [KONISHI Gaku](#), eldonita en Osako de Japana Esperanta Librokooperativo, en 1994.

La fabelo estas la rakonto de Giovanni, lerneĵano kiu ne povis respondi la demandon de sia [instruisto](#) kio estas la "[Lakta Vojo](#)". Li trovas sin kun sia bona amiko kaj samklasano

Campanella en la Galaksia fervojo, kiu prenas ilin al diversaj haltejoj, ofte konstelacioj kiel Aglo, Cigno, Suda kruco ktp.



Bildo 6. Kovrilo de [DVD](#) de la movbilda filmo eldonita en [Usono](#)

La filmo: futurista mondo kun Esperanto

En la desegnita-filmo farita laŭ "Nokto de la Galaksia fervojo" la lingvo de la fantazia mondo estas Esperanto. Datumoj pri la filmo:

- o Produkta jaro: [1985](#)
- o [Reĝisoro](#): [SUGII Gisaburo](#)
- o Rakonto kaj figuroj: [MASUMURA Hiroshi](#)
- o Scenaro: [BETSUYAKU Minoru](#)
- o [Muziko](#): [HOSONO Haruomi](#)

La filmo, kiu havas unikan kaj pale belan koloraron, fantazian kaj efemeran mondokoncepton, estas alte taksata en Japanio. Eble omaĝe al la mondo de Miyazawa, la rolantoj en la filmo estas katoj. Ankaŭ la apero de Esperanto en la animado estas eble omaĝe al Miyazawa kiu entuziasmis pri ĝi. Fakte, la paneloj, pendaĵoj, tekstoj, k.t.p. en la filmo estas skribitaj en

Esperanto. Eĉ [himno](#) ("Dio, pli apud vin", menciata en la filmo kiel "N-ro 306") estas kantata esperante.



Bildo 7. Ekzemplo de la uzo de Esperanto en la filmo: desegnaĵo de la Galaksio kun klarigoj en Esperanto sur nigra tabulo en la klasĉambro.

Bibliografio:

East Asian Archaeoastronomy: Historical RECORDS of Astronomical Observations of China, Japan and Korea Zhentao Xu, David W. Pankenier, and Yaotiao Jiang, *Gordon and Breach Science, Amsterdam, the Netherlands, 2000*

Ĉina astronomio – frua historio - <http://ephemeris.com/history/china.html>
http://en.wikipedia.org/wiki/Chinese_astronomy

La Ĉina spac-programo - Space Today online
<http://www.spacetoday.org/China/ĈinaAstronomy.html>

Astronomy in Japan - <http://www2.gol.com/users/steve/jastro.html>

Subaru: <http://www.subaruteleskopo.org/Introduction/index.html>

http://en.wikipedia.org/wiki/Kenji_Miyazawa
http://eo.wikipedia.org/wiki/Nokto_de_la_Galaksia_Fervojo

[*Nokto de la Galaksia Fervojo*](#), MIYAZAWA Kenji, [KONISHI Gaku](#) (Trad.), Osako: Japana Esperanta Librokooperativo, 1994, [ISBN 4930785421](#)

Malegalecoj je sano kaj ties sociaj determinantoj



José Antonio Vergara

Ĉiliano (1962), kuracisto, specialiĝinta pri publika sano/epidemiologio. Laboras kiel epidemiologiisto en regiona oficejo de sialanda Ministerio pri Sano. Li aŭtoris aŭ kunaŭtoris diversajn publikaĵojn pri sia fako, en- kaj eksterlande.

E-medicine li estas DM kaj komitatano de UEA, komisiito por Ameriko kaj ĝenerala sekretario de ISAE. Prelegis en IKU (Montpellier 1998) pri la aperantaj infektaj malsanoj, en la strategia forumo (UK Gotenburgo 2003) pri la dezirindeco de sciencpopulariga rolo por Esperanto, en la centjariĝa ISAE-festkonferenco (Tavoleto 2006) pri la ŝanĝiganta interrilato scienco-socio kaj gvidis la Kongresan temon en la UK Florenco 2006.

Resumo

Samkiel aliaj indikiloj pri homgrupa sanstato (i.a. infana mortokvanto, memperceptitaj sano kaj bonfarto, ktp), la vivespero aŭ atendata vivodaŭro je nasko, havanta respektive en Japanujo (81,9 jaroj) kaj Siera-Leono (34 jaroj) la plej longan kaj mallongan nivelojn en la mondo, montras la ekziston de grandaj malegalecoj je sano inter la landoj kaj ankaŭ ene de diversaj unuopaj socioj. Kutime, oni emis klarigi tiujn malsimilecojn kaj ŝanĝojn de la epidemiologia profilo per elementoj tiaj, kiaj la alirebleco al medicina flegosistemo kaj izolitaj riskofaktoroj kiel gena heredo, aĝo, konduto kaj aliaj individuaj trajtoj (fumado, dikeco, sangopremo, kolesterolo-nivelo, ktp).

Tamen, dum la lastaj jaroj la esplorkampo pri populacia sano videbligis la fakton ke la frapa socia gradovario ĉe la komparado inter diversaj populacioj, kiel ekz. inter evoluintaj kaj malriĉaj landoj, rezultas el la efiko de la socia medio (edukado, laborkondiĉoj, sociaj kaj ekonomiaj rilatoj, loĝkondiĉoj, socia ekskludo, ktp) en kiu la homoj disvolviĝas.

Tiu nova perspektivo pri la sociaj determinantoj de la sano ne limigas sin al la kompreno ke la persista, eĉ pliprofundiganta malriĉeco en diversaj regionoj de la mondo, pro manko de bazaj vivobezonaĵoj kiel pura akvo, nutraĵo kaj vakcinoj, igas ke ekz. en Siera-Leono la mortokvanto de malpli-ol-5-jaraĝaj infanoj estas je 316 el 1000 vivnaskitoj dum en Japanujo ĝi estas apenaŭ je 5 el 1000. La naskiĝanta socia epidemiologio ankaŭ substrekas i.a. la fakton ke, krom la efiko sur la infektaj malsanoj kiuj restas precipe gravaj en la malriĉaj landoj, en aliaj pli evoluintaj socioj kun aliaj kaŭzoj de sanperdo kiel la netransdoneblaj malsanoj (hipertensio, korarteria streĉiĝo, cerbarteria ikto, kancero), la akcidentoj kaj mensosanaĵoj problemoj (deprimo, droga kaj alkohola trouzoj, ktp), la plej grava faktoro kiu determinas la homgrupan sanstaton estas la relativa ekonomia malegaleco inter la diversaj sociaj tavoloj, kiu ju pli granda, des pli detruifika sur la sociaj interligiteco kaj solidareco, kio siaflanke kreas la kolektivajn kondiĉojn por la sanperdo (manko de fido al aliuloj, izoliteco, streĉiĝo, ktp). La Monda Organizo pri Sano ĵus starigis altrangan Komision pri la Sociaj Determinantoj de la Sano por studi kaj proponi publikajn politikojn cele al la plibonigo de la sano mondscale, per la alstrebo al socia justeco, homaj rajtoj kaj daŭropova evoluigo.

Inequality in health and its social determinants

José Antonio Vergara

Just like other indicators of the health status of a community (such as infant mortality, self-perceived health and welfare, etc) life expectancy, or the length of life expected at birth, the worldwide highest and lowest values of which are in Japan (81.9 years) and in Sierra Leone (34 years), shows the existence of great inequalities in health between countries and also within individual societies. The usual tendency has been to explain these differences and changes in the epidemiological profile in terms of factors such as access to medical care and isolated risk factors such as genetic inheritance, age, behaviour and other individual characteristics (smoking, obesity, blood pressure, cholesterol level, etc).

However, in recent years the research area of population health has revealed that the striking variation between different populations, such as between developed and poor countries, is a result of the effect of the social environment (education, working conditions, social and economic relations, living conditions, social exclusion, etc) in which people develop.

This new perspective on the social determinants of health is not restricted to the realisation that the persistent, or even worsening, poverty in various regions of the world, which is a result of the lack of basic necessities such as clean water, food and vaccinations, means that in, for example, Sierra Leone the mortality rate of children under 5 years old is 316 per 1000 live births while in Japan it is just 5 per 1000. The emerging social epidemiology also emphasises that, besides the effect of infectious diseases, which continue to be of primary importance in poor countries, in other more developed societies with other causes of health loss such as non-infectious diseases (high blood pressure, cardiovascular disease, stroke, cancer), accidents and mental health problems (depression, drug and alcohol abuse, etc), the most important factor in determining community health is the economic inequality between social classes, and the greater this inequality the more destructive it is of social cohesion and solidarity, which in turn creates the collective conditions for loss of health (lack of trust in other people, isolation, stress, etc). The World Health Organisation has recently set up a high-level Commission on Social Determinants of Health to examine and propose public policies

with a view to improving global health by striving for social justice, human rights and sustainable development.

Les inégalités en matière de santé et leurs déterminants sociaux.

José Antonio Vergara

A l'instar d'autres indicateurs de l'état sanitaire de groupes humains (comme la mortalité infantile, la perception que l'on a de sa santé et de son bien-être, etc.), l'espérance de vie ou la durée de vie attendue à la naissance, ayant respectivement au Japon (81,9 ans) et en Sierra Leone (34 ans) le plus haut et le plus bas niveau du monde, montre l'existence de grandes inégalités en matière de santé entre les pays et aussi au sein de diverses sociétés en elles-mêmes. On avait coutume d'expliquer ces disparités et changements du profil épidémiologique par des éléments tels que l'accès aux soins médicaux et des facteurs de risque isolés comme l'hérédité, l'âge, les comportements et autres traits individuels (tabagisme, obésité, hypertension, taux de cholestérol, etc.).

Cependant, ces dernières années, le champ des études sur la santé des populations a mis en évidence le fait que les disparités sociales criantes dans la comparaison entre diverses populations, comme par exemple entre les pays développés et les pays pauvres, résultent de l'effet du milieu social (éducation, conditions de travail, relations sociales et économiques, conditions de logement, exclusion sociale, etc.) dans lequel évoluent les hommes.

Ces nouvelles perspectives sur les déterminants sociaux de la santé ne se limitent pas à la compréhension du fait que la pauvreté persistante, et même croissante en diverses régions du monde, faute de pouvoir subvenir aux besoins vitaux élémentaires comme l'eau pure, la nourriture et les vaccins, a pour conséquence que, par exemple, en Sierra Leone le taux de mortalité des enfants de moins de 5 ans est de 316 pour 1000, alors qu'au Japon il se monte à peine à 5 pour 1000. L'épidémiologie sociale naissante souligne aussi, entre autres, le fait que, outre l'effet sur les maladies infectieuses qui restent surtout importantes dans les pays pauvres, dans d'autres sociétés plus évoluées avec d'autres causes de perte de santé comme les maladies non contagieuses (hypertension, maladies cardio-vasculaires, congestion cérébrale, cancer), les accidents et problèmes de santé mentale (dépression, abus de drogues et d'alcool, etc.), le facteur le plus important qui détermine l'état sanitaire d'un groupe humain est l'inégalité économique relative entre les différentes couches sociales, qui est d'autant plus destructrice pour le lien social et la solidarité qu'elle est plus grande, ce qui à son tour crée les conditions collectives pour la perte de la santé (manque de confiance envers les autres, isolement, stress, etc.). L'Organisation Mondiale de la Santé vient de créer une haute Commission sur les Déterminants Sociaux de la Santé pour étudier et proposer des politiques publiques visant à l'amélioration de la santé à l'échelon mondial, par un effort vers la justice sociale, les droits de l'homme et le développement durable.

(Japania resumo)

日本人が81.9歳まで長生きするのに、シエラレオーネの人たちは34歳までしか生きられないのはなぜか？ 健康の不平等とそれを決定する社会的因子について

人間集団の健康状態についてのさまざまな指標（幼児死亡率、健康と保健状況の自己認識、など）について言えることだが、平均寿命（出生時の平均余命）について世界最長が日本の**81.9歳**、最短がシエラレオーネの**34歳**という大差があることは、各国の間で、また個々のさまざまな社会の内部でも、健康に関しての大きな不平等が存在していることを示している。従来は、このような疫学的なプロフィールの差や変化を、医療システムへのアクセスの難易度の差や個々のリスクファクター、たとえば遺伝子、年齢、行動様式、その他の個人的特徴（喫煙、肥満、血圧、コレステロール値など）の差で説明するのがふつうであった。

しかし、近年は集団保健学の研究分野において、さまざまな母集団間、たとえば先進国と貧困国との間の比較で見られるおどろくべき社会的な変異は、人々が成長発達の過程で経験する社会的環境（教育、労働条件、社会的・経済的関係、居住条件、社会的排除など）の差の結果として起こってくるという事実が明らかにされてきている。

健康の社会的決定因子についてのこのような新しい展望は、次のような状況の理解をもたらす。つまり、世界のさまざまな地域における、持続的な、むしろ悪化しつつある貧困のため、飲料水や食料やワクチンのような生活必需品が不足し、たとえばシエラレオーネでは**5歳未満児の死亡率が、生産児1000人中316人に達するの**に、日本では**1000人中5人**足らずであるという状況である。しかし、この展望が明らかにするのはこの点だけではない。今生まれつつある社会疫学が強調するのは、貧困国では現在もまだ特に重要である感染症、またより進んだ社会では非感染症（高血圧、心臓血管系のストレス、脳卒中、癌）や事故、精神保健的諸問題（うつ病、薬物・アルコール多飲など）による健康喪失に社会が影響してばかりでなく、人間集団の健康状態を規定するもつとも重要な因子が各種の社会層の間の不平等であるということである。この不平等が大きければ大きいほど、社会的結びつきと連帯とに対しての破壊的効果は大きい。そして、このような社会的連帯の破壊はさらに、他人への信頼の欠如、孤立、ストレス、等によって集団的な健康喪失の原因ともなるのである。世界保健機関は、社会的正義、人権、持続可能な発展によって世界的な規模で健康を向上させることをめざす公共政策を研究し提案するために、最近高いレベルの「健康の社会的決定因子に関する委員会」を発足させている。

Kial japanoj vivas 81,9 jarojn kaj siera-leonanoj nur 34? Malegalecoj je sano kaj ties sociaj determinantoj

José Antonio Vergara

Ĉe la sanosciencoj, oni ĝenerale trovas grandan interesiĝon pri la genetikaj bazoj de la malsanoj, kaj do estas plene hegemonia la esplorado pri la interago trovebla inter la genetica predispozicio kaj la individuaj elmetoj por klarigi la malsimilojn je sano/malsano inter individuoj, kiel ekzemple la sukcesintaj esploroj pri la rilato inter fumado kaj pulma kancero. Tamen krom tio, dum la lastaj jaroj la esplorkampo pri populacia sano videbligis la fakton ke la frapa socia gradovario ĉe la komparado inter diversaj socioj je sanstatoj kaj malsanoj, kiel ekz. inter evoluintaj kaj malriĉaj landoj, kaj ene de unuopaj landoj, rezultas el la efiko de la socia medio (edukado, laborkondiĉoj, sociaj kaj ekonomiaj rilatoj, loĝkondiĉoj, socia ekskludo, ktp) en kiu la homoj disvolviĝas. La vojoj efiki sur la sanon de tiuj sociaj determinantoj ne ĉiam estas simplaj kaj do facile diveneblaj, kaj ankaŭ ili kutime ne estas disigeblaj laŭ la modelo de la apartaj riskofaktoroj: la fakto esti malriĉa virino sen sufiĉa edukiteco en iu malriĉa lando el Afriko aŭ Azio starigas vivospertojn kaj ŝancojn por la sano kiuj ne estas facile atribueblaj al iu unuopa trajto sed al la tuto.

Pri tiu esprimo de la socia medio oni rimarkis jam antaŭ kelkaj jardekoj ke kiam homgrupoj ŝanĝas ĝin okazas ankaŭ ŝanĝoj je la ofteco de malsanoj. Ekzemple iuj esploroj pri japandevenaj homoj loĝantaj respektive en Japanujo, Havajo kaj Kalifornio montris ke ju pli la japanoj migris tra la Pacifika Oceano, des pli alta ĉe ili la incidenceco de korarteria malsano kaj malpli alta tiu de cerboarteria ikto.

Do, samkiel aliaj indikiloj pri homgrupa sanstato (i.a. infana mortokvanto, memperceptitaj sano kaj bonfarto, ktp), la vivo-espero aŭ atendata vivodaŭro je nasko, havanta respektive en Japanujo (81,9 jaroj) kaj Siera-Leono (34 jaroj) la plej longan kaj mallongan nivelojn en la mondo, frape montras la ekziston de grandaj malegalecoj je sano inter la landoj kaj ankaŭ ene de diversaj unuopaj socioj. Kiel dirite, laŭ la kutimaj hipotezoj pri la kaŭzoj de la malsanoj ĉe individuaj uloj, oni emis klarigi tiujn malsimilecojn kaj ŝanĝojn de la epidemiologia profilo per elementoj tiaj kiaj la alirebleco al medicina flegosistemo kaj izolitaj riskofaktoroj kiel gena heredo, aĝo, konduto kaj aliaj individuaj trajtoj (fumado, dikeco, sangopremo, kolesterolo-nivelo, ktp). Sed nun oni povas diri ke nek la sansistema kuracado nek la genetiko nek apartaj riskofaktoroj povas klarigi kial kelkaj landoj estas pli sanaj ol aliaj, ekzemple laŭ la plilongiĝo de la vivo-espero. Tiuj diferencoj inter la sanstato de tutaj socioj ne rezultas el la efiko de la simpla sumado de kondukataj riskofaktoroj kiel tabakouzo, korpa ekzercado kaj manĝado, sed el la naturo de la socia kaj ekonomia vivo. Tial, la faktoroj kiuj igas iujn sociojn kaj iujn sociajn grupojn pli sanaj kompare al aliaj povas esti tute malsimilaj al la faktoroj kiuj permesas klarigi la malsimilecojn inter sanaj kaj malsanaj individuoj ene de la sama socio.

Je la komparado inter landoj, ne eblas dubi ke la fakto esti malriĉa ligiĝas al malalta vivo-espero. La rilato inter la pokapa Malneta Enlanda Produkto (MEP) kaj la atendita vivodaŭro ŝajnas tute klara, aparte ĉe la malriĉaj landoj. Eĉ malgrandaj pliboniĝoj de la MEP kaj de la vivkondiĉoj esprimiĝas per relative gravaj altiĝoj de la vivo-espero. Tio facile kompreneblas pro la kerna rilato inter malriĉeco, malsato kaj infektaj malsanoj, kiuj siaflanke ŝarĝigas la socion per mortoj de novnaskitoj, infanoj kaj patrinoj (tiuj lastaj antaŭ, dum aŭ post la akuŝo). Tamen, post kiam la ekonomia disvolviĝo trapasas la sojlon certigi al la plejparto la bazajn materiajn kondiĉojn por la homa vivo, la epidemiologian transiron difinas la malgraviĝo de la infektaj malsanoj favore al la kanceraj kaj aliaj netransdoneblaj malsanoj en la rolo esti la plej

gravaj mortokaŭzoj. Tamen, la t.n. “malsanoj de la riĉeco” fariĝas la malsanoj de la malriĉuloj en la evoluintaj socioj. Ekzemple, de longe oni pensis ke la korarteria malsano estas tipe ligita al la homtipo direktoroj de grandaj komercaj aŭ industriaj firmaoj, kies altfinanca aŭ merkata responsecio estis sufiĉe streĉiga, sed oni trovis ke, post kiam la infektaj malsanoj fariĝis malpli gravaj, la mortokvanto pro tiu malsano laŭ grado de laborposteno estis inverse ligita: ju pli malalta grado, des pli alta risko. La plej altan riskon havis senlaboruloj.

Tiu nova perspektivo pri la sociaj determinantoj de la sano ne limigas sin al la kompreno ke la persista, eĉ pliprofundiganta malriĉeco en diversaj regionoj de la mondo, pro manko de bazaj vivobezonaĵoj kiel pura akvo, nutraĵo kaj vakcinoj, igas ke ekz. en Siera-Leono la mortokvanto de malpli-ol-5-jaraĝaj infanoj estas je 316 el 1000 vivnaskitoj dum en Japanujo ĝi estas apenaŭ je 5 el 1000. La naskiĝanta socia epidemiologio ankaŭ substrekas i.a. la fakton ke, krom la efiko sur la infektaj malsanoj kiuj restas precipe gravaj en la malriĉaj landoj, en aliaj pli evoluintaj socioj kun aliaj kaŭzoj de sanperdo kiel la netransdoneblaj malsanoj (hipertensio, korarteria streĉiĝo, cerboarteria ikto, kancero), la akcidentoj kaj mensosanaĵoj problemoj (deprimado, droga kaj alkohola trouzoj, ktp), la plej grava faktoro kiu determinas la homgrupan sanstaton estas la relativa ekonomia malegaleco inter la diversaj sociaj tavoloj, kiu ju pli granda, des pli detruifika sur la sociaj interligiteco kaj solidareco, kio siaflanke kreas la kolektivajn kondiĉojn por la sanperdo (manko de fido al aliuloj, izoliteco, streĉiĝo, ktp).

Tiel do, ne estas la absoluta malriĉeco kiu estas la plej detrua, sed laŭ la hipotezo pri relativa enspezo, estas la dispartigo de la enspezo kio pli gravas por la populacia sano ol la absoluta enspezonivelo. Ju pli egaleca estas iu lando, des pli sana. La mekanismoj per kiuj tiu malegaleco efikas sur la sanon rilatiĝas al diversaj mekanismoj kiuj malfortigas la kvaliton de la socia vivo. Fakte, kiel iu skribis, la “nevidebla mano” de la merkato minacas subfosi la “nevideblan koron” de la zorgo al aliaj homoj, la valoroj de reciprokeco kaj devo kiuj tenas niajn familiojn kaj komunumojn kune.

Kelkaj psikologoj trovis ke eĉ la deziro por pli granda kvanto da mono kaj konsumado kondukas al malfeliĉeco. Ekzemple, estas esploroj kiuj montras ke uloj kiuj strebas al neesence orientitaj celoj kiel financa sukceso, famo, agnosko kaj alloga aspekto (do, tiuj personoj por kiuj la admirado kaj ŝatado flanke de aliuloj estas la fonto de bonfarto) estis pli probable deprimiĝintaj, malpli feliĉaj kaj pli ofte suferis kapdoloron kaj aliajn simptomojn, ol uloj orientitaj al esencaj celoj, nome persona disvolviĝo per bonaj, agrablaj rilatoj kun familianoj kaj amikoj, kaj plibonigado de la mondo per socia agado. Eĉ pli, la unua grupo havis pli grandan probablon engaĝiĝi en detruaj kaj neutilaj kondutoj kiel fumado kaj daŭra rigardado al televido. Ĝuste, kelkaj el la plej gravaj minacoj al la sano de la personoj en riĉaj socioj estas la troa konsumado de diversaj aĵoj, nome manĝokalorioj, ruĝa kaj grasa viando, alkoholo, tabako, ktp.

La malegalecoj je sano en kaj inter la landoj estas profunde signifohavaj por publika sano kiel fako kaj organizita praktiko, tiel por kompreni la fundajn kaŭzojn de la homgrupaj sanproblemoj kiel por konfronti la rezulton de tiuj malegalecoj. La Monda Organizo pri Sano ĵus starigis altrangan Komision pri la Sociaj Determinantoj de la Sano por studi kaj proponi publikajn politikojn cele al la plibonigo de la sano mondscale, per la alstrebado al socia justeco, homaj rajtoj kaj daŭropova evoluigo. Estas pruvite ke la kvalito de la socia vivo, kerne ligita al la grado de enspeza egaleco, estas unu el la plej gravaj determinantoj de la sano. Japanujo estas kaj riĉa kaj ne tiom malegaleca lando, kaj ŝajne havas fortan socian interligitecon, kaj eble tial ĝi atingis tiom altan vivo-esperon.

Geografia Informo-Sistemo (GIS) en nia vivo



SIBAYAMA Zyun'iti

Naskiĝis je 1950-01-06 en Sendai, Japanio. En 1972, Finis la teknologian fakultaton de Universitato Tohoku, en Sendai, Japanio, kaj estas diplomita inĝeniero pri elektrotekniko. Laboris de 1972, ĝis nun en la elektro-kompanio Mitsubishi (Mitsubishi Electric Corporation), Japanio, ĉefe pri la utiligo de komputiloj por bildoj, desegnaĵoj, kaj lastatempe pri mapoj. Dume, en 1995-1999, laboris por la Japana Asocio por Ciferecaj Voĵ-Mapoj (Japan Digital Road Map Association). De 2003, unu fojon semajne lekcias pri datumbazo en Universitato Tamagaŭa, en Tokio.

Kiel esperantisto, FD de UEA pri komputila kartografio, la nuna Prezidanto de Japana Esperanto-Instituto kaj de LKK de la 92-a UK en 2007. (Retejo: <http://www.h.e-mansion.com/~sibazyun/>).

Resumo

Uzo de komputiloj etendiĝis ne nur al ciferoj kaj tekstoj, sed ankaŭ al mapoj, kiuj esprimas la teron 2-dimensie aŭ 3-dimensie, kaj la sistemo uzanta geografian informon, i.a. mapon, estas nomata Geografia Informo-Sistemo, mallonge GIS. Prezentotaj estas kelkaj aspektoj de tiu sistemo, kaj konsidero pri ties apliko al nia vivo. Jen temoj aparte traktataj.

(1) La Ter-poziciado i.a. de Terglobo-Pozicia sistemo: Kio estas esenco de terpoziciado, precipe pere de la nova, satelito-dependa sistemo, kaj kio tamen malfacilas en ĝi? Tiaj aferoj estas klarigataj.

(2) Aŭtomobila navigado: Unu el la popularaj utiligoj de Terglobo-pozicia sistemo estas aŭtomobila navigado. Sed ne nur informo el la sistemo estas uzata por aŭtoj. Kaj la mapoj uzataj por la aŭtomobila navigado devas havi specialajn ecojn, tamen kiaj? Ĉu estas aliaj sistemoj por asisti aŭtomobilan navigadon? Tiaj aferoj estas klarigataj.

Geographic Information System (GIS) in our life

SIBAYAMA Zyun'iti

Use of computers expands not only to numeric and text informations, but also to maps, expressing the Earth in 2 or 3 dimensions. And a system using geographic information, especially maps, is called Geographic Information System (GIS). In this lecture, I present some aspects of such systems, considering application to our life. The treated subjects include following fields.

(1) Earth locating, using Geographic Positioning System (GPS): What is the essential techniques in the new, satellite-based system, and what problems are arising around it. Such subjects are to be discussed.

(2) Car navigation: One of the most popular use of GPS is car navigation. But cars use not only informations from GPS. What are the characteristics of maps for car navigation? What other systems are helping steering? These are the topics.

Les Systèmes d'Information Géographique (SIG) dans notre vie

SIBAYAMA Zyuniti

L'utilisation des ordinateurs s'est étendue non seulement aux chiffres et aux textes, mais encore aux cartes, qui représentent la terre en deux dimensions ou en trois dimensions, et cette spécialité se nomme Système d'Information Géographique, en abrégé SIG. Nous présenterons quelques aspects de ce système, et des considérations sur ses applications dans notre vie. Voici quelques thèmes qui seront particulièrement traités.

(1) L'application du Système de Positionnement du Globe Terrestre

Si l'on a deux compas, on peut déterminer deux points, à l'intersection des cercles. Si l'on dispose de quatre compas, on peut déterminer un point sur le globe (terrestre). C'est le principe de la mesure de la terre par satellite artificiel. Et nous expliquerons ses applications, par exemple dans le domaine de la navigation automobile et humaine.

(2) Que faut-il de nouveau pour les cartes de navigation automobile et humaine? Dans l'histoire du monde, les cartes existent depuis longtemps. Mais pourquoi ne convenaient-elles pas pour guider les conducteurs d'autos vers leur destination? Et pour guider des gens dans la rue? Un satellite artificiel ne peut suivre des gens qui passent à l'intérieur ou au-dessous d'une construction, alors comment faire? L'une des solutions réside dans la mise en trois dimensions des cartes, mais cela ne suffit pas...

(3) Les cartes tridimensionnelles: dessin ou réalité? L'un des efforts entrepris pour sortir du concept traditionnel de carte consiste à passer à trois dimensions, donc à ajouter du relief à la carte. Évidemment, la représentation bidimensionnelle de l'altitude au moyen de courbes de niveau de différentes couleurs ne suffit pas. Alors comment faire? Etc.

(Japania resumo)

暮らしの中の地理情報システム (GIS)

柴山純一

コンピュータが扱うのは数字や文字情報だけに限らず、「地図」も含まれる。地図は地球を2次元ないし3次元で表現したものである。この地理情報(特に地図)を扱うコンピュータシステムを地理情報システム(GIS)と称する。この地図と暮らしとの関係を示す。特に次のようなことを取り扱う。

(1) GPSを中心とした測地:

地上を測量すること、特に人工衛星をつかって測量することと、その際の問題点は何か、について論じる。

(2) GPSの応用で普及しているのはカーナビゲーションシステム(カーナビ)である。しかし、車ではGPSの情報のみを使うのではない。また、カーナビ用の地図は独特の性質をもっているが、それがどのようなものであるかを紹介する。また、車の運転のためのカーナビ以外のシステムも紹介する。

Geografia Informo-Sistemo (GIS) en nia vivo


SIBAYAMA Zyun'iti

La Ter-poziciado

1.1 Principoj


1.1.1 loko sur la terглоbo

“Kie vi loĝas?” --- al tiu demando, kiel vi respondas? Kutime vi diras lok-nomon. Sed se la loko ne estas konata, kiel vi faros? La plej preciza maniero estas doni “koordinaton” per “latitudo” kaj “longitudo”. Mi nur parolas pri la esenco de la tekniko de la klasika termezurado. “Latitudo estas ‘kiom da gradoj’ la loko estas klinata norden/suden de Ekvatoro. Longitudo estas ‘kiom da gradoj’ la loko estas klinata de la loko nomata Grenviĉo en Britio orienten/okcidenten. Vidu la Bildon 1.



Bildo 1. latitudo kaj

Ni komencu per cirkelo sur papero. Se fiksa pinto de cirkelo estas sur konata koordinato, la lokuso, nome la desegnita cirklo, lokiĝas je certa distanco de la centro, kiel vi vidas maldekstre de Bildo 2. Tiel, per du cirkeloj vi konas du punktojn, kruce de la du cirkeloj. Per tri cirkeloj, unu punkto estas konata (Bildo 2 dekstre). Sed nun temas pri terглоbo, 3-dimensia objekto, kvar cirkeloj estas bezonataj. Kaj, ĉar la preciza pozicio de geodeziaj artefaritaj satelitoj estas konata, per tio vi konas la lokon.



Bildo 2. Identigo de loko per cirkeloj


Tiel, 4 satelitoj estas minimumo, kaj ĉar pli ol 24 satelitoj usonaj flugas ĉirkaŭ la terглоbo, la loko estas teorie kaptebla, kaj tiu sistemo estas ĝenerale nomata la Terглоba Pozicia Sistemo,

kies anglalingva siglo estas GPS (de Global Positioning System). La cirkelo donas longon, sed okaze de satelito, longo estas donata per la mezurado preciza de la tempo-diferenco de la elektromagneta ondo. Nome la ondo, same kiel lum-ondo iras je la konstanta rapideco je ĉ. 300 mil kilometroj en sekundo.

Sed estas ekartoj, nome diversaj eraretoj, 5 aŭ 6 satelitoj necesas por poziciado. Fakte, en la komencaj jaroj, Usono, laŭ postulo de Milita Departamento, enigis arbitrajn ‘erarojn’, por ke ne ĉiuj ondo-ricevantoj, inkluzive de latentaj malamikoj, konu la precizan pozicion. Tio tamen estis nuligita en la mezo de 1990-aj jaroj, kaj rezulte la dependeco al tiu GPS fariĝis granda. Estas mondaj potencoj, kiuj ne ŝatas riski je la usona regado, flugigis alian serion da satelitoj, nome en Ruslando. Simila projekto estas en Eŭropo kaj Japanio, finance tamen malfacila.

1.1.2 faktoroj de eraroj


Eĉ sen la supre menciitaj perturboj, la mezurado sola per la satelitoj donas eraron, ofte pli ol 10 metroj, ekzemple dank’ al la elektromagneta perturbo en la ĉielo inter la terglobo kaj satelitoj. Ĉar la perturbo estas regiona afero, ĉiuj ricevantoj de la ondo, nome ĉiuj mezuriloj estas afektataj. Unu el la manieroj kontraŭ tio estas nomata ‘diferenco-kompensa metodo’. La bildo 3 montras la principon; En iu regiono estu metata elektro-onda stacio kun precize konata loko, kaj se tiu stacio ricevas eraran rezulton, la diferenco de la preciza valoro kaj la eraro estas radie dissendata, kaj la terpozicia mezurilo, kiu fakte enhavas antenon por ricevi satelitan radio-elsendon, ricevas tiun kaj kompensas la diferencon. Per tiu metodo, ĝenerale la eraro estas malpli ol dek metroj en radie bone priservata regiono.



Bildo 3. Diferenco-kompensa metodo


La Tergloba Pozicia Sistemo havas plurajn malfacilojn.

Grandaj urboj, precipe kun ĉielskrapaj konstruaĵoj donas problemon, ĉar barate de la konstruaĵoj, oni ne povas kapti plurajn satelitojn troviĝantaj sur la ĉielo. Kontraŭ tio, en Japanio estis planate ‘tero-statika satelito’. Nunaj satelitoj rondiras la terglobon. Kontraste, tiu ‘tero-statika satelito’ rondiras la terglobon same rapide kiel la terglobo, tial sur konstanta pozicio super la terglobo statike restadu la satelito. Kaj ĉar ĝi estas preskaŭ je zenito (la loko statika), ĝi estas alinomata ‘kvazaŭ-zenita satelito’. Sed la plano bezonas multe da financa investo, ĝi nun estas malaktiva. La Bildo 4 montras la principon, kun la montrado de alia malfacilo nomata ‘tro da reflektado de radio-ondo kontraŭ la muroj de konstruaĵo’, tio tamen estas nun efike forigebla.



Unu el la aliaj malfaciloj estas, kompreneble ‘tunelo’ kaj ‘subteraj vojoj’. Sed krom tio, aŭtoj, kiuj iras rapide, esence havas malfacilon. La ricevilo ricevas radion, kaj post momento, je dekon da sekundo donas rezulton, sed tiam, aŭto jam estas en alia pozicio. Tial nun, aŭtomobiloj, plej grandnombraj klientoj de la Tergloba Pozicia Sistema en ne-milita sektoro, povas difini sian pozicion ankaŭ sendepende de la satelitoj. La nomata subsistemo estas ‘distanco-mezurilo’ kaj ‘giroskopo’. Distanco-mezurilo mezuras la rotacion de aŭtorado, kiom da metroj tiu aŭto iras. Sed kiadirekte? Tiun lastan demandon pritraktas giroskopo, speco de turbo, kiu mezuras la direkto-ŝanĝon --- esence ‘turbo rivoluanta’ rezistas kontraŭ direkto-flekso, kaj okaze de tia ŝanĝo naskas signalon. Aldone al tio, nunaj aŭtomobilaj navigadaj sistemoj kutime ekipas mapo-konformigilon. Nome, aŭto devas iri sur strato sur mapo, kaj se estas malgranda devio de strato, la simbolo sur la navigada sistemo iras nur sur la stratoj sur la mapo.


La supraj teknikoj por aŭtomobiloj estas jam establitaj, sed ankoraŭ ne establitaj estas la teknikoj por pied-irantoj, ĉar pied-iranto eniras en domon, tra kies plafono ne estas rekte rigardebla el la ĉielo. Unu el la solvoj estas meti “pseŭdo-sateliton” sur plafono de konstruaĵo, kaj eligi ondon sam-kvalitan al la satelitoj. Sed tiu solvo kostas multe, ĉar la radio-elsendo de Terglobo-pozicia satelito estas tre preciza, tial multekosta. Tial nuntempe, uzado de malpli multekosta sistemo helpe al Tergloba poziciado estas provata. Mi provizore nomu ĝin “ĉambro-pozicia sistemo”. La protagonisto estas la sistemo de Radio-Frekvenca Identigo. Nome malgranda cirkvito, enigebla en biletkarto sensas radion, kelkajn centimetrojn, aŭ kelkajn metrojn for de sensilo>(*1). Baldaŭ aperos integrita sistemo de Tergloba sistemo kaj ĉambra sistemo, mi supozas. Bildo 5 montras la esencon de Radio-Frekvenca Identigo. La maldekstre montrita “RF-etikedo” estos poste integrita en Terpozicio-mezuran sistemon.



Bildo 5 Radio-Frekvenca Identigo (La bildo dankas al s-ro *MORIKAWA Kazunori*)


1.3 Alto

En mia parolo ĝis ĉi tie, mi intence ne parolis pri ‘alto’ de iu loko. Nu, kiel estas ĝenerale mezurate la ‘alto’ (aŭ ‘alteco super marnivelo’), se de la loko ne videblas maro? La konvencia sistemo uzas akvonivelilon, nome ujeto kun akvo kun veziko, kaj se veziko lokiĝas mezmeze, la nivelilo estas metata horizontale, kaj per angul-mezurilo kaj longo-mezurilo, oni mezuras alton de la maro iom post iom, kiel desegnite en Bildo 6.



Bildo 6. Principo de alto-mezurado

La marnivelo estas, kiel vi supozas, la mezo inter la fluso kaj malfluso, sed kie? En Japanio temas pri la Golfo de Tokio. La marnivelo, ĉie en la mondo, ne estas unueca. Se estas kontinento, la tereno gravite alproksimigas akvon, kaj tial la meza akvonivelo fariĝas pli alta, nome pli fora ol la terocentro. Sed por la vivo de la popolanoj en la kontinento, tiu nivelo estas la baza. La terglobo mem estas iom pli plata ol la teoria sfero, je 1/297 malpli longa la nordo-sudo ol la oriento-okcidento, kaj tio ĉi en la ideala formo estas nomata ‘meza ovaloido’. Sed al meza ovaloido aldoniĝas la aspreco. Bildo 7 klarigas, kun troigo de la deformeco, la aferon. La asprigita formo de la terglobo estas nomata ‘geoido’.



Bildo 7. la koncepto de alto


Tiu laŭloka dependeco de alto iom malfaciligas komputadon de alto pere de Tergloba Pozicia Sistema. La absoluta pozicio de la satelito rilate al la Terglobo estas precize kalkulata, kaj tial la distanco de la satelito al la ricevilo estas preciza, sed tiu ricevilo ja estas en iu alto super marnivelo. Por tio, la komputilo ene de ricevilo-poziciilo konas la geoidan formon de la tero kaj ĝustigas la kalkulon. Ĝenerale, la precizeco de la mezurata valoro rilate la alton estas triono de la horizontalo, nome malpli preciza.

2. Aŭtomobila navigado

2.1 mapoj, teorie

2.1.1 pri komputilaj mapoj


Aŭtomobila navigada sistemo --- kun ekrano por mapo kaj kelkaj butonoj (Vidu Bildon 8 por kutima muntado) --- havas 2 ĉefajn funkciojn; (1) informi, en kiu punkto la aŭto nun estas, kaj (2) gvidi, tra kiuj vojoj oni stiru la aŭton por atingi la celon (por tio kompreneble la stiranto enigis la celon).



Bildo 8. tipa muntado de aŭtomobila navigada sistemo

En la 1-a ĉapitro, mi parolis pri tergloba pozicia sistemo, ‘distanco-mezurilo’, ‘giroskopo’, kaj mapo-konformilo. Tamen tiel konata latitudo / longitudo ne multe helpas per si mem. Ĝi devas montri sian lokon en mapo mem --- parenteze, en Usono, troviĝas maŝino sen ekrano, sed nur kun parolilo por disaŭdigi irendan vojon voĉe --- tio eblas en urboj, kie ĝenerale estas nur vojoj regule kruciĝantaj.


La elektronika mapo uzata por tiu celo estas nomata ‘vektora mapo’, kompare al la bilda mapo, enigita en komputilon per bildolegilo. Nome, stratoj kaj aliaj linioj estas desegnitaj per ‘linio’ --- tiu ĉi diro ŝajnas enhavi nenion, sed enhavas grandan sencon. Mapo, se enigita kiel bildo, kiel estas skizo aŭ foto, per ‘bildolegilo’, konsistas el aro da punktoj. Se homa okulo vidas ‘linion’, ĝi estas nur punktaro, kiel la maldekstro de Bildo 9. Estante vektoro, ĝi ne nur estas punktaro, sed estas informo, de kiu punkto al kiu punkto; tial estas facile klinigi la linion, aŭ longigi/mallongigi, kiel estas la dekstro de Bildo 9. La ŝanĝo de direkto kaj de grandeco fariĝas pli facila.



En mapoj, precipe en atlaso, oni kutime desegnas, ke Nordo estu supre. Sed por rigardi folion de mapo, oni ofte metas, ke la mapo direktiĝu same kiel la nun rigardata sceno. La elektronika mapo per vektoro ebligas tion. Precipe utila estas, ke la direkto de la literoj estu ĉiam staranta, kaj ne kliniĝanta kun aliaj desegnaĵoj.


2.1.2 per nodoj kaj ligoj

La alia karakterizaĵo por aŭtonavigadaj mapoj estas ‘la konekteco de la vojlinioj’. Supozu, ke vojoj lokiĝas, kiel dekstre de Bildo 10. Kiel oni iras de la punkto A ĝis punkto D? Oni facile diras: De A tra C al D, nome tra vojo AC kaj tra vojo CD.




Sed la afero ne tiel facilas, nur se AC, CB, CD estas vektoroj; se komputilo ne scias, ke per la punkto C, la tri vojoj estas konektitaj, oni ne povas transiri de AC al CD. En nia traktado, ni nomu “nodon”, ĉiun konekton aŭ ne-konektitan finaĵon de linioj. Kaj la linia elemento inter du nodoj estu nomata “ligo”.

Ene de komputilo, tiuj informoj estas memorataj en la formato, videbla en Bildo 11. Nome, ‘aro da ligoj’ kaj ‘aro da nodoj’ estas tabeligitaj. Tio mem ŝajnas esti normala kaj neniel malfacila. Sed iom da komputila taktiko necesas, kiam oni devas aldoni novan vojon (aŭ, malofte okazas, tamen foje oni devas forigi vojon).



Bildo 11. datumo de la ligoj kaj nodoj


Supozu, ke nova vojo T-forme aliĝas al CD je punkto E (ĝis tiam ne estis nodo tie). Kiel oni faru? Nu, por simpleco, fiksus la direkton de ligo, ke ĝi iru de la pli juna (t.e. etnombra) nodo al la maljuna --- parenteze tio tute ne rilatas al la eventuala limigita veturdirekto de aŭtoj sur la vojo ---. Tiam oni vidas, ke jam ne estas ligo CD, sed ĝi estas dividita en 2 ligoj CE kaj DE. Pri tio vidu en Bildo 12.




Bildo 12. novaj ligoj kaj datoj en la datumo

2.1.3 pri kurboj kaj “poneloj”

La supra klarigo nenion diris pri kurboj en “ligo”, nome en vojparto inter du kruciĝoj. Por tio ni zigzage esprimas vojon, kaj registras ĉiun zigzagan punkton per latitudo kaj longitudo. Sed iuj vojoj ja kurbas, ne zigzagas? Fakte, tamen aro da tre malgrandaj zigzageroj konsistigas makroskope rigardatan kurbon, kiel montras Bildo 13. Fakte, en mapo je la skalo de 1/2500, vojo kun larĝo 5-metra fariĝas 2 mm, sed kutime vojo estas pli larĝe kaj dike desegnita. Do, kio devas esti la vero? La vojcentro devas esti precize desegnita, kaj en la nuna japana kodo por mapoj, la vojcentro devas ne deĵoĝi pli ol 1,75 metrojn.



Jen neologisma ĵargono: “ponelo” --- tio estas por kune esprimi ponton kaj tunelon, farita analoge al la anglalingva ĵargono “brinell” por bridge kaj tunnel. Do ponelo estas objekto, paralela al la voj-centro, kaj formas parton de ‘ligo’. Ni esprimas en la komputila mapo ponelon kiel en Bildo 14. La enirpunkto kaj elirpunkto de ponelo estas markita per latitudo



2.2 Mapoj, praktike

En Japanio, lastatempe 3 milionoj da aŭtonavigadaj maŝinoj estas produktataj jare, ĉefe por enlanda uzo, kaj tio estas ĉ. triono de ĉiuj aŭtoj por enlanda uzo. Aliflanke, Japanio ankoraŭ estas lando kun multe da voj-konstruoj. Tial la novigo de la mapo, por novaj maŝinoj estas grava komerca afero. De nun rakontata estas kelkaj facetoj el tia industria ondo.

La bazo de la mapo estas topologia mapo de la Japana Geodezia Instituto, la ŝtata instanco, kiu liveras mapojn je la skalo de 1/25 mil. Sed la renoviga ciklo de la Instituto ne estas kohera. Kaj laŭ japana administra sistemo, ĉefaj vojoj interurbaj estas administrataj de la ŝtato aŭ de gubernio --- estas 47 gubernioj ---, instanco nomata Japana Cifereca Vojmapa Asocio sekvas konstruatajn kaj konstruitajn vojojn de la ŝtato aŭ de gubernio --- ili sume estas pli ol mil lokoj. Tiuj administrejoj provizas desegnaĵojn je la skalo 1/500, kaj tiuj desegnaĵoj eniras en ĉiujaran version de la Asocio. Kaj de tiu asocio, la mapo, en vektora formo kun nodoj kaj ligoj kiel supre montritaj, iras en la manon de diversaj mapo-produktaj firmaoj. Ili per kontrakto akiras tiun bazan informon.

La mapo-produktaj firmaoj, tamen ne kontentiĝas je tiaj informoj, ĉar la klientoj, nome la stirantoj de la aŭtoj ne kontentiĝas je tio. Kio mankas? Estas ĉefe 2 faktoroj.


- (1) Konstruaĵoj --- Vojmapoj akireblaj ja estas nur pri vojoj, kaj ne donas informon pri konstruaĵoj, kiuj pli ofte ŝanĝiĝas. Eĉ se konstruaĵo mem restas sama, la aldonaj informoj, --- nome se estas banko, nomo de tiu banko --- estas gravaj. Kaj en la nuna ekonomia sistemo, ofte firmaoj, inkluzive da bankoj, superbazaroj, benzinstacioj, aŭ eĉ la nomo de la urboficejoj ŝanĝiĝas. Tial, tiajn informojn la mapo-provizantoj aĉetas de specialistoj, aŭ mem dungas esplorantojn, kiuj jen ŝoforas, jen marŝas kaj kolektas dom-ŝildojn, korektas antaŭe enigatajn dom-nomojn.
- (2) Reguligoj trafikaj --- En japana socio, vojo estas konstruata kaj regata de la konstrua departemento, sed reguligoj trafikaj, ekzemple unu-direktigo de vojo, instalo de signaloj ktp estas afero de polico. Tial oni vizitas policejon por akiri tiajn informojn, aŭ pli ofte, mem ŝoforas kaj alĝustigas informon. Ja tiaj aferoj en Japanio estas burokrataĵoj!
- (3) Uzo de vidbendaj scenoj kaj tri-dimensiigo --- Montri scenojn, ĝuste kiel oni vidas de la aŭto-stiranto. Pri tio mi parolu en aparta subĉapitro.

2.2 mapoj, evolue

2.2.1 realigo per video

Mapo sola ofte estas malfacile komprenebla, tial estas provoj kontraŭ tio. Unu el ili estas montri la realan scenon de la irata vojo per video. Ĉar oni devas antaŭe kamerai, la metodo estas uzata ne sur aŭto mem, sed por antaŭa vojplanado.

Bildo 15 montras la skemon.




Bildo 15. kameraita sceno + pozicio (per punktoj)

En tiu sistemo, oni kameraas de aŭto la straton kaj la ĉirkaŭajn domojn, kaj tiu informo eniras en vidbendon. Samtempe, la “sono-parto” de la vidbendo estas plenigita de la informo pri la loko, kie estas la aŭto. Tiel estas, ĉar la pozicio mezurita per la Tergloba Pozicia Sistemo, fakte estas elektra signalo, kaj tiu signalo estas kodigita en “sonon”. Post veturado en la urbo, la vidbendo estas procezita, por ke sur komputila ekrano aperu samteme la kameraita sceno, kaj punkto moviĝanta sur mapo, montranta la pozicion de la veturinta aŭto. Unu el la uzo de tiu ĉi sistemo estas por trejni ŝoforon, kaj alia estas por spertigi, kiel estas la distrikto. Ekzemple, por aĉeti domon, oni anticipe dezirus scii la cirkonstancon de la urbo. Ankoraŭ alia celo estas kolekti informon pri la 3-dimensiigo de la urbo, pri kio mi tuj parolos.

2.2.2 realigo per 3-dimensiaĵo


La plej grava manko ĉe la supra kameraita sceno estas; eĉ se vi pliproksimiĝas al flanka domo, la domo ne grandiĝas. Sed en realo, la domo grandiĝas, nome okupas pligrandan parton de la ekrano. Por tiel vidigi la scenon, la domo devas havi 3-dimensian karakteron; t.e. la sceno estas kvazaŭ miniatura modelo de la realo. Estas relative (tamen nur relative) facile arbitre desegni / konstrui ion kvazaŭ “domo”, sed nia celo estas fari tian modelon, ke oni ŝoforas aŭ marŝas ĝuste en tiu urboparto. Por tio ni difinu 3 etapojn, kiel en Bildo 16.



2.2.3 akiri alton


Kiel la unua etapo, oni devas akiri alton, ne nur de la voj-surfaco, sed ankaŭ de la tegmento de domo ktp. Por tio mi prezentos 2 manierojn.

- (1) **avia fotogrametrio:** oni uzadis tiun teknikon uzantan paralakson jam por duono de jarcento. Kiel oni vidas en Bildo 17, de aviadilo oni fotas la teron, kun 60%-a duobliĝo. Iu sama konstruaĵo, ekzemple, estas trovebla en ambaŭ fotoj kun paralakso, kaj el tio oni mezuras la alton de la tegmento.




Bildo 17. aviadila fotogrametrio

(2) **avia laser-metodo:** En tiu metodo, kiel montras Bildo 18, lasera radio estas balae eligita de aviadilo, kaj el la tempo de reflektado, la distanco de la aviadilo kaj la tero estas konata. Dum (1) bezonas postan procedon post flugo, tiu ĉi metodo ne bezonas homan intervenon, kaj lastatempe uzata.



Bildo 18. lasera

Per tiu avia laser-metodo, oni akiras aŭ "teran modelon" aŭ "surfacan modelon", kiel montrite en Bildo 19. La diferenco estas, ĉu ekskluzivi domon aŭ arbon el la akirita alto, aŭ inkluzivi ilin. Por akiri mapon mem, oni ekskluzivu, sed por akiri 3-dimensian modelon oni inkluzivu. Tio dependas de kelkaj elementoj, kaj unu el ili estas ondolongo (t.e. frekvenco) de lasera ondo. Ondo de certa frekvenco trairas arbon kaj atingas la teron kaj reflektas. Sed ĉiu ondo reflektas je betona domo, tial oni devas elimini 'domon' por akiri du-dimensian mapon.



Bildo 19. du modeloj

2.2.4 konstrui kaj pentri objektojn 3-dimensie


Konstrui objektojn mem estas farate per helpo de 3-dimensiiga programo. Pri tio mi ne parolas multon ĉi tie, sed nur rememorigas, ke la modelo ne havas informon pri la koloroj aŭ aliaj karakterizaĵoj, rilate al la muro. Tial, aviadila esploro ne sufiĉas por konstrui ĉion, sed bezonata estas surtera observado. En la subĉapitro 2.2.1, mi montris sistemon por akiri videon, asociitan kun la pozicio de la videokamerao. Tio multe helpas por rekonstrui kaj farbi la muron (kun fenestroj, pordoj, dekoracioj ktp), kiel tia estas. Dume, la akirita video ne donas kompletan informon. Povas esti flanke iranta aŭto, kiu kaŝas parton de muro. Tial la farado de la muro, kiel tio aspektas, estas ankoraŭ ne tute komputiligita laboro.

Por 3-dimensia modelo por stirantoj, precipe gravas informo, je kiu vojo oni turniĝu. Precipe en aŭtoŝoseoj, tia informo aperas tabule super vojo, kaj estas inde refari tiajn tabulojn ene de la 3-dimensia modelo. Por tio gravas la enhavo, enskribita teksto sur la tabulo. Tial tiaj informoj estas ankaŭ akiritaj pere de video.


2.3 aŭtovojoj kaj aŭtoj, evolue

Ne nur mapoj sur aŭto evoluas, sed ankaŭ vojoj, precipe aŭtovojoj.

Jam populariĝis en Japanio estas t.n. “pag-kolekta sistemo” --- en Japanio, estas principe ĉiuj aŭtoŝoseoj postulas pagon. Anstataŭ pagi kontante aŭ eĉ kreditkarte ĉe budo en enirejo/elirejo al la tarifataj ŝoseoj, la sistemo ebligas aŭtomatan elpagon de la sumo el de la konto de la portanto de “pag-kolekta maŝino” ĉe la aŭto. Bildo 20 montras la skemon de tiu sistemo, nomata “ETC”, el la anglalingva akronimo “electronic toll collection” (elektrona pag-kolekto). En la sistemo, malgranda anteno en aŭto kaj anteno ĉe enirejo/elirejo de la tarifita vojo interkorespondas kaj aŭtomate subtrahas la sumon de kreditkarto de la ŝoforo.



La ŝtopiĝo trafika estas problemo, ŝajne ĉie en mondaj urboj. Sed ofte ‘informo, en kiu vojero, en kiu kruciĝo okazas ŝtopiĝo’, kaj aliaj aŭtoj, for de tiu loko, povas taŭge ĉirkaŭiri. Por tio estas sensa sistemo, kiel montras Bildo 21.



Tia sistemo, radie dissendi trafik-densan informon, el la sensiloj, jam estas multejare praktikata. La nuna evoluiga provado estas du-flanka;

- (1) La informo venu ne nur de sensilo, kiu lokiĝas je certaj voj-punktoj, sed ankaŭ de unuopaj aŭtoj. Aŭtoj irantaj mem sensas densecon, laŭ la rapido de la aŭto kaj la distanco kun la aŭto antaŭ/malantaŭ si.
- (2) La informo atingu aŭton ne pere de radio-stacio elsendanta radion vastege, sed nur al aŭtoj irantaj je iu voj-ero, por doni nur la ĉirkaŭantan informon.

Fine

Mi provis montri diversajn facetojn, tamen nur iomete, de la aferoj rilatantaj al la utiligo kaj farado de geometriaj informoj. Estas multaj rilataj temoj, kaj mi esperas paroli pri tio en aliaj okazoj.

Noto:

- (*1) RFID, Radio-Frekvenca Identigo, de Morikaŭa Kazunori, 2003, en http://mylab.ike.tottori-u.ac.jp/~mijoshi/eo-/RFID_por_EU2003.pdf

Orient-okcidenta dialogo laŭ Heidegger



Eugen Macko

Nask. (1943) Germanio-Hungario-Jugoslavio. D-ro fil., dipl. ing., jogoinstruisto. Studis konstruteknikon je la Beograda Universitato, laboris nur 3 jaron kiel konstruĝenerio en Germanio. Tuj poste studis filozofion, internacian politikon, socipsikologion je la Munkena Universitato. Ekzercas jagon ekde la infaneco, fariĝis jogoinstruisto en Munkeno pri la normoj de la (EYU) Eŭropa Jogo Unio.

Esperantiĝis pro sia ekzistencia internacieco kaj post la sperto de la etoso en la la UK de Brajtono. Membriĝis ĉe la AIS-San Marino kaj poste fariĝis asociita docento de la Akademio. Estas estrarano de la novfondita eŭropa internacia partio EDE (Eŭropo Demokratio Esperanto).

Filozofiaj verkoj en Germana lingvo, tradukitaj en Esperanto: "Limo kaj fino de la Hegela dialektiko", "La Rosenzweiga nova pensado de la dialogiko", "La ne-dialektika ontologio de Heidegger". La laboroj estas kunigitaj en unu libro sub la titolo: "Dialogiko je la fino de la dialektiko" kaj estas havebla en la libroservo de la UEA. Diversaj recenzoj, komentoj, filozofiaj, politikaj kaj socipsikaj eseoj en diversaj ĵurnaloj kaj interretaj listoj.

Resumo

En filozofiaj rondoj estas ĝenerale konata ke Heidegger influis nekutime intense la japanan modernan pensadon, eĉ pli intense ol la germanan. Multe da japanaj studentoj studis ĉe li en Marburgo kaj poste en Freiburg, de kiuj estiĝis kelkaj gravaj filozofoj kaj profesoroj je la Universitato de Kyoto.

Estus interese pripensi la demandojn: kial havis Heidegger pli grandan influon en Japanio ol en Eŭropo? Ĉu la japanoj helpe de la propra tradicio pli bone komprenas la novan dialogikan kaj ontologian pensadon? Ĉu la agresiv-dialektika persvadmaniero de la

eŭrop-klasika pensado malhelpas sperti la nuntempe fundamentajn problemojn de la homaro?

Por serĉi respondojn al tiuj demandoj, la prelego sekvas la dialogon de Heidegger kun lia japana studento kaj provas tiri kelkajn konsekvencojn por ankoraŭ tiam kaj nuntempe ĉiam pli aktuala kaj necesa orient-okcidenta dialogo. Kiel la japana "nur" studento de Heidegger post kelkaj vortŝanĝoj tuj kapablas enmergiĝi en la dialogo, kie Heidegger solvas unue la duflankan kontraŭstarecon de profesoro kaj studento kaj alie la kontraŭstarecon de du kulturoj, per la alpreno de la pozicion de la aliulo, evitante tiel la kontraŭstarecon de iu dialektika persvadarto, fluiĝinte tiel la interŝanĝon. Tion tuj kompreninte ankaŭ la studento, disvolviĝis unuece ekzempla dialogo ĝenerale inter du homoj kaj inter du tre foraj, sed fine homece tamen tre proksimaj kulturoj de la oriento kaj okcidento.

Post la ekzemplo de tiu dialogo ni devus ĝenerale pridemandi la povon kaj kapablecon nur per la eŭrop-dialektika persvad-pensmaniero dialogi, kaj montriĝas la neceseco lernante de aliaj kulturoj ripari tiun deficiton.

En la nuntempaj spertoj ĉiam pliiĝas la ekkono pri la pli rapida evoluo, kun pli granda sintez-kapableco de la orientaj kulturoj, antaŭ de la malrapidiĝinta kaj ofte stagnanta evoluo de la eŭropaj. La iama pluevoluo de diversaj eŭropaj kulturoj en dialogoj sur kaj kun aliaj kontinentoj (ekz. Ameriko) jam postlasis la aktualecon al la dialogikeco kun orientaj kulturoj.

Orient-okcident-dialogo laŭ la pensmaniero de Heidegger

Y. Yuasa diris: "Estas ĝenerale konate ke Heidegger havis grandan influon al la pensmaniero en Japanio, pli grandan ol en Germanio."

La demando estus interesa: Kial?

Mi provas serĉi kelkajn respondojn en la fama dialogo de Heidegger kun lia japana studento kaj tiel samtempe apogi mian tezon ke: "La pensado de Heidegger en sia profundece estas nur dialogike komprenebla."

1. Por orienta pensmaniero estas, grandparte pro la influo de Budhismo, pli facile komprenebla kion Heidegger volas diri je la limo de la eŭropa idealismo kun la liberiĝo de la pensado el la ĝeno de la aĵoj.

2. La dialogo de Heidegger kun lia japana studento, estas ĝis tiam nekonata filozofie profunda dialogo inter orienta kaj okcidenta pensmaniero. Bedaŭrinde Heidegger pro lia jam tiam alta aĝo tiusence ne plu povis evolui. Sed li donis iniciadon al kelkaj postaj provoj, kiuj restis aktualaj ĝis en nia estanteco.

East-West dialogue in Heidegger's thinking

Eugen MACKO

In philosophical circles it is generally acknowledged that Heidegger had an extraordinary influence on modern Japanese thought, even more than on German thought. Many Japanese students studied with him in Marburg and later in Freiburg, among them several important philosophers and professors at Kyoto University.

It would be interesting to consider the following questions: Why did Heidegger have a greater influence in Japan than in Europe? Did the Japanese with the help of their own tradition better understand the new dialogical and ontological thinking? Is the aggressively dialectical manner of persuasion in classical European thought an obstacle to experiencing today's fundamental problems for mankind?

In seeking answers to these questions, this paper follows Heidegger's dialogue with his Japanese student and tries to discover the implications for East-West dialogue, which was relevant and necessary even then and is all the more so today. How Heidegger's Japanese "mere" student after a few exchanges of words is immediately able to immerse himself in the dialogue in which Heidegger resolves first the bilateral opposition of professor and student and then the opposition of two cultures by adopting the other's position, thereby avoiding the opposition of a dialectical manner of persuasion, thus making the exchange more fluid. The student, too, understood this immediately and an exemplary dialogue developed in harmony between two people and between two distant, and yet in human terms very close cultures of East and West.

Following the example of that dialogue we should in general question the possibility and capability of engaging in dialogue using only the European dialectical manner of persuasion; it shows the necessity of repairing that deficit by learning from other cultures.

In present experience there is a growing awareness of the faster development, with a greater ability to synthesise, of Eastern cultures, compared with the slowing development and often stagnation development of cultures in Europe. The former development of various European cultures in dialogues in and with other continents (America, for example) has already lost its currency to the dialogicality with Eastern cultures.

Le dialogue orient-occident selon la pensée de Heidegger

Eugen MACKO

Dans les cercles philosophiques il est généralement connu que Heidegger a influencé avec une intensité inhabituelle la pensée japonaise moderne, de façon plus intense même que la pensée allemande. De nombreux étudiants japonais ont suivi ses cours chez lui à Marbourg et ensuite à Fribourg, dont sont issus quelques grands philosophes et professeurs de l'Université de Kyoto.

Il serait intéressant de réfléchir aux questions: Pourquoi Heidegger a-t-il eu une influence plus grande au Japon qu'en Europe? Les Japonais, grâce à leur propre tradition, comprennent-ils mieux la nouvelle pensée dialogique et ontologique? L'art de persuader dialectiquement agressif de la pensée classique européenne empêche-t-il d'être confronté aux problèmes fondamentaux actuels de l'humanité?

Pour chercher des réponses à ces questions, la conférence suit le dialogue de Heidegger avec son étudiant japonais et tente de tirer quelques conséquences pour un dialogue orient-occident déjà à l'époque et encore aujourd'hui toujours plus actuel et nécessaire. Comment le « simple » étudiant japonais de Heidegger, après quelques adaptations de

vocabulaire, est-il immédiatement capable de se plonger dans le dialogue, où Heidegger résout d'une part l'opposition bilatérale entre professeur et étudiant et d'autre part l'opposition de deux cultures, en adoptant la position de l'autre, évitant ainsi l'opposition d'un quelconque art de la persuasion dialectique, rendant ainsi l'échange plus fluide? L'étudiant ayant lui aussi d'emblée compris cela, il se développa un dialogue exemplaire par son homogénéité entre deux hommes et entre deux cultures de l'orient et de l'occident très éloignées, mais finalement tout de même humainement très proches.

Après l'exemple de ce dialogue nous devrions de façon générale nous interroger sur le pouvoir et la capacité de dialoguer par le seul moyen de la pensée argumentative dialectique européenne, et, en apprenant des autres cultures, apparaît la nécessité de combler ce déficit.

Dans les expériences actuelles on s'aperçoit de plus en plus de l'évolution plus rapide, avec une plus grande capacité de synthèse, des cultures orientales, par rapport à l'évolution en perte de vitesse et souvent stagnante des cultures européennes. L'évolution que jadis ont connue diverses cultures européennes par le dialogue sur et avec d'autres continents (ex. l'Amérique) a désormais laissé place au dialogue avec les cultures orientales.

Le dialogue orient-occident selon la pensée de Heidegger

Y. Yuasa a dit: « Il est généralement connu que Heidegger a eu une grande influence sur la pensée japonaise, plus grande même que sur la pensée allemande. »

La question serait intéressante: Pourquoi?

J'essaie de chercher quelques réponses dans le célèbre dialogue de Heidegger avec son étudiant japonais et ainsi d'étayer par la même occasion ma thèse: « La pensée de Heidegger dans sa profondeur n'est compréhensible que de façon dialogique. »

1. Pour le mode de pensée oriental il est, en grande partie à cause de l'influence du bouddhisme, plus facile de comprendre ce que Heidegger veut dire à la limite entre l'idéalisme européen et la libération de la pensée de la gêne des choses matérielles.

2. La dialogue de Heidegger avec son étudiant japonais est un dialogue philosophiquement profond, jusqu'alors inconnu, entre les modes de pensée oriental et occidental. Malheureusement Heidegger, à cause de son âge déjà avancé, ne pouvait plus évoluer dans ce sens. Mais il est à l'origine de quelques tentatives ultérieures qui sont restées d'actualité jusque dans notre présent.

ハイデッガーの思想による東西対話

哲学者の間では、日本の現代哲学にハイデッガーの影響が強く現れていることが知られており、ドイツにおけるよりもその影響が著しいさえ言われるほどである。多くの日本の留学生がマールブルク、そして後にはフライブルクのハイデッガーのもとで学び、なかには著名な哲学者となり、京都大学で教鞭を取るようになったもいた。

なぜハイデッガーはヨーロッパよりも日本で影響力を持ったのか。この問いを考えるのは興味深いことである。日本人はその伝統のおかげで、ハイデッガーの対話学的で存在論的な思考をよりよく理解できるのか。ヨーロッパの伝統である弁証法的な論証方法は、人類が今日抱えている根本的な問題を経験する妨げになっているのだろうか。

これらの問いに対する答えを求めて、本講義ではハイデッガーと彼の日本の弟子との対話を紹介し、今日においても切実に必要とされている東西対話の必要性についてのいくつかの結論を導き出す。どのようにしてハイデッガーの弟子の一人に過ぎない日本人は、いくつかの単語に手を加えただけですぐに対話に入り込んでいくことができるのか。この対話において、ハイデッガーはまず教える側と教わる側という二面的な対立を、他方では二つの文化の対立を解消させる。それは他者の立場を取ることで行われ、弁証法的な論証方法の抱える矛盾を回避し、交流の流動化が図られる。弟子の側も即座にこのことを理解することによって、二人の人間のあいだ、そして二つの遠く隔たっている、しかし最終的には人間的にとっても近い、東西文化の間で対話が展開されることになる。

以上のような対立を例として、我々はヨーロッパ的な弁証法的論証方法によってのみ対話しようとするものの可能性に疑問を投げかけざるを得なくなる。そして他の文化から学ぶことによってこの欠陥を正す必要性が明らかになる。

今日の経験によれば、東洋文化の持つ総合能力のおかげでより急速な発展が可能になっていることがますます認識されるようになってきている。これはヨーロッパの文化の発展が鈍化し、停滞しつつあることと対照的である。かつてヨーロッパの文化が他の大陸（例えば、アメリカ大陸）の文化との対話の上に発展してきたことを考えれば、東洋文化との対話の今日的意義は明らかであろう。

ハイデッガーの思想による東西対話

湯浅康雄は述べている。ドイツよりも日本でハイデッガーが強い影響力を与えてきたことは広く知られている、と。

なぜそうなのかという問題は、興味深いものである。

私はそのための答えを、ハイデッガーとその日本からの留学生の間で交わされた対話に求めたい。そして同時に、ハイデッガーの思想は対話学的にのみ理解可能であるという私の主張を根拠づけたいと思う。

1. 東洋的な思考方法には、主に仏教の影響のため、ハイデッガーが指摘しているヨーロッパの観念論の限界、もの的発想からの脱却がより容易に理解されるのである。

2. ハイデッガーの対話は、東西思想間においてそれまで知られることのない哲学的に深遠な対話である。ハイデッガーは当時すでに高齢であったため、残念ながらその成果を発展させることはできなかった。しかし彼をきっかけとしていくつかの試みが行われることになり、その意義は今日でも失われてはいない。

Orient-okcident-dialogo laŭ la pensmaniero de Heidegger

Eugen MACKO

1. Enkonduko

Nuntempe oni multe aŭdas pri dialogoj. Preskaŭ ĉiu volas dialogi; geedzoj inter si kaj kun la infanoj, kolegoj en la laborejoj, ŝtatoj, kulturoj, mondpartoj, ktp., eĉ iamaj malamikoj faris la sperton, ke pli bone estas dialogi ol batali.

Sed nur malmultaj starigas la demandon: kio estas dialogo kaj kiel dialogi?

Fakte apartenas al la fako filozofio tiujn demandojn pli profunde pripensi, de kie la enhavo aperas publike nur prokraste, precipe post la realaj spertoj de la necesaj solvoj.

Tiel okazas nuntempe kun la dialogika filozofio. Ni spertas la necesecon de la dialogoj, (ĉar alie ne plu povas funkcii kaj evolui nia mondo, nur stagni), sed niaj spertoj ankoraŭ ne sufiĉas por vera dialogo.

Por ion lerni tiurilate, ni povas serĉi ekzemplojn jam el la historio kaj ankaŭ trovi uzeblan materialon kaj manieron kiujn indas eĉ pluevoluigi. Unu el tiuj estas ĝenerale la pensmaniero de la filozofo Martin Heidegger kaj speciale lia konata dialogo kun sia japana studento.

Eble estas utile antaŭ la prezentado de tiu konkreta dialogo atentigi pri la diferenco inter la dialogiko kaj dialektiko, (kiuj ankoraŭ nun estas plej ofte samkomprenataj) ke, dialogo ne estas dialektika persvado, kiel ĝi estas plej ofte ĝenerale sammetita. Ene de la branĉo de la filozofio estas jam konate ke la eŭropa idealismo atingis sian limon en la dialektiko kaj mem jam komencis la elturniĝon al la elirvojo el sia memturniteco, dialogike.

Al tiu ne-dialektika „nova pensado“ apartenas ankaŭ la filozofio de Heidegger.

Nun mi ne volas prelegi pri la dialogika filozofio, sed montri nur ekzemplan provon en la dialogo de Heidegger, per sia pensmaniero, komenci profundan dialogon inter diversaj kulturoj. Tiu dialogo estas unu el gravaj ekzemploj, por ne nur supraĵa, sed la provo, de profunda dialogo inter eŭropa kaj orienta (tiu kaze japana) kulturo.¹

Heidegger montras tie la eblecon de „kiel“-maniero, aliri por la eŭropa kompreniĝo al iu ĝis nun tute fremda kaj ne alproksimiĝebla sinteno kaj pensmaniero, ekz. en la graveco de gestoj, mimikoj kaj senvoĉaj signoj por la esploro de la lingvoj. Ĉar la gestoj estas pli longe protektataj en orientaj kulturoj, pro tio de tie eblas ankaŭ vojoj por pli profunda aliro de la esploroj.

En eŭropaj kulturoj, precipe per la evoluigo de la naciaj lingvoj, post la latina, transmetiĝis la idealo de sengesta, senmimika, sen iu moviĝo de la vizaĝo, intelekta parolado kaj tiel la redukto de la lingvoesploro al la nura racieco.

Sed lingvoj informas el siaj originoj multe pli vaste kaj profunde pri la homa ekzisteco kaj pri universalaj ligitecoj, ol nur per la racieco.

¹ Heidegger; Aus einem Gespräch von der Sprache, zwischen einem Japaner und einem Fragenden.
El la parolado pri la lingvo, inter Japano kaj demandanto.

Tiel bremsis la racienco en Eŭropo la evoluon de la universala esploro ĉar ĝi restis plejparte nur en la dialektika kontraŭ-aĵo al la mezepoko kaj en la lingvaj kontraŭ-aĵoj de unu nacia lingvo al alia.

Tiu fakto estas nuntempe spertebila en la relative novaj sciencoj psikologio, sociologio, interligvistiko kaj en diversaj interfakaj rilatoj, kiuj ĉiam pli apogas kaj pravas la antaŭpensojn de Heidegger per sia ontologia pensmaniero; ke la lingvoj havas siajn (ĝis nun) nekapteblajn radikojn, kiuj en profundaj inter-rilatoj ebligas kelkajn esence novajn ekkonojn.

2. Ontologio kaj tempo

Heidegger nomis sian filozofion onto-logio. Pensado kiu est-iĝas en, el-iras el kaj sin-tenas, al la esto. Oni povas diri, ke tio estas esto-logiko, ne nur fantazio aŭ iu ideo, sed penso kiu havas sian apogon en la rilato al la reala esto.

En onto-logia-rilato ne estas elpensita nur iu ideala konstruaĵo, sed ĝi devas havi ekzistencan ligitcon kun la ĉi-esto; ekz. al konkreta vorto kaj al sia radiko en iu lingvo. La sperto de la esto onto-logie estigas la personon kaj reala penso devas esti denove certigata per la sperto en la esto. (Ekz. per etimologio, klimato, geografia pozicio, socio, historio, ktp.)

La idealismo, kontraŭe, deĝis en la tempo de la esto kaj restis nur en parto de la sperto el iu pasinta tempo. En tiu pasinta tempo ĝi ordigas kaj konstruas sistemon kaj tiun volas transpreni, ankaŭ perforte kontraŭ la nova tempo.

La metodo de sia kontraŭ-tempa mem-aserto estas la dialektika persvad-arto.

Pro tio, onto-logie, t.e. laŭ-este pensi, signifas serioze preni la tempon.

La konsciiĝo ke en la est-anto montriĝas la esto post la sperto el la est-inteco, kaj ĉiu est-onteco disvolviĝas el tiu moviĝo, kiu estas ligita al la est-anteco.

Heidegger en siaj malfruaj verkoj alvenis al la ekkono ke, „la esto estas tempo“², kiu kaŭzis kelkajn miskomprenojn, precipe ĉe tiuj kiuj komprenis lian unuan gravan verkon „Esto kaj tempo“³ pri la klasika pensmaniero, t.e. la eston kiel iun statikan substancon kontraŭ la tempo. Pro tio la interpretado de liaj malfruaj verkoj post la „turniĝo“, pri dialektika kompreniĝo kiel „rompiĝo“. Tute alie aspektas la tuteco de liaj verkoj por dialogika kompreniĝo. Tiel estas komprenebla la aliro el la „Esto kaj tempo“ al la „Tempo kaj esto“ sen iu „rompiĝo“, per la dialogika evoluo al la „turniĝo“.

Tiel tiu ontologio havas profundan rilaton al la dialogika pensado. La reala esto okazas en la estanteco (kiel ekz. la amo, la bazo de la vivo) ne izolita en iu aĵo aŭ sistemo, sed senpere kun iu alia vivanta esto, dialogike. La vivanta momento kiam ekestas io nova, ĉiam estas dialogika. Sole mi ne kapablas la vivon. La „mi“ kiu jam „havas tempon“ ekestas ĉiam poste, ĝi estas ĉiam jam historio kaj necerta futuro, aŭ ni povas aliel esprimi; en la est-inteco ĝi jam eliris el la „esto“ kaj eniris en la est-ontecon, sed ĝi ankoraŭ ne atingis la eston. La esto estas plene estanta nur en la nuna momento de la est-anteco. Ĉiu est-anteco estas okul-momenta, t.e. tempa. Pro tio „estas la esto tempo“; kiel Heidegger diris.

² Heidegger; Zeit und Sein, „Tempo kaj esto“, en liaj malfruaj verkoj, en la kajero, (Zur Sache des Denkens) Al la ajxo de la penso

³ Heidegger; Sein und Zeit, „Esto kaj tempo“, lia fama abunda frua verko.

3. Lingva nekompreneo

La fama dialogo inter Heidegger kaj lia japana studento estas eldonita sub la titolo. „El la interparolado pri la lingvo“⁴

Jam ĉe la titolo indas atentigi pri la en la germana lingvo nekutima uzo de la prepozicio. Kutime oni uzus en tiu frazo la prepozicion „über“. Se ni laŭvorte tradukus tion ĉi en Esperanton tio signifas „super“.

T.e. oni parolas „science“ el iu alteco pri io aĵo, por superrigardi la aferon. Tipa pozicio de la dialektiko ĉe la esploro.

Heidegger evitas tiun pozicion en la tuta parolado kaj tion li volas jam ankaŭ en la titolo emfazi.

Kaj tiu kiel-maniero estas tipa ankaŭ por la dialogiko.

Li eĉ ne estas signita kiel profesoro aŭ sciulo, sed simple li estas la „demandanto“ (D) kaj lia dialogpartnero estas signita, la „Japano“ (J), verŝajne por signi okulfrape la grandan distancon de la kulturoj kaj kutimoj en kiu okazas la parolado (nenie estas nomata ke li estas lia studento).

La dialogo komencas pri la jam antaŭ kelkaj jaroj malfermita lingvoproblemo kun sia alia japana studento Grafo Kuki, poste profesoro pri filozofio en Japanio, sed kiu tro june jam mortis. Grafo Kuki vekis la scivolemon de Heidegger pri la signifo de la vorto „IKI“, en la japana arto, kiun ili nun denove ripetas.

D: Kion eldiras tiu vorto, tion mi povis ĉiam nur el la foreco supozi.

La studento konfirmas ke grafo Kuki post la reveno el Eŭropo faris prelegojn en Kyoto pri la estetiko de la japana arto, kiam li provis klarigi tiun kun la helpo de la eŭropaj nocioj.

Heidegger esprimas sian dubon:

D: Ĉu ni rajtas ĉe tia intenco turniĝi al la (eŭropa) estetiko?

La nomo kaj tio kion tio signifas originas el la eŭropa pensado, el la filozofio. Pro tio devus resti la estetika pritraktado al orientazia pensado profunde fremda.

La studento ricevante la motiviĝon respondas.

J: Vi pravus. Ni japanoj mem devus voki la estetikon por helpo.

Heidegger principe ne estas kontenta eĉ kun tio.

D: Ĉu vi vere bezonas nociojn?

J: Verŝajne jes, ĉar ekde la renkontiĝo kun la eŭropa pensado montriĝas la nesufiĉeco de nia lingvo. Mankas al ni la povo limigi, aĵojn unusignife, vicigi unu al alia, ŝanĝeble sub kaj super ordigi.

Heidegger dube diras.

D: Ĉu vi kredas serioze ke tio estas iu nesufiĉeco de via lingvo?

J: Ĉe la neeviteble estiĝinta renkontiĝo (kontraŭ-iĝo)⁵ de la

⁴ Heidegger; Aus einem Gespräch von der Sprache. El iu parolado pri la lingvo. En; Survoje al lingvo

orientazia mondo kun eŭropa, sendube bezonas via demando
insistan konsideradon

D: Vi tuŝas nun al disputdemando, kiun mi kun Grafo Kuki jam
kelkfoje diskutis, nome la demando, ĉu estas necese kaj legitime
por orientazianoj, postkuri al eŭropaj nocisistemoj.

J: Ŝajnas ke en la tempo de la moderna teknikado kaj industriado de
ĉiuj mondpartoj, ne restas alia alternativo.

Heidegger nun enkrampas en la vorto „ŝajnas“, kie li supozas la necertecon de lia
dialogpartnero, sed ne por tiun elprofiti, (kiel tio okazas en la dialektika persvad-diskuto) sed
ĝuste tiel provi eniri en la alian flankon kaj eki la duflankan kompreniĝon. Li atentigas pri la
neceseco de la provo de vera sintezo de la kulturoj, ne nur de la unuflanka alpreno.

La studento mencias la eblecon de nur supra alpreno de la eŭropa influo kaj esprimas sian
dubon pri vera kaj profunda renkontiĝo de la kulturoj. Tion kontraŭdiras Heidegger, kaj
demandas:

D: Ĉu ni rajtas tion tiel nepre aserti?

J: Mi estas la lasta, kiu riskus tion, alie mi ne venus al Germanio. Sed
mi sentas daŭre la danĝeron, de kio evidente ankaŭ Grafo Kuki
ne povis deĝi.

D: Kiun danĝeron vi sentas?

J: Ke ni lasas nin delogi de la nocia riĉeco de la eŭropa
lingvospirito, kio nian ekzistencon tro pretendas kaj subigas al nur
iu forfluigo.

Heidegger konsentas kun tiu „danĝero“, sed li atentigas ke tio minacas ambaŭflanke. Li vidas
tion en la „regionaj ĉirkaŭaĵoj, germane „Gegende“⁶, (kiun mi laŭ-vorte kaj-sence tradukus
„kontraŭ-iĝo aŭ kontraŭ-fino“).⁷

D: La danĝero de niaj paroladoj kaŝiĝis en la lingvoj mem, ne en
tio „kion“ ni priparolis, ankaŭ ne „kiel“ ni tion provis.
Grafo Kuki provis tion diri kio staris al debato, en eŭropaj lingvoj.
Sed ni volis klarigi la IKI, kaj ĉe tio restis por mi la japana spirito
fermita; kaj restas ĝis hodiaŭ.

La malfacilaĵon ĉe la kompreniĝo kaŭzis la transŝoviĝo en la eŭropa pensmaniero, kvankam la
parolado provis klarigi la esencon de la japana arto kaj poezio.

La studento komencas kompreni la problemon:

J: La lingvo de la parolado (ĉikaze la germana) mem daŭre detruis

⁵ Eble estas sence pli adekvate traduki la germanan vorton „Be-gegnung“ per „kontraux-igxo“, ĉar fakte tiam ankoraŭ ne okazis iu „renkontigxo“ de la kulturoj.

⁶ Heidegger; Unterwegs zur Sprach; Survoje al la lingvo, p. 88

⁷ La esprimon „pejzagxo“ mi sxatus reteni por esprimi ion pri liberan vastecon.

la eblecon diri tion pri kio estis parolata.

D: Keltempe antaŭe mi nomis, sufiĉe senhelpe, la lingvon la domon de la esto. Se la homo per sia lingvo en la pretendo de la esto loĝas, tiam ni eŭropanoj loĝas probable en iu tute alia domo ol la orientazia homo.⁸

4. Lingvo, la domo de la esto⁹

„La danĝeroj kuŝas en la lingvoj mem kiujn ni parolas“ kaj en la „regionoj“ de la pejzaĝoj.¹⁰
Kiel estas tiuj eldiroj de Heidegger kompreneblaj?

Kio povas kuŝi en tiu „senhelpa“ eldiro: Lingvo estas la domo de la esto?

Se ni pripensas tiun frazon, ni povas sekvi, ke la domo estas konstruita el elementoj de natura esto, ekz. por protekti nin de la klimato, de perfortuloj, por povi nin retiriĝi en alktimiĝita ĉirkaŭaĵo en la familio, limigi kaj enŝlosi niajn akiritajn valoraĵojn, ktp.

Sed ni povas tempe ankaŭ sperti, ke ni ne povas ĉiam ene resti en la domo, ni devas ankaŭ eliri, por serĉi aliajn, en la domo ne troveblajn aĵojn, necesajn por la travivado. Eĉ por nia saneco ne estas bone se ni ĉiam restas ene, ĉar tiel ni povas ricevi psikan kaj korpan malsanon. Kaj kelkfoje necesas ankaŭ novkonstrui nian domon pro la bezono de la nova tempo.

Se ni atente pripensas tiun analogion, ni povas mire konstati kiel multe da ecoj validas por niaj lingvoj.

Kio nin en la esperanta ĉirkaŭaĵo pli interesas, estas ne la restado en la domo, tiu estas pli, la esplorterenon de la naciaj lingvoj, sed la necesa eliro el la domoj en la pejzaĝojn.

Heidegger avertas ankaŭ pri la problemo post la eliro el la domoj kaj tie li vidas la malkapablecon de la komprenado en limigitaj regionoj (Gegenden), el kiuj laŭ la enfiksitaĵoj, per la domoj limigitaj pensmanieroj, ekestiĝas eĉ „danĝeroj“ ĉe la renkontiĝoj.

Tie ni povas unue sperti ke la domoj ne donis al ni nur sekurecon, hejmecon, defendon, ktp. sed ili limigis ankaŭ nian kontakt-kapablecon. En niaj domoj ni evoluigis nur ian propran vivparton kaj manieron, kiu formis (aŭ limigis) eĉ nian pensmanieron.

Longe estis pli komforte por ni resti en la kontraŭaĵo al aliaj kutimoj el aliaj domoj, ol ekkoni kaj lerni ankaŭ la aliajn manierojn. Ni evoluis grandajn pens-sistemojn per kiuj ni povis nin „science defendi“ t.e. konvinki la aliajn pri niaj valoroj kaj veroj.

Tiu funkciis sufiĉe longe, ĝis la aliaj domkutimoj ne alprenis la saman metodon de la konvinkarto kaj tiel subite kolapsis la tuta t.n. nia dialektika sistemo.

Sen la domoj t.e. sen la lingvo ni homoj ne povas ekzisti, pro tio estas la lingvo la domo de la esto, sed la domoj mem sen la rilato al ekstera pejzaĝo deformiĝas al la rilato de nur si mem, (en ekstrema kazo al la malsano de idiotismo). Tio signifas ke la homo necese bezonas la elkuron en liberajn pejzaĝojn.

⁸ Heidegger; Unterwegs zur Sprache; Survoje al la lingvo. p. 90

⁹ Heidegger; Über den Humanismus; Pri la humanismo.p.5

¹⁰ Heidegger; Gelassenheit; Lasiteco. p. 44-49

La „danĝeron“ de la nekompreneo portas la lingvoj en si mem, se temas pri la komprenado en la pejzaĝojn kun aliaj lingvoj. Pro tio necesas konsiderema renkontiĝo kun la loĝantoj el aliaj domoj en la pejzaĝoj.

La problemo estas ke la naciaj lingvoj iutempe ĉiam pli enŝlosiĝis en la propraj domoj kaj perdis la kapablecon kontakti kun aliaj.

Nun, per la novaj sciencoj kiel psikologio, sociologio, interlingvistiko estis ekkonataj la mankoj ekestintaj pro la lingve limigitaj enloĝantoj kaj komencas ankaŭ ilia terapio, por kapabliĝi al renkontiĝo kun aliaj enloĝantoj de aliaj domoj en la liberaj pejzaĝoj.

En tiuj rilatoj de unu kun la alia, ekestiĝis eĉ iu nova lingvo kiu sin formiĝas kaj pluevoluiĝas en la inter-ecaj kontaktoj.

5. Ekskurso al Esperanto

Tiu inter-ecce nova lingvo nomiĝas Esperanto. Ĝi plej bone kapablas eliri el la limigiteco de la domoj kaj regionoj kaj trovi sian hejmecon en liberaj pejzaĝoj.

Ĝia pensmaniero estas dialogika ĉar ĝi ja ekestis el la dialogika neceseco, kiam montriĝis la limo de la komprenkapableco per la enkutimiĝintaj lingvoj kaj estas ĝis nun la unua ekzistanta inter-ecce libera lingvo, liberiĝinta de la dialektika pensstrukturo, tiel kapabla al vera inter-eca dialogo.

La naciaj lingvoj portas en si mem la dialektikan enplektitecon, la devon sin aserti, trabatali kontraŭ la resto de la mondo, pro tio ili el si mem ne taŭgas al vera inter-nacia dialogo.

Ke la lingvoj influas ankaŭ la pensmanieron estas jam science pruvita fakto.¹¹ Tiel tiuj karakteroj de la naciaj lingvoj influas ankaŭ la pensmanieron de la parolantoj kaj ĝenas la evoluon de vera internacia dialogo.

Esperanto estas libera de tiuj ĝenoj ĉar ĝia strukturo mem jam estas dialogika. Se ni iomete plu sekvas tiun direkton, ni povas diri:

La pensado povas esti ĉiam nur libera pensado kaj volas esti ĉiam universala. Sed se la lingvoj povas limigi la pensadon, tiam en nur unu nacia lingvo neniam povas okazi vera pensado, nur limigita, kiu tiam ne plu estas pensado.

T.e.: La lingvo de la pensado estas Esperanto.

6. Dialogikeco de Iki

En la dialogo inter Heidegger kaj la japana studento estas observebla la klopodo de ambaŭ, aliri al la pensmaniero de alia. La situacio por la studento estas pro tio malfacila, ĉar li volas ion esprimi en la, por li fremda lingvo, sed por Heidegger alikaze ankaŭ ne estas facile, ĉar li volas kompreni ion signon de (iki) el iu por li nespertata fora kulturo.

Heidegger provas liberigi sian komprenadon per la pensado, el la limigiteco de la propra lingvo, pro tio ekestas ĉe li ofte, je la unua lego ne tuj kompreneblaj nocioj. Tial kelkaj riproĉis lin, perforti la germanan lingvon. La vero estas inversa. Li provis kaj en kelkaj kazoj ankaŭ sukcesis sin liberigi pensante el la „perforto“ de la propra nacia lingvo, konstruante nociojn el la pli profunda aliro al la espriminda fenomeno.

¹¹ Kainz; Die Sprachverführung des Denkens; La lingvadelogo de la pensado.

Ĝenerale por eŭropa pensmaniero ne estus komprenebla la venonta eldiro de la japana studento:

J: Nin, japanojn, ne tuŝas malagrade, se ni en iu parolado la esencan opinion lasas en la malcerteco, eĉ se ni tion remetis en nedifiniton.

Heidegger montriĝas komprenema kaj kontenta:

D: Tio apartenas, tiel mi opinias, al ĉiu sukcesa parolado inter la pensantoj...

Sed alie:

D: La scivolemo kaj la avido pri klarigo neniam portas nin en pensantan demandadon. Scivolo estas ĉiam jam kaŝita pretendo de iu memkonscio, kiu sin pravigas al iu memtrovita racieco.

Nun ili volas denove provi, ĉu eblas per la eŭropa estetiko klarigi la vorton IKI el kiu la japana arto kaj poezio ricevas sian esencon.

Heidegger atentigas denove al la malfacileco de tiu entrepreno.

D: Tio kion ni priparolis, estis de antaŭe endevigita en la eŭropa imagosfero...

J: Je kio vi rimarkis tion?

D: Je la maniero kiel Kuki klerigis la bazan vorton IKI. Li parolis pri sensuala ŝajno, per kiu estas traŝajnata la vivanta ravo de la supersensualo.

J: Kuki trafis, tiel mi opinias, en sia prezentado tion, kion ni spertas en la japana arto.

Heidegger faras la rimarkon ke sur tiu diferencigo de la sensuala kaj supersensuala baziĝas ankaŭ la okcidenta metafiziko.

La Japano tuj atentigas ke ĝuste en tiu rimarko kuŝas la fonto de la danĝero kaj miskompreno.

Ĉar:

J: ...nia pensado, se mi rajtas tion tiel diri, konas ion similan kiel la metafizika diferenco; sed tamen tiu diferencigo mem ne lasas sin

per okcidentaj metafizikaj nocioj kapti.

Ni diras Iro, t.e. koloro, kaj ni diras Ku, t.e. la malpleno, la malfermo, la ĉielo.

Ni diras: sen Iro ne estas Ku.

Kaj tie estas ekkonebla la esenca diferenco inter la du pensmanieroj, kion tuj eĉ Heidegger ne rimarkis.

Unuflanke la eŭropa diferencigo, limigo, hierarkigo kaj aliflanke la kuneco kaj la unu-de-ali-dependeco de la, ĉi kaze japana pensmaniero.

Tie montriĝas iu mirige grava kvalito de tiu pensado. Nome la dialogiko.

Tiu pensmaniero, al kiu la okcidenta filozofio alvenis post longa historia kaj ofte tragika evoluo, kaj nomiĝas la „nova pensado“.

Ni povas diri ke en tiu orienta pensado trarestis iu origine esenca dialogiko, kiu kunportas la ekziston en nian mondon ekde la komenco ĝis nun, kaj tiu vero nun estas denove ekkonata, ĉi foje konscie (kio estas nun precipe okcidenta povo).

Sed kion valorus la konscio, se ĝi ne havus ekzistencian portanton kaj onto-logian pruvon en la realeco. Aliflanke indas ankaŭ konsciiĝi pri la protektata esenca ekzisteco. Eble pro tio estas oriento kaj okcidento unu de alia dependa kaj necesas ilia rilatiĝo.

7. Gesto kaj mieno

Alia profunda ekzemplo por montri la diferencon en la percepto de orientaj kaj okcidentaj kulturoj, estas la dialogo pri la gestoj kaj mienoj. Ili parolas pri iu japana filmo (Rashomon), kiun vidis ankaŭ Heidegger kaj estis tre impresata de ĝi. La japano ne havas ĉi tie la saman opinion.

Heidegger vidis en tiu filmo, kiel li diras, „sorĉan ekzemplon de la japana vivo“. La japano vidas ĉi tie nur foruzadon de la eŭropigo.

J: Ni japanoj trovas la prezentadon multfoje tro realisma, ekz. en la duelscenoj.

D: Tamen, ĉu ne aperas ankaŭ kondukataj gestoj?

J: Senpretende, tiuspece fluas en tiu filmo abunde, sed preskaŭ ne perceptebla por la eŭropaj okuloj. Mi pensas pri unu surtrankviliĝanta mano, en kiu kuniĝas kontaktiĝo, kiu restas senfine malproksime de ĉiu taĉo, eĉ nepovas esti nomita gesto laŭ la senco de la sensuala. Ĉar tiu mano estas portata de ia malproksima kaj ankoraŭ ĉiam alvokanta voko, el la silento alportinta.¹²

Tiu kleriga respondo enhavas la krudajn komprenmalfacilaĵojn, kiuj estas reduktitaj al nia eŭropa komprenkapableco, de ni nepovante eĉ supozi ankoraŭ kiu pleneco kuŝas malantaŭ ĉiu por niaj okuloj ne plu percepteblaj gestoj kaj mimikoj.

Eĉ la filma kontraŭ-aĵ-igo de tiu okazado estas jam la enpenetro per la eŭropa konsummaniero en la subtilan kaj delikatan orientan mondon.

La japano donas ankaŭ alian ekzemplon, por klarigi tiun fenomenon, per la no-ludo. En tiu ludo eblas sperti malantaŭ la profana japana mondo, la kaŝite subtilan en la malantaŭeco.

J: Vi devus ĉeesti ĉe tiu ludo. Sed eĉ tio restas malfacila, dum vi ne kapablas kunesti la japanan ĉiestmanieron. Ke vi iom, se ankaŭ nur el la malproksimo, de tio ion povas ekrigardi, kio decidus la no-ludon, mi volas vin pluhelpi per iu rimarko. Vi scias ke la japana scenejo estas malplena.

D: Tiu malpleneco postulas nekutiman kolektadon.

J: Dank' al tio necesas nur eta gesto de la aktoro, el la miriga kvieto,

¹² Heidegger; Unterwegs zur Sprache; Survoje al la lingvo.p. 104-105

por grandegan ekŝajniki.

Ekz., se devas aperi iu montara pejzaĝo, tiam levas la aktoro malrapide la malferman manon kaj haltas en la alteco de la brovo silente super la okulo.

Tamen ke ambaŭ konsentas, ke tio estas por eŭropanoj tre malfacile kompreni, Heidegger volas utiligi la eklernitan kaj rimarkas:

D: Gestoj estas kolektiĝo de iu porto.

J: Intence vi ne diris: De nia porto, de nia sinteno.

D: Ĉar fakte la portanto antaŭe al-portiĝas al ni.

J: Kaj ni re-portas nur nian parton.

D: Ĉe tio, kio sin al ni al-portas, nia kontraŭ-porto estas jam en la al-porto en-port-iĝ-ita.

J: Geston vi nomas pri tio: En si mem origine unuiĝinta kolekto de la kontraŭ-porto kaj al-porto.¹³

Tie montriĝas denove la dialogika unu-de-ali-depend-eco de la porto, al-porto kaj kontraŭ-porto kiuj fontas el la kolektiĝo de ĉi ĉiuj.

En la venonta paŝo la parolantoj provas pripensi la rilaton al la malpleno kaj la nenio.

Ĉar en la ekzemplo de la studento, la gesto ekŝajnis pli forta en la malplena scenejo ol en iu plene ŝarĝita kuliso, en tiu direkto plupensante povas ekŝajni en la malpleno la nenio, tiu esenco al kiu en la rilato estas pripensata ĉio alia kion ni ĝenerale nomas la esto.

Tie estas grave atentigi ke Heidegger ne diras, „kontraŭ“ la nenio ni pensas la eston, sed en la „al-rilato“.

Kaj tie kuŝas ankaŭ la kialo, kial la japanoj pli bone komprenis Heidegger ol la eŭropanoj. Ĉar ili havas pli adekvatan aliron kompreni la nenion (verŝajne el la budhismo).

Alia ekzemplo estas, kiel oni miskomprenis en Eŭropo la prelegon „Kio estas metafiziko“ de Heidegger. En Japanio oni tuj komprenis kion li diris, ili eĉ miris kial tion ne komprenis ĝuste la eŭropanoj. En Eŭropo ekiĝis longa diskuto kaj oni riproĉis nihilismon en tiu prelego.

8. La nenio de budhistoj

Kial la japanoj pli bone komprenas Heidegger ol la eŭropanoj, verŝajne devenas el ilia proksimeco al budhista pensmaniero kaj per tio al la pozitiva nenio. Por eŭropanoj estas preskaŭ nekomprenebla ekz. la frazo: „Tiu kiu mortas, antaŭe li mortas, tiu ne mortas, kiam li mortas“.¹⁴ Por budhistoj tiu pozitiva rilato al la nenio kaj la morto estas memkomprenebla.

La Eŭropanoj eĉ post la morto imagas iun ideale konstruitan staton, kaj la nenion ili volas ankaŭ per la konstruo kompreni t.e. per la malkonstruo.

¹³ Ebd. S.t. p. 108

¹⁴ Hartig; Die Lehre des Budha und Heidegger. La instruo de Budho kaj Heidegger. p. 144

La nenio estas por ili la detruo de la vivo kaj la esto, kio ideale estus subiginda per la batalo kontraŭ iu malbona esto kiu volas neniigi la bonan eston. La problemo estas nur ke la bona esto ne estas sufiĉe difinebla, ĝi eĉ ŝanĝiĝas en la historio, tiam oni diras ruze kaj „science“: „Disvolviĝas dialektike“.

La plej alta principo de la budhismo estas la atingo de la nirvano, iu stato kie fakte ĉiu malbono perdiĝas, avido, malamo, iluzio, ktp., estiĝas nenio. Tio ne estas atingebla per batalo, sed tute inverse, en la malatento kaj per la liberiĝo de tiuj en la senperforteco. Trankvileco, kvieto kaj silento de la animo estas la plej altaj etikaj principoj por la sinteno de la budhista homo. La malkvieteco de la sentimento esprimiĝas en la, per nenio tristigebla gajeco¹⁵

Tiuj principoj por la kristana religio de la okcidento ankaŭ ne estas malproksimaj. Jesuo sur la kruco nenion alian insistas. Sed en la historio evidente la eŭropanoj trovis sufiĉe da ekskuzoj ĉirkaŭiri tiujn se ili ne plu estis konvenaj. Ke en oriento tiuj principoj, fakte jam ekde pli longe validis kaj ankaŭ en la historio pli sincere estis plenumitaj, ĝis en nia estanteco, eble pruvas ĝuste tio, ke por orientano estas tiu pensmaniero pli komprenebla, ol por okcidentanoj, ĉar tiuj principoj verŝajne pli dominas ĉe ili ĝis nun.

Pro tio la eŭropanoj devas sin retenigi de la opinio, ke la orientanoj venis al Eŭropo, en tiu kazo la japanoj al Heidegger por ion lerni pri kio ili ĝis nun nenion sciis. „La aparte pozitiva alprenado de Heidegger en Japanio malpli ekas de la volo lin sekvi, sed de lia proksimeco ĝenerale al la orienta pensado kaj speciale al la zenbudhismo, en liaj malfruaj verkoj.“¹⁶

9. Kompreni la nenion

Profunde diferencigas la kulturojn la kompreno de la nenio. Ĉu estas la nenio komprenata kiel la fonto de la esto, aŭ kiel neniigo de la esto, disigas ĝenerale kaj profunde la pensmanierojn de la okcidentaj kaj la orientaj kulturoj.

Okcidente oni komprenas ĝenerale la nenion dialektike en la kontraŭaĵo al la esto kiel la neniigon, t.e. la detruigon de la esto. Tiu komprenmaniero devenas jam de la grekoj, sed en la posta mezepoko severiĝis en la raciemo, dialektike kontraŭ la mistiko.

En orientaj kulturoj estas la nenio transhistorie pli profunde komprenata, en la hinduismo, budhismo, kaj diversaj aliaj religioj, per la meditado. La nenio estas tie la fonto kaj la fino de la esto. Restante en la realeco, sen idealaj konstru-aĵoj, ĉe la esenco de la ĉiesto, kiu estas per la liberiĝo de la aĵoj en la meditado, post diversaj praktikoj senpere atingebla.

La okcidenta filozofio mem jam alvenis en sia evoluo al pli esenca komprenado de la nenio; fakte post la ekkono kaj sperto la finon de la idealismo. La filozofo Rosenzweig, kiu montris al la fino de la hegela dialektiko kaj la inicianto de la nova dialogika pensado, diris ke: „La nenio ne estas nenio, sed neforigebla io, de kie senĉese fontas la esto“.¹⁷ Oni povas paradokse diri, ke la okcidenta pensado nun alvenis ankaŭ tien, kie la orienta pensado jam ĉiam sin troviĝis.

Tiusence sen-dialektike estas komprenebla la nenio ankaŭ per la ontologio de Heidegger. En la proksimeco de la esto troviĝas la nenio, ĉar la esto estas ekzistence nur en la proksimeco de

¹⁵ Glasenapp; Die fünf Weltreligionen. La kvin mondreligioj. p. 73

¹⁶ Hartig; En; La instruo de Budo kaj Heidegger, S. 120, de; Köhei Mizoguchi

¹⁷ Rosenzweig, Der Stern der Erlösung . La stelo de la liberigxo. p. I.9

la nenio spertebla. Ĝi ne estas iu kontraŭaĵo al la esto (tiun kontraŭaĵon la esto neniam povas elteni, ĉar la nenio estas senfine pli kaj pli forta ol la esto) sed nur per la montriĝo de la nenio (timo, morto, ktp), povas konsciiĝi la esto. La ekzisto de la esto sperteblas en la en-haltigo de la eston en la nenio.¹⁸ En tiu pozicio restas la ekzisto de la esto en la realeco proksime al la nenio, malferma al la novo kio sin montriĝas, ne perdiĝante en la nenio, sed ek-estante ricevas la novon kiu fontas el la nenio por riĉigi la konojn kaj spertojn de la ĉiesto.

La esto povas sin nur adekvate teni al la nenio, por kontraŭo ne sufiĉas ĝia potenco, pro tio la reala rilato neniam povas esti dialektika. Dialektika rilato estas ĉiam nur idealisme konstruitaj kontraŭaĵoj, en kiuj la esto estas detruita nur por pruvi la relativan povon de iu ideale konstruita estaĵo, funkcia en la tempo.

Tiuj rilatoj estas en la orientaj kulturoj pli senpere kompreneblaj per la ankoraŭ ĉiam prezentaj diversaj religioj kiuj uzas la principojn de la meditado. Pro tio multe helpus la dialogoj de la kulturoj por alproksimiĝi al pli universala komprenado kaj ekkono la ĉieston en nia mondo. Pro tio necesas:

10. Dialogo de kulturoj

Usui Hiroyuki skribis en la revuo Esperanto: „... ni povas diri, ke japanoj tro bone lernis el la okcidento...“.¹⁹

Verŝajne li pravus kaj bedaŭrinda estas la „tro“. Tiun frazon apogas faktoj el la realeco. Ekz. se ni nur eliras surstrate en Jokohamo kaj ĉirkaŭrigardas ni povas sperti la pruvon de la diraĵo.

Se la eŭropanoj vizitas tiujn, por ili for-orientajn landojn, Japanion, Ĉinion, Koreion, Vjetnamion, Baraton, ktp., ne estas kaŝebla ilia timo de la kreskanta povo en tiu parto de la mondo.

Sed kial? Ĉu ni vere devas timi?

Pri nia eŭropa pensmaniero (dialektike), estas komprenebla tiu timo.

Sed ĉu ni certas ke tiuj, eĉ pli profundaj kaj tradiciaj kulturoj en la (por ni) „malproksima oriento“, ol tiu de la eŭropanoj, tutece (tro) alprenos la agresivan eŭropan viv-kaj-pensmanieron?

Se ili faros tion, tiam ni jes devus havi timon. Sed eblas ankaŭ alia evoluo (kiu pli verŝajnas), ke ili ne alprenos ĉion, precipe ne tion, kion jam ankaŭ la eŭropanoj spertis, ke ne estas vivkapabla, sed restos kaj enmetos en la granda sintezo de la mondo la propran, tiel longtempe vivkapablajn kulturojn, el kiu ankaŭ la aliaj partoj de la mondo, por la propra ŝanco en la vivo ĝenerale povas lerni.

Je la fino de tiu prelego eble mi povas mallongan konkludon filozofie diri:

Pri la okcident-eŭrop-dialektika pensmaniero la „nenio“ estas komprenata negative, en la perforta detruo de la esto (konkreta sperto en Hiroŝimo).

La „nenio“ de la oriento estas komprenebla pozitive, kiel la „fonto“ de la esto. (Konkreta sperto en la meditado. Ekz. en la zenbudhismo, en la diversaj formoj de la budhismo kaj en la jogo, ktp.)

Ni povas nur esperi ke estonte la okcidentanoj multe pli lernas de orientanoj; ke la orientanoj ne plu alprenos „tro“ multe senkritike de la eŭropanoj kaj, ke sukcesos eniri en dialogika sintezo de la kulturoj en la mondo.

¹⁸ Heidegger ; Aufsätze, p.

¹⁹ Esperanto revuo, marto 2007, p. 55

Literaturo:

- Heidegger, Martin; Sein und Zeit, Tübingen 1969
Esto kaj tempo
- Heidegger, Martin; Unterwegs zur Sprache, Pfuldingen 1957
Survoje al la lingvo
- Heidegger, Martin; Zur Sache des Denkens, Tübingen 1969
Al la aĵo de la pensado
- Heidegger, Martin; Über den Humanismus, Frankfurt A. M.
Pri la humanismo
- Heidegger, Martin; Vorträge und Aufsätze I, II, III, Pfullingen 1967
Prelegoj kaj artikoloj
- Heidegger, Martin; Gelassenheit, Pfullingen 1959
Lasiteco
- Kainz, Friedrich, Die Sprachverführung des Denkens, Berlin 1972
La lingvadelogo de la pensado
- Hartig, Willfred Die Lehre des Buddha und Heidegger, Konstanz 1997
La instruo de Budho kaj Heidegger
- Glaserapp, Helmut Die fünf Weltreligionen, München 1963
La kvin mondreligioj
- Rosenzweig, Franz Der Stern der Erlösung, Heidelberg 1954
La stelo de la liberiĝo
- Rosenzweig, Franz Das Büchlein vom gesunden und kranken
Menschenverstand, Köln 1964
La libreto pri la sana kaj malsana homkompreno
- Macko, Eugen Dialogik am Ende der Dialektik, München 2001
Dialogiko je la fino de dialektiko

Nociklarigoj

En tiu laboro kelkaj nocioj ne estas uzataj laŭ ilia ĉiutaga senco. Ĉe tio ekestas konsiderinda diferenco inter la simpla kaj la provo el la profundeco uzi, el la pli origina senco de la nomitaj fenomenoj.

La fenomeno de la „objektiveco“ (kontraŭstarigiteco) troveblas kvazaŭ en ĉiu lingvo de la mondo, en iuj pli, en aliaj malpli. Sed ĉu la kvaliton de iu lingvo, (laŭ el la latina ekestinta eŭropec-klasika antaŭjuĝo) decidas la mezuro de la objektivebleco, pri novaj tutmondaj spertoj kaj esploroj, estiĝis tre dubinda. Pro tio estas en nia tempo dezirebla utiligi la provojn kiuj troviĝas ĉe Heidegger por solvi la enkutimiĝintajn fiksaĝojn en la lingvoj, kiuj ĝenas la universalan evoluon.

„Renkontiĝo“ estus la simpla tradukado de la germana vorto „Begegnung“, kiu troviĝas en ĉiu Esperanto-Germana vortaro. Sed pli adekvate al sia profunda signifo devus esti tradukata per **kontraŭ-iĝo** aŭ **kontraŭ-ago**.

Ĉar la germana vorto „Begegnung“ portas en si mem „la dialektikan enplektitecon“ (tipa por verŝajne ĉiu indo-eŭropa lingvo) t.e. profunda analizo de la vorto donus inversan sencon, ol kion oni komprenas en la ĉiutaga vivo. Sed se la vortoj, kiel la plej novaj psikologiaj esploroj atentigas, havas influon ĝis en la profundaj tavoloj de la subkonscio, tiam ĉe ilia malsimila uzo, ili povas kaŭzi perturbojn kaj sintenĝenojn en la komunikado.

Fakte en tiu vorto okazas jes „renkontiĝo“, sed nur kiel dialektika objektivado, t.e. servas por starigi kontraŭ-aĵojn, kontraŭ-starojn kaj hierarkion. Estas vere, ke tio jam ankaŭ estas rilato, sed per la diferencigo de dialektiko kaj dialogiko estas spertebla ke ekzistas ankaŭ aliaj, pli homecaj dialogikaj rilatoj. (Bona ekzemplo estas la dialogo de Heidegger kun sia japana studento).

Kontraŭstaro, Objekto, germ. Gegenstand

Simile staras kun tiu alia la germana vorto „Gegenstand“, tradukita ĝenerale kiel „objekto“.

En la ĉiutaga germana uzo supraĵe jes estas tiu vorto komprenata kiel aĵo aŭ objekto, sed ĉe pli profunda analizo de la vortpartoj tio signifas ion kio „staras kontraŭ“. Kaj tiu senco ne estas hazarda, sed ĉe la nomiĝo de la fenomeno el la latina, en la tradukado estis la vorto „objectum“ laŭsence tradukita. En la latina signifas „kontraŭ-ĵeton“, la kontraŭ la subjekton ĵetitan. Do, profunda traduko devus klarvideble montri la subjekt-objekt-dialektikon en tiu vorto, kiun ĝi kunportas, ankaŭ tiam se en la ĉiutaga vivo tio ne plu estas evidenta.

Kontraŭ-aĵo, germ. Gegensatz

Origina traduko en la germana estas el la greka „antistrophe“ aŭ „kontraŭstrophe“. Poste kiel „antitezo“, aserto kiu estas kontraŭmetita al iu alia. En la logiko estis uzata por esprimi la rilaton de du sin ekskludantaj nocioj. Hegel solvas la nocion el la logiko kaj ĝeneraligas ĝin al „universala fenomeno“. Laŭ li, ĉio, kio estas, sin moviĝas kaj disvolviĝas, povas okazi nur „kontraŭaĵe“. Tiu nocio sonas el la germana pli vorte tradukata kiel „kontraŭfrazo“ aŭ „kontraŭmetiteco“. En la vortaro de E.D. Krause staras: „kontrasto“. Ĉiuj tiuj vortoj ŝajnas esti pli malproksimaj al la nocio, kiun Hegel esprimis per la germana vorto. Tiu vorto volas pli ĝenerale nomi la fenomenon, ol kion diras la supraj vortoj. Ili fakte ĉiuj tri apartenas je tiu nocio, sed ili jam estas specialaj partoj de la ĝenerala fenomeno. Pro tio ŝajnas al mi plej adekvata la vorto „kontraŭaĵo“ por traduki tiun nocion el la germana.

Kontraŭatendo, nuneco, germ. Gegenwart

En la ĉiutaga uzo de la vorto principe ne estas distingata inter la „okulmomento“, „nuno“ kaj „kontraŭatendo“. La esprimoj estas laŭvole uzataj por la noto de la sama fenomeno; la elekton decidas pleje nur stil-estetikaj konsideroj. Sed en la „nova pensado“ estas ekkonebla klara diferenco. Ĉi tie estas la „kontraŭ-atendo“ komprenata kiel „atendo“ „kontraŭ“ la tempo; kiel

reteno de la libera okazado de montriĝo de okulmomentoj per la atendo. Fakte la unua ebleco por la homo fiksi siajn spertojn kaj ekkonojn, savi tra la vulgara tempo kaj pludoni al sekvantaj generacioj, sed samtempe ankaŭ sin elturni el plena sindediĉo al tio, kio reale sin montras. Tio, kio restas „staranta“, metas sin jam ekstere de la okazado, en kiu ekestas la „kontraŭ“ de la „atendo“ de „kontraŭ-atendo“. Aliflanke tio, kio restas „staranta“ en la atendo, rezultas en okazado „kontraŭ“ la tempo la „kontraŭstaro“, (objekton).

Okulmomento, germ. Augenblick

La okulmomento estas antaŭ la kontraŭatendo. Ĝi estas senpera rilato al tio, kio montriĝas. Ĝi ne atendas kaj ne restas staranta, sed tiel dirite kuras kun la tempo, t.e. kun tio, kio sin montras en la realeco. Ĝi ne „havas“ tempon, ĉar ĝi konformas kun la tempo, aŭ kun tio, kion ni tempo nomas kaj sin plene dissolvas. Nur se la okulmomento, ne gravas el kiu kialo, ne plu vidas la, en ĉiu okulmomento sin montrantan revelacion, sed elfalas, ekestas la „atendo“, el kiu estiĝas la tempo en la kontraŭ-atendo. La kontraŭatendo de la vulgara tempo ebligas la subjektivan mezuron de la tempo en sinsekvaj nunoj inter la estinteco kaj estonteco. La okulmomento ne estas mezurebla, ĉar ĝi apartenas je la eterneco. Ĝi estas senpera rilato de la homo kun la eterneco. Mezureblaj estas nur tiuj, al kontraŭatendo malplenigitaj okulmomentoj. Kun tiu antropomorfa vorto volas esti emfazita la reala karaktero de la tempo, la momento en kiu la homo kun sia tuta esenco provas sperti la tempon, sed ne nur la abstraktan koncepton de la ciferoj de iu tempomaŝino.

Kontraŭfino, Regiono, germ. Gegend

En vortaroj trovebla tradukado de tiu vorto estas: regiono, pejzaĝo, ĉirkaŭaĵo. Kun la traduko kiel „kontraŭfino“ devus esti emfazita ia pli profunda senco kaj samtempe, kun tiu nekutima formo ĉiam memorigata al tiu en ĉiutaga uzo jam perdita signifo, kiu ŝajnas necesa en nia tutmondigata tempo. La kontraŭfino estas pejzaĝo, en kiu estas spertebila la kontraŭstariteco de la kontraŭstaro (objekto) kaj ĝia dialektika fino. Ĉi tie ne temas pri ekkono de kontraŭstara objekto en la senco de objektivaj sciencoj, kiuj esploras en la regionoj pri respektivaj metodoj, sed pri la malkovro de la metodaj kontraŭ-staritecoj mem kaj siaj limoj; por liberigi kaj malfermi la vojon en la „liberaj pejzaĝoj“.

Kontraŭneigo, germ. Gegner

Heidegger serĉis vorton, per kiu li povus esprimi la sen-kontraŭ-iĝon de kontraŭstaro. Post kiam la „nova pensado“ en la kontraŭfino spertis la limon de kontraŭ-stareco, komenciĝas la „sin-solvo“ de la „kontraŭfino“ kaj la ne-igo de la „kontraŭ“ per tio, ke malfermis sin la ebleco de elkurado en la „liberan vastecon“. Tiu proceso de „sen-kontraŭigo“ okazas en „kontraŭneigo“, kiu jam eliris el la „kontraŭfino“, sed ankoraŭ ne povas sin orienti sen la ligiteco al kutimoj en la libera pejzaĝo. Eble tiu vortkonstruo povus preskaŭ esprimi la sencon de tio, kion Heidegger volus diri per la vorto „gegnet“, kiun li alprenis el la oldgermana lingvo kiu signifas (ent-gegnet) sen-kontraŭigon. Pri tio li komprenas la „liberan vastecon“, en kiu okazas la malligado de la kontraŭ, aŭ la „ne-diro“ al kontraŭ, t.e. kontraŭ-ne-igo.

Ontika

Greke signifas „on“ la estanton, laŭ tio estas ontika, estanta, laŭestanta, laŭ la esto, la fakte estanta, en diferenco al ontologia.

ontologia

Koncerne la eston, apartenanta al ontologio

Ontologio

Greke signifas „estoinstruo“, t.e. instruo pri la estanto, kondiĉe ke ĝi estas. Ĝi estas observado sufiĉa al si mem. La ontologia demando pri la estanto en la esto estas unuflanke la plej ĝenerala sed samtempe ankaŭ la plej senpera. Ĝi intencas respondi al tio, kio kuŝas estoobligante je la fundamento de ĉiu ontiko. Heidegger riproĉas la tradician ontologion pro „estoforgesemo“. Ĝi estas „ontika“ sed ne „ontologia“, t.e. ĝi pripensas la eston sole en ĝia baziĝfunkcio por la estanto, do nur de tio, sed ne je si mem.

Esto, germ. Sein

Esto kiel verbo „estas“ la plej ĝenerala eldiro, kiu ĉion (ankaŭ la kontraŭparton: ne esto) inkluzivas kaj signifas la kontraŭatendecon (nunecon) de kontraŭatendo, kiu unue ebligas pensadon kaj eldiron. Ĉu per la sensuala perceptado, la spirito (pensado, ekkono) aŭ la sento, kiu kun „esto“ komprenata kontraŭatenda en sia kontraŭatendo estos kontraŭatendigata, ĉiam signifas la „esto“ ion iel kontraŭatendan ĉeestantan, estantan. La ĉeestado mem, nomiĝas en ĉiuj eblaj kaj realaj formoj la „esto“. La diferencon de „esto“ kaj „estanto“, de la ĉeestanteco unuflanke kaj la ĉeestanto aliflanke, Heidegger nomas la „ontologia diferenco“. La verbo „estas“ kaj la substantivoj „esto“ kaj „estanto“, estas tiel la plej vastaj nocioj. Ili signifas la premison, sub kiuj povas esti io nur tiam kontraŭatendo por pensanta kaj parolanta subjekto. La esto estas tiel pli frua kaj pli origina ol kontraŭ-atend-esto kaj konscio.

Estanto, germ. Seiendes

Estanto estas ĉio estanta, kiu en iu ajn maniero ĝenerale estas, pri kiu tial povas esti dirate, ke al ĝi apartenas esto en respektiva diferenca maniero. La ontologio pritraktas la estantan kiel estanto, aŭ en sia estanteco, t.e. en ĝia rilato al la esto, al kiu ĝi staras en la „ontologia diferenco“. Se la estanto ne estas rigardata kiel tia je si mem, en sia memstaro kiel aĵo, sed en tiu ĉi koncerno ĝi iun subjekton kontraŭstaras aŭ eĉ de tiu estas konstruita tiam ĝi ŝajniĝas al kontraŭstaro (objekto).

Ĉiesto, germ. Dasein

La reala ekzistenco, ne nur sole pensata esto. En la ekzistencfilozofio ĝi signifas la homon, se tiu homo estas tiu distingita ĉiesto, kiu posedas estokomprenon pri sia memo, sian eston, sian „ĉi“. Laŭ Heidegger estas „la estanto, ke ni iu ajn estas mem“, kiel „la esto de homo“.

La Vortaro por Lernantoj



GOTOO Hitosi

Universitato Tohoku, Sendai, Japanio
(vidu biografion en p. 13)

Resumo

Inter la diversaj specoj de vortaroj, la vortaro por fremdaj lernantoj estas relative nova. La ideo pri tiaj vortaroj establiĝis en la kampo de anglalingva instruado kaj leksikografio en Japanio (kaj aliloke) dum 1920-40aj jaroj, iusence do kiel rezulto de la renkontiĝo de tipologie malsamaj lingvoj. Estas cetere notinde, ke unu el la ĉefaj figuroj en tiu iniciato, Harold E. Palmer, estis eks-esperantisto. La utileco de vortaroj por fremdaj lernantoj estas nun ĝenerale akceptata, ne nur en specife anglalingva instruado, sed ĝenerale en la kampo de dualingva instruado. Eldoniĝas multaj tiaj vortaroj diverslingvaj, ĉu unulingvaj aŭ dulingvaj. "Esperanto-Japana Vortaro", eldonita en 2006 de Japana Esperanto-Instituto, estas provo de tiuspeca vortaro en Esperanto; ĝi celas servi por altagrada lernado kaj praktika uzado de la lingvo fare de japanlingvanoj. Kelkaj el ĝiaj karakterizaĵoj, kiuj interesos ankaŭ ne japanlingvanojn, estos prezentitaj.

The Dictionary for students.

GOTOO Hitosi

Amongst the various types of dictionaries, dictionaries for foreign students are relatively new. The idea of such dictionaries came from the field of English Language Education in Japan (and elsewhere) during the 1920s, 30s and 40s, in a sense as a result of the meeting of fundamentally different languages.

It is worth noting that one of the main figures in this innovation, Harold E. Palmer, was an ex-Esperantist. The usefulness of a dictionary for foreign students is now generally accepted, not just in English language teaching, but generally in the field of foreign language teaching.

Many such dictionaries are published, in many languages. “Esperanto-Japanese Dictionary”, published in 2006 by the Japanese Esperanto Institute, was a trial of such a dictionary in Esperanto; it was aimed at high level learning, and practical use of the language by people who spoke Japanese. A few of its characteristics, which will interest non-Japanese speakers will be presented.

Le dictionnaire pour étudiants

GOTOO Hitosi

Parmi les différentes sortes de dictionnaires, le dictionnaire pour étudiants étrangers est relativement nouveau. L'idée de tels dictionnaires est née dans le domaine de l'enseignement de la langue et de la lexicographie anglaises au Japon (et ailleurs) pendant les années 1920-40, d'une certaine manière donc comme résultat de la rencontre entre langues typologiquement différentes. Il est d'ailleurs à noter que l'une des figures principales de cette initiative, Harold E. Palmer, était un ancien espérantiste. L'utilité des dictionnaires pour étudiants étrangers est aujourd'hui généralement reconnue, non seulement dans le cas de l'enseignement spécifique de la langue anglaise, mais plus généralement dans le domaine de l'enseignement d'une deuxième langue. On édite de nombreux dictionnaires de ce genre en diverses langues, tant unilingues que bilingues.

Le « Dictionnaire Espéranto-Japonais », édité en 2006 par l'Institut Japonais d'Espéranto, constitue une tentative de réalisation de ce type de dictionnaire en espéranto ; il est destiné à l'enseignement supérieur comme à l'usage pratique de la langue par des locuteurs de langue japonaise. Quelques-unes de ses caractéristiques, qui intéresseront aussi les locuteurs d'autres langues, seront présentées.

(japana resumo)

辞書にはさまざまな種類があるが、外国人学習者向けの辞書は比較的新しいものである。このような辞書のアイデアは1920-40年代の、特に、日本の英語教育および辞書編集のなかで確立された。典型的に異なる言語の出会いから生まれたとすることができる。さらに興味深いことに、この中で主導的な役割を果たしたHarold E.

Palmerは元エスペランティストであった。学習者向け辞書の有益性は、今では、英語教育のみならず第二言語教育の分野で広く認められている。一言語辞書であれ二言語辞書であれ、そのような辞書は数多く出版されている。

2006年に日本エスペラント学会が刊行した「エスペラント日本語辞典」はエスペラントにおけるそのような辞書の試みである。これは、日本語話者の高度な学習および実際的な使用に役立つことをねらっている。その特徴のうち、日本語話者以外にも関心を呼ぶであろうものを紹介する。

La Vortaro por Lernantoj

Gotoo Hiroshi

1. Specoj de vortaroj

Oni malofte konscias, sed ekzistas pluraj specoj de vortaroj. Ĉi tie mi ne intencas paroli pri vortaroj de fakterminoj en diversaj sciencoj, aŭ vortaroj etimologia, sinonima, ktp. Mi pensas pri ĝeneralaj vortaroj, en kiuj registriĝas laŭvice aranĝitaj vortoj en unu specifa lingvo. La vortoj estas provizitaj per klarigo aŭ difino kaj ofte akompanata de ekzemploj.

Eble estas facile noti pri la diferenco de grandeco: estas vortareto facile enpoŝigeblaj kaj estas vortaregoj kun kelkcent paĝoj ; kelkaj naciaj lingvoj disponas pri gigantaj vortaroj en kelkdek volumoj kun po kelkcent paĝoj. Sed la grandeco kalkulata per la nombro de pagoj ne determinas la valoron de la vortaroj. Vortarego kaj vortareto havas plejofte malsamajn celojn, kaj oni devas taski vortaroj fronte al ĝiaj celoj. Estas ne eble kompari *Plenan Ilustritan Vortaron* kaj Pilger(2001) nur per iliaj fizikaj mezuroj.

Estaj multaj eblaj celoj: specialistoj, lerneĵanoj, ordinaraj civitanoj... kaj fremdaj lernantoj. Nur en la mezo de la 20a jarcento oni rimarkis, ke unulingva vortaro por fremdaj lernantoj devas havi aliajn karakterojn ol tiu por denaskaj parolantoj.

2. Le ekesto de "la vortaro por lernantoj"

La ideo pri la vortaro specife por fremdaj lernantoj establiĝis en la kampo de anglalingva instruado kaj leksikografio en Japanio (kaj aliloke) dum 1920-40aj jaroj. Oni do povas aserti ke tiu ideo naskiĝis iusence kiel rezulto de la renkontiĝo de tipologie malsamaj lingvoj.

La unua vortaro destinita al la uzo de lernantoj estis Horby (1942). Kvankam ĝi poste vendiĝis tutmonde, ĝi aperis unue en Japanio kaj tiel unuavice destinita al japanaj lernantoj de la angla lingvo. Ĝin karakterizas interalie la trajtoj kiel:

la distingo de substantivoj nombreblaj(countable) kaj nenombreblaj(uncountable)

la indiko de verbaj matricoj (verb patterns).

Oni povas facile kompreni, ke tiuj informoj estas nenecesaj por denaskaj parolantoj de la angla, kaj opotunaj por fremdaj lernantoj, precipe kiam ilia lingvo estas tipologie kaj genealogie malproksima de la cellingvo..

La vojon al tiaj vortaroj pavimis Harold E. Palmer, la antaŭulo de Hornby. Palmer estis brita lingvoinstruisto-fonetikisto, kiu estis invitita al Japanio fare de la Ministerio pri Edukado por reformi la anglalingvan instruadon en tiam Japanio(Smith 1999). Unue li fokusiĝis al parola flanko de la lingvoinstruado, sed poste li koncentriĝis al vortoprovizo kaj gramatiko kaj akcentis la gravecon de verbaj matricoj. Li tenis tiun taskon ĝis 1936, kiam li forlasis Japanion kaj reiris al Britio.

Estas interese noti, ke li aktivis por Esperanto en 1906-07 en Belgio, en la komenco de lia kariero kiel lingvoinstruisto. Li poste konvertiĝis en idisto. Kiam li venis al Japanio en 1922, oni invitis lin al la Kongreso de japanaj esperantistoj, kaj interesan epizodon registras la Revuo Orienta:

La deka kongreso de japanaj esperantistoj (1922-10-14/17)

Komuna vespermanĝo en la 15a de oktobro

Tre kortuŝan scenon prezentis la parolado de gasto, Prof. H.E. Palmer, angla fonetikisto, idisto, responde al la bonvenigaj paroladoj faritaj de S-roj K. Ossaka kaj H. Oka en lia lingvo Ido. La profesoro Idisto tamen bedaŭris, ke li ne kapablas paroli en sia lingvo Ido, kaj li parolis en la angla sub la interpretado Esperanta de S-ro S. Ŝindo, studento de Tokia Komerca Universitato. Li diras, ke li venis ne pro la afero de Ido, nek de Esperanto, sed pro la angla, kaj ke li devas propagandi antaŭ ol lingvojn

internacian[tiel] la nacian anglan. Li tamen konstatas pri bela, admirinda gastame de japanaj esperantistoj al Idisto, kio ne okazus inter eŭropaj esp-istoj kaj idistoj ĉiam severe atakantaj unuj kontraŭ[tiel] aliaj.

Nur en la japana teksto:

Post la kunsido komentis la vicambasadoro Ramstedt: ke kiam en Finnlando la registaro planis doni subvencion al Esperanto, iu profesoro-idisto kontraŭstaris, tiel ke la registaro starigis juĝkomisionon, en kiu membriĝis la patro de s-ro Setala, eduk-ministro krom la du personoj. Tie Ramstedt proponis al la profesoro ke tiu diskutu en Ido dum li mem parolos en Esperanto. Tiu profesoro honteme konfesis, ke li ne parolas en Ido, nek li povas rekomendi iun alian, kiu kapablus paroli en Ido anstataŭe. Tio montras ke s-ro Palmer ne estas escepto kiel neidoparolpova idisto. (Revuo Orienta 1922(11): 16)

La koncepto de "vortaro por lernantoj" establiĝis tiel en la tereno de anglalingva leksikografio, sed la ideo nun estas tute familiara ĉe alilingvaj vortaroj (Verlinde: 2006). La utileco de vortaroj por fremdaj lernantoj estas nun ĝenerale akceptata, ne nur en specife anglalingva instruado, sed ĝenerale en la kampo de dualingva instruado, precipe la projekto de Collins COBUILD (Sinclair 1987a, 1987b) revoluciis la leksikografion per la enkonduko de komputilaj teknikoj, kaj la projekto montriĝis sukcesa. Nun eldoniĝas multaj tiaj vortaroj diverslingvaj, ĉu en unu lingvo aŭ en du lingvoj.

3. "Esperanto-Japana Vortaro"

En 1990 ene de Japana Esperanto-Instituto establiĝis dekkapa Komisiono por Esperanto-Japana Vortaro de Japana Esperanto-Instituto, kun s-ro KONISI Gaku kiel la prezidanto. La komisiono diskutis pri la karaktero de la estonta vortaro. Ĉar Esperanto nature bezonas novajn lernantojn, la nova vortaro de Esperanto ja devas havi tiun karakteron. Ĝi tamen ne estos destinita nur al komencantoj, sed ĝi servu al "altagrada lernado kaj praktika uzado", ĉar Esperantio ne disponas la lukson havi diversspecajn vortarojn en la merkato.

Unue la komisiono fiksas la principojn de la vortaro jene:

1. La vortaro servu por altagrada lernado kaj praktika uzado de la lingvo.
2. La kapvortoj estu unuradikaj, sub kiuj aranĝiĝu la kunmetitaj kaj derivitaj.
3. Gravaj kapvortoj havu koncizan klarigon pri la baza nocio. Gravajn verbojn akompanu informoj pri la necesaj komplementoj kaj la aspekta karaktero.
4. La vortaro estu riĉa je ekzemplaj frazoj utilaj por ĝusta kompreno kaj uzado de la unuopaj vortoj.

Ĝia kompilado bezonis neantaŭviditan tempodaŭron sed ĝi finfine aperis en 2006. En la fina formo, la vortaro enhavas 550 radikojn de la rango A, 650 de la rango B, kaj 1200 por la rango C (laŭ la ordo de la graveco), dum eksterrangaj nombras pli ol 15000. Notu, ke ili aperas en la vortaro en malsamaj grandecoj kaj akompanate de malsamaj nombroj da steletoj. Kun pli ol 26000 kunmetitaj kaj derivitaj vortoj, la nombro de la registritaj vortoj ŝajnas sufiĉe taŭga por la praktika uzado. Inter la laststadie aldonitaj radikoj troviĝas "sudoko".

Al la vorto "ajna" multaj vortaroj donas nur ekzemplon "ajna nombro," kvazaŭ ĝi estas simple formala, faka termino en la matematika kampo. Ni nun povas facile konstati, ke ĝi estas tre populara vorto, libere uzata lige kun aliaj vortoj. Ĝi indas havi plurajn ekzemplofrazojn kiel "en ajna okazo", "Mi ŝatas babili pri ajna temo" kaj "Mi kontraŭas rasismen en ajna formo", krom tiu sobra "ajna nombro".

La sekvantaj figuroj ilustras aliajn trajtojn de la vortaro: verbaj matricoj, indiko de kunokazaj vortoj, ktp. Ekzemploj estas plejofte ne cititaj el klasikaj aŭ alie elstaraj verkistoj, sed inventitaj por bone demonstri la uzon de la koncerna vorto.

4. Konklude

Estas vero ke la valoro de *Plena Ilustrita Vortaro* estas nekontestebla kaj Pilger (2001) havas unikan valorojn konforme al ĝia celo. Sed ŝajnas, ke la plejparto de la ĝisnunaj dulingvaj vortaroj de Esperanto ne estis sufiĉe celkonsciaj. "Esperanto-Japana Vortaro" estas simple unua provo de vortaroj por lernantoj, ni ne aŭdacas aserti ke ĝi estas perfekta. Sed ni kredas ke la vojo estis sekvinda kaj sekvenda. Ĝi espereble servos kiel modelo por estontaj vortaroj.

Bibliografio

- Komisiono por Esperanto-Japana Vortaro 2006 *Esperanto-Japana Vortaro*. Tookyoo: Japana Esperanto-Instituto.
- Cowie, A.P. 1999 *English Dictionaries for Foreign Learners*. Oxford: Oxford University Press.
- Gotoo, Hitosi 2006 La vortaro. *La Revuo Orienta* 87(6): 24-25.
(<http://www.sal.tohoku.ac.jp/~gothit/ro0606.html>)
- Hornby, A.S 1942 *Idiomatic and Syntactic English Dictionary*. Tokyo: Kaitakusha.
- Pilger, Wouter F. 2001 *Baza esperanta radikaro*. Rotterdam: UEA.
- Sinclair, J.M.(komp.) 1987a *Collins COBUILD English language dictionary*. London: Collins.
- Sinclair, J.M.(komp.) 1987b *Looking up: an account of the COBUILD Project in lexical computing*. London: Collins.
- Smith, Richard C. 1999 *The Writings of Harold E. Palmer An Overview*. Tokyo: Hon-no-Tomoshia. (<http://www.warwick.ac.uk/~elsdr/WritingsofH.E.Palmer.pdf>)
- Verlinde, Serge, Jean Binon kaj Thierry Selva 2006 Corpus, collocation et dictionnaires d'apprentissage. *Langue française* 150: 84-98.

+**esoter|ism|o** 秘教; [キ] エソテリズム; [仏] 密教

Esp [国] = Esperanto, エスペラント [場合によっては Esp-o, Esp-a (= Esperanta) など使われる]; Esp-a vortaro エスペラント辞典

espanjolet|o [国] イスパニア錠 [窓用の、取っ手の回る掛金]

espart|o [国] アフリカハネガヤ(属の総称); エスパルト [縄、むしろなどの原料]

esper|i <望ましいことの実現を心待ちにする> [他動] <ion (+al/de iu), pri io, ke> <(人/人から)…を、人が…すること> 希望する、願う、期待する: ~i al iu feliĉon[venkon] <人の> 幸せ勝利を願う / Si ~as de mi favoron, 彼女は私の好意を期待している / Mi ~as, ke li sukcese trapasos la krizon. 私は彼がその危機を無事脱することを願っている / Mi nur ~as, ke la tertremo ne damaĝis vin multe. あなたが地震の被害をあまり受けなかったことを望むばかりです。《注意》ke 節内の述語動詞は直説法未来形が普通。要求的内容を表すとして意志法が用いられることもあるが、避ける方が望ましい。結果を知らない過去や現在についての希望的推測を述べる場合は、過去形や現在形も用いられる。[国] deziri. [類語比較] ⇒ voli.

+**esper|o** 希望、期待: kun ~o 希望を持って / sen granda ~o 大きな希望なしに / ~o saviĝi 助かるという希望 / La E~o [エス] ラーエスペーロ [エスペラントの賛歌、ザメンホフ作詞] / La infano estis por ŝi la sola ~o. その子が彼女にはたった一つの希望であった。

+**Esperant|o** ⇒ Esperanto 《注意》元々はザメンホフの筆名で「希望する人 esperanto」の意味の派生語だが、現在では「エスペラント」という言語名を表す独立の語として、大文字で書き始める。

+**esper|ebl|a** 期待できるような
esper|ebl|e 多分、希望的観測では: E~eble li venos morgaŭ. 多分彼は明日来るだろう。[国] eble, verŝajne, kredeble.

+**esper|ig|i** [他動] <iun+pri io, al iu+ion/ke> <人に> <…という> 希望や期待を抱かせる: Mi ne povas ~igi vin pri la certa sukceso. 必ずうまくゆくと思っても

らっては困る / Ŝia aplomba sinteno ~igis al ni ĉiuj, ke ŝi certe trapasos la krizon. 彼女の落ち着き払った態度は、彼女がきつと難局をしのいでくれるとの期待を私たち皆に抱かせた。

esper|ig|a 希望や期待を持たせるような: ~iga knabino 将来有望な女の子。

+**mal|esper|i** [他動] <(pri io)> <…に> 絶望する: Ni ne mal~u pri la estonteco de la homaro. 我々は人類の未来に絶望してはならない。

mal|esper|a 絶望した、絶望的な、すべての希望を失った: El ŝia buŝo eksonis mal~a krio. 彼女の口から絶望の叫びが発せられた。

mal|esper|o 絶望: enfali en mal~on 絶望に陥る / sin mortigi pro mal~o 絶望のあまり自殺する。

mal|esper|ig|i [他動] <iun+pri io, al iu+ion, ke> 希望を失わせる、絶望させる。

+**sen|esper|a** 希望の持てない、望みのない: sen~a malsano 治る見込みのない病。

sen|esper|ec|o 希望の持てない状態。

sen|esper|ig|i [他動] 失望させる。

sen|esper|ig|i [自動] 失望する。

[類語比較] **esper|i, atendi** atendi では、主語である人が事柄の発生を既定のこととし、ただ時間の経過によってそれが実現するのを待っているという含みがある。esper|i の場合は、事柄の実現を望ましく思うが、確信があるわけではない。esper|i は直説法の動詞をとる ke 節を導くことが多いが、atendi は iun または ion を導くのが普通である: Ili atendis la tagigon. 彼らは夜明けを待った; Mi atendas rekompencan. 私は(もらえるはずの)ほうびを待っている; Mi esperas rekompencan. 私はほうびがもらえればいいと思っている; Mi esperas, ke oni donos al mi rekompencan. 私はほうびがもらえるものと思っている。

‡**Esperant|o** [エス] エスペラント [頭文字を大文字で書くのが伝統的だが、小文字を使う人もいる。派生語に関しても同じ]



E

- la lingvo E~o エスペラント語 / paroli E~on エスペラントを話す / skribi en bona E~o 上手なエスペラントで書く / instruisto de E~o エスペラントの先生 / “E~o parolata” 「(ここには)エスペラントを話す人がいます」[掲示で] / E~o kiel parola lingvo 話し言葉としてのエスペラント / traduki en E~on エスペラントに翻訳する / D-ro E~o エスペラント博士 [国際語案の発表にあたってのザメンホフの筆名] / “E~o” 『エスペラント』誌 [UEAの月刊機関誌, 1905年創刊] / E~o-klubo エスペラント会 / E~o-japana vortaro エス辞典, エスペラント日本語辞典
- + **Esperanta** エスペラントの, エスペラントに関する: E~a antologio エスペラント選文集 / E~a kongreso エスペラント大会 [会議] / japana-E~a vortaro 和エス辞典, 日本語エスペラント辞典. 《(備考)「エスペラント運動」は ~a を使わず, la ~o-movado と表現するのが普通》.
- + **Esperante** エスペラントを使って, エスペラントで, = en E~o: Ĉi tie oni parolas nur E~e. こちらではみなエスペラントだけで話します.
- + **esperantaĵo** エスペラントに関する出版物, 物品など.
- + **esperantigi** 他動 エスペラントに訳す.
- + **esperantismo** ① エスペラントの使用を広める運動: la interna ideo de la ~ismo エスペラントに内在する思想 [中立言語エスペラントの採用によって異言語間に, 単なる効率や便宜のためだけではない, 自由で公平な人間関係の確立を実現しようとする]. ② エスペラントに特有の語法や慣用語句 [例えば, krokodili, eterna komencanto など].
- + **esperantisto** エスペラント使用者, エスペランティスト.
esperantista エスペランティストの: ~ista grupo エスペラント会.
esperantistaro エスペランティスト集団, エスペランティストの総体.
esperantisteco エスペランティストらしさ, エスペランティストであること.
neesperantisto エスペランティスト以外の人, エスペラントをやっていない人.
- + **Esperantilo, Esperantujo** エスペラント界.
- + **Pra-Esperanto** 〔エス〕 [エスペラント発表(1887)以前のザメンホフの言語案を総称して呼ぶ] 原エスペラント.
- + **esperantologo** エスペラント研究者; エスペラント語学者.
- + **esperantologio** エスペラント学; エスペラント語学.
- + **esplanado** ① [城と市街の間の] 広場, 空き地. ② [記念碑, 記念像などのある] 散歩場, 遊歩道.
- + **esplori** <未知のものを明らかにするために継続的に活動する> 他動 ① <ion, ĉu> [未知のことを究明するため] 調査する, 探求する: detale [funde / profunde] ~i 詳細に [徹底的に / 深く] 調査する / sisteme [zorge / skrupule] ~i 組織的に [注意して / 綿密に] 調査する / ~i la eblecon [situation / temon] 可能性 [状況 / テーマ] を調査する / En la libro la aŭtoro ~as la kaŭzojn de la nuna stagnado. この本で著者は現在の停滞の原因を探っている / Ni ~u, kion ni povos fari ĉi-rilate. これに関連して何ができるか考えてみよう. ② studi, ekzameni. ③ <ion> 探索する, 踏査する: ~i kavernon [dezerton] 洞窟 (を) [砂漠] を探索する. ④ [法] <事件を> 審理する, 調査する; <証人などを> 取り調べる; ≠ ekspertizi: ~i juĝan aferon 訴訟事件を審理する / ~i akuziton 被告人を尋問する. ⑤ enketi, aŭskultado, pridemandado. ⑥ [医] 診断的検査をする.
- + **esplora** ① 調査の, 探求の: ~a instituto 調査研究機関, 研究所 / ~a rigardo 詮索 (詮) するよう なまなざし. ② [法] 糾問主義の: ~a principo 糾問主義.
- + **esploro** 調査, 探求, リサーチ: scienco ~o 科学調査研究 / Persistaj ~oj montris, ke... 粘りづよい調査の結果, ... とわかつた / Sciencistoj faris objektivan ~on pri la fenomeno. 科学者がその現象の客観的な調査をおこなった.
- + **esplorado** [継続的な] 調査, 探求; 学術研究: ~ado de [pri] la nuna situacio 現状の継続調査.
- + **esploranto** 探求者, 調査している人.

Kapitalismo kaj Konfucea Kulturo



LEE, Chong-Yeong

Nask. 1932. Koreo. Doktoro pri Komerca Ekonomiko (Kobe Univ. Japanio). Ĉefo de la Merkatuma Grupo de la Nutrajho kaj Agrikultura Organizajho (FAO) de UN(1970-1987), Emerita profesoro de Kyongpuk Shtata Universitato, Koreio(1997-). Orda Profesoro de la Akademio Scienca Internacia (2002-). Prezidanto de UEA(1995-98), prezidanto de Korea Esperanto-Asocio (1998-2001). Honora membro de UEA

Resumo

Max Weber, fama germana sociologo, diris, ke protestantisma etiko bone harmoniiĝas kun ekonomia principo de kapitalismo, kaj ĉefe pro tio la okcidentaj landoj de protestantismo ekonomie evoluis. Sed, laŭ li, la konfuceismo ne harmoniiĝas kun moderna ekonomia principo kaj malhelpis la ekonomian evoluon de Ĉinio. Sed la lastatempa ekonomia evoluo en Azio, kiu estis profunde influita de la konfucea etiko, kaj speciale en Ĉinio, indikas, ke la konfucea kulturo estas alternativo por ekonomia evoluo kaj fariĝis la bazo de la rapida ekonomia evoluo en tiuj aziaj landoj.

Capitalism and Confucian culture

Chong-Yeong LEE

Max Weber, a famous German sociologist, said that the Protestant ethic harmonised well with the economic principle of capitalism and that it was mainly for that reason that Western Protestant countries had developed economically. According to him, Confucianism on the other hand was not in harmony with modern economic principles and held back the economic development of China. Yet the recent economic development in Asia, which has been profoundly influenced by the Confucian ethic, particularly in China, indicates that Confucian culture is an alternative for economic development and has become the basis of the rapid economic development in those Asian countries.

Capitalisme et culture confucéenne

LEE Chong-Yeong

Max Weber, célèbre sociologue allemand, disait que l'éthique protestante s'harmonise bien avec le principe économique du capitalisme, et c'est surtout pour cette raison que les pays protestants occidentaux ont évolué économiquement. Mais, selon lui, le confucianisme ne s'harmonise pas avec les principes économiques modernes et a empêché l'évolution économique de la Chine. Mais la récente évolution économique de l'Asie, qui a été profondément influencée par l'éthique confucéenne, particulièrement en Chine, montre que la culture confucéenne est une alternative pour l'évolution économique et qu'elle est devenue la base de la rapide évolution économique dans ces pays asiatiques.

(Japana resumo)

資本主義と儒教文化

ドイツの著名な社会学者マックス・ウェーバーによれば、プロテスタントの倫理観は資本主義の経済原則と調和する性格を持ち、プロテスタントを信仰する西欧諸国が経済的な発展を遂げることに寄与したとされる。これに対して、同じくウェーバーによれば、儒教は近代経済の原則に合致せず、中国の経済発展を妨げてきたという。しかし儒教文化圏に属するアジアの諸国、ことに中国における近年の急速な経済発展は、儒教文化が経済発展のための代替的モデルとして機能し、これらアジア諸国の経済発展の基盤となったことを示している。

Kapitalismo kaj Konfucea Kulturo¹⁾

LEE Chong-Yeong

*"La nobluloj scias, kio estas justa:
La malgrandaj homoj scias, kio estas profitdona."*

*"Kiam la lando estas bone regata, konsideru malriĉecon kaj
malaltan postenon kiel hontindaĵon; kiam la lando estas malbone
regata, konsideru riĉecon kaj honoron kiel hontindaĵon."
- Analektoj de Konfuceo (551-479 a. K.) -*

1. Enkonduko

La malvarma milito inter ŝtata socialismo kaj libera demokratio finis, kiam Sovet-Unio kolapsis en 1980aj jaroj. Francis Fukuyama japandevena usona profesoro de John Hopkins Universitato, deklaris ĝin "Fino de Historio" en sia vaste konata libro, "La Fino de Historio kaj la Lasta Homo" (1992).

La ĉefa kaŭzo de la falo de ŝtata socialisma politika sistemo ne estis la ideologio mem, sed la malsukceso de la socialisma ekonomia sistemo. Pro tio, ĉiuj ŝtataj socialismaj landoj turnis sin al libera merkata ekonomia sistemo. La 50-jara "eksperimento" de la socialisma Ĉinio provis, ke por ekonomia evoluo la libera merkata sistemo estas nepre bezonata.²⁾

Ekonomia evoluo dependas ne nur de bona ekonomia sistemo kaj bona ekonomia politiko, sed ankaŭ de la kulturo de popolo kaj socio. Kaj kulturo de socio ĉefe devenas de religio. Pro tio, Alfred Marshall, brita ekonomiisto, studinte pasintan ekonomian historion, konkludis, ke bona harmonio inter ekonomia principo kaj religia etiko estas nepre necesa kondiĉo por ekonomia evoluo.

Laŭ la sama penso, Max Weber, fama germana sociologo, diris ke la protestanta etiko bone harmonias kun ekonomia principo, kaj ĉefe pro tio okcidentaj landoj de protestantismo ekonomie evoluis. Sed, laŭ Weber, konfuceismo ne harmonias kun moderna ekonomia principo kaj malhelpis ekonomian evoluon de Ĉinio. Do, kiel ni povos ekspliki preskaŭ miraklan ekonomian evoluon de konfuceisme influitaj aziaj landoj (Japanio, Koreio, Tajvano, Hongkongo, Singapuro), de post la dua mondmilito, kaj nun Ĉinio?

La celo de tiu ĉi eseo estas, 1) identigi ĉefajn erojn de protestantismo kaj konfuceismo rilate al la ekonomia disvolviĝo, 2) trakti la influon de konfuceismo sur ekonomia disvolviĝo, 3) antaŭvidi kiel "tutmondiĝo" influos la tradician konfucean kulturon.

2. Kristana Etiko kaj Ekonomia Evoluo

1) Kristana Etiko

Pri la influo de kulturo (aŭ religio) sur ekonomia evoluo en okcidento kaj oriento, la teorio de Max Weber, unu el la plej influaj sociologoj en la 20-a jarcento, estas plej bone konata al tiuj, kiuj havas intereson pri la afero. (Max Weber; *Protestanta Etiko kaj Etoso de Kapitalismo*, 1904). Mallonge lia teorio estas jena:

La etoso de kapitalismo kiu kontribuis al la ekonomia evoluo en la okcidenta mondo, devenas de la etiko de protestantismo. Li speciale atakis konfuceismon ĉar "ĝi estas baro de (kapitalisma) ekonomia evoluo.

La Protestanta etiko emfazas tri erojn.

Unue, ĝi emfazas kreon de "pura profito" kaj dediĉon de la profito al Dio (aŭ al la "volo de Dio"). Oni dediĉas plej multe da profito al Dio, lasante nur malmulton necesan al si por sia uzo. Pro tio, se "riĉaĵo" estas pure kreita, ĝi estas ne nur fierinda sed ankaŭ dezirinda. Kontraŭe, laŭ Max Weber, konfuceismo malestimas komercistojn, kiuj celas krei profiton. En konfucea kulturo, "nobluloj" aŭ intelektuloj ne estis permesitaj engaĝiĝi en komerca aŭ profito-dona agado. Konfuceo diris: "Nobluloj scias, kio estas justa; la malgrandaj homoj scias, kio estas profitdona." (Analektoj de Konfuceo) Tio malhelpas disvolviĝon de la kapitalisma ekonomio, laŭ Weber.

Due, por krei la "puran" profiton, oni devas labori diligente, vivi honeste kaj elspezi ŝpareme, ĉar, laŭ protestantismo, kreo de profito estas ne nur deziro sed ankaŭ devo de homoj por servi al Dio. Male, konfuceismo preferas multan elspezon por diversaj ceremonioj ekonomie neproduktivaj, i.a. ceremonioj por funebro, geedziĝo, naskiĝtago, ktp, por teni prestiĝon aŭ "savi vizaĝon". Tio malhelpas akumuladon de kapitalo, kiu estas necesa kondiĉo por ekonomia evoluo.

Trie, laŭ protestanta etiko, ĉiuj homoj estas egalaj antaŭ Dio kaj neniu okupo estas pli nobla ol alia. Pro tio ĉiuj profesioj estas egale valoraj. Oni devas tute sindediĉi al sia okupo, ĉar tio estas la devo al Dio. Sed en oriento, estas klare indikita la diferenco inter okupoj. Ekzemple, intelektuloj estas la plej noblaj, terkulturistoj estas la duaj, ĉar ili produktas manĝaĵon por intelektuloj, metiistoj estas la triaj, ĉar ili fabrikas necesaĵojn por la intelektuloj, kaj la plej malnobla okupo estas komercisto (nuntempaj entreprenistoj), ĉar ĝi celas nur profiton, ne aldonante al produktado. Tia konfucea kulturo malhelpas uzon de homaj talentoj por plej taŭgaj okupoj, kaj malhelpas disvolviĝon de la kapitalisma ekonomio.

2) Esenco de Kapitalismo

Kapitalismo estas ekonomia sistemo evoluinta en la libera merkata ekonomio. La baza premiso estas, ke "homo estas ekonomia animalo, kiu instinkte postkuras sian profiton". Surbaze de la baza premiso, kapitalismo havas kelkajn esencajn erojn:

Unue, privata posedsistemo estas baza fundamento de kapitalismo. Sen la sistemo de privata posedo kapitalismo ne povas ekzisti. La rimedoj por produktado estas private posedataj kaj utiligataj por krei profiton.

Due, profito estas la baza motivo por ekonomia agado. Evoluo sub kapitalisma ekonomio bezonas kapitalon, kaj por kreo kaj akumulado de kapitalo, postkuri profiton estas esenca.

Trie, dinamika konkurenco en ekonomia agado estas akceptita agadprincipo de kapitalismo. Por krei profiton, libera konkurenco en merkato estas necesa. Por venki en la merkatakonkurenco, oni devas dinamike ŝanĝi laŭ la merkata medio. Investado, produktado, prezo, kaj distribuo de varoj estas determinataj de la funkciado de merkato.

Kvare, egalrajteco estas esenca. Por propra merkata konkurenco, al ĉiuj konkurantoj devas esti donitaj egalaj oportunoj, sendiskriminacie. La libera demokratia politika sistemo estas nepre bezonata por la egalrajta partopreno en la merkata konkurenco.

3) Racia Modelo de Ekonomia Evoluo

Surbaze de protestanta etiko, *la racia modelo de ekonomia evoluo* en la okcidenta mondo disvolviĝis. La racia modelo por ekonomia evoluo en la okcidento havas ĉefe jenajn tri elementojn:

Unue, ĝi emfazas efikecon: akiri la plej multan produkton per la plej malmulta enmeto. Tio estas *produktivo*. Iu ajn agado, kiu celas efikecon, estas ĝustigebla. Fakte la tuta teorio de moderna ekonomiko estas bazita sur ĉi tiu nocio. Por ekonomia efikeco kaj produktivo, oni bezonas maŝinigon kaj aŭtomatigon de produkta procezo kaj sistemigon de la administrada

strukturo de korporacioj. Por tio, nepre necesaj estas koncentrigo, specialigo kaj normigo de ekonomiaj aktivadoj. Profiteco estas la sola objektiva kriterio por ekonomiaj decidoj. Max Weber diris: "Antaŭ ol decidi pri ia ekonomia afero, oni devas objektivite kalkuli, ĉu tio estos tiom profitdona."

Due, raciismo emfazas individuismon. Dio donis al ĉiu individuo kapablon strebi por racia kaj "pura" (kristanisma) profito, kaj ordonis al ĉiu individuo uzi sian laboron por servi al Dio. Pro tio, ĉiuj havas egalrajtojn kaj devas klopodi individue por sia estonteco, kiu estas ligita al kunagado kun aliuloj. Por krei maksimuman efikecon, individuo devas esti lasita fari sian plejbonon. Oni rajtas fiere montri sian elstaran kapablon.

Individuismo donas plenan ŝancon al homoj por disvolvigi siajn talentojn. Tio pozitive influas entreprenismon, kiu estas motoro de ekonomia evoluo en kapitalisma sistemo.

Trie, la racia modelo ankaŭ enhavas dinamismon. Por garantii racian ekonomian efikecon surbaze de individua kapablo, oni devas esti dinamika. Oni devas esti ĉiam preta por ŝanĝo kaj konkurenco. Fakte homoj devas ŝanĝi kaj konkeri naturon. Dank' al la individuaj homoj, kiuj interkonkuras por elstari, intelekto, socie kaj ekonomie, dinamika progreso okazas en scienco, belarto, ekonomio kaj aliaj kampoj. Progreso surbaze de konkurenco estas laŭdinda por evoluo de kulturo.

(Tabelo 1) Protestanta Etiko:
Racia Modelo de Ekonomia Evoluo

Eroj	Enhavo
Efikeco	Profitebleco Objektiveco Kvanteco
Individuismo	Egaleco Libereco Individua kreco
Dinamismo	Ŝanĝemo Konkuremo Konkeremo

Laŭ Max Weber, se ni deziras ekonomian evoluon, la racia modelo estas universale aplikebla. Ĝi perfekte kongruas kun kapitalisma sistemo. Sed konfucea etiko ne kongruas kun tiu de universala modelo kaj malhelpas ekonomian evoluon.

Nu, la demando estas, "ĉu ĝi estas universala modelo?"

3. Konfucea Etiko kaj Ekonomia Evoluo

1) Konfucea Etiko

Kiel Max Weber diris, kulturo aŭ socia etiko influas la efikecon de ekonomia sistemo kaj ekonomian evoluon. Konfucea kulturo influas ekonomian evoluon pozitive kaj ankaŭ negative. Jen estas esencoj de konfucea kulturo rilate al ekonomia evoluo.

(1) Lojaleco al la Grupo

Konfucea etiko instruas lojalecon al grupo (familio aŭ ŝtato), kaj respekton kaj lojalecon al la estro de la grupo. La *Triunuo de la Konfuceismo* instruas absolutan lojalecon al reĝo (ŝtato

en moderna senco), majstro kaj patro. Tiu koncepto kontribuis al politika stabilo de registaroj en Orient-Aziaj landoj.

Kompreneble, tro forte patreca registaro foje povas esti aŭtoritata kaj diktatora. Por la bono de ekonomia evoluo, malriĉaj popoloj povas esti toleremaj al aŭtoritata registaro ĝis la ekonomio atingas al iu nivelo de disvolviĝo. Ŝajnas ke multaj aziaj landoj preferis ekonomian evoluon sub politika stabileco, aŭ eĉ sub aŭtoritata registaro, anstataŭ ekonomia malevoluo aŭ stagnado sub politika malstabilo.

Familiismo, kolektivismo kaj lojaleco al grupo influas humanecan dimension de ekonomio. Sub konfucea kulturo, la demando, "Kiu estas mi?" estas malpli grava ol "Al kiu grupo mi apartenas?"

Kapitalisma sistemo en okcidento emfazas efikecon, individuismen kaj dinamismon, Tie ekonomia entrepreno (aŭ komerca firmao) estas pure ekonomia kaj fizika estaĵo. Pro tio, entrepreno (aŭ firmao) estas fizika kaj ekonomia sistemo por atingi deciditan celon, pere de racia kombino de kapitalo, maŝino kaj krudmaterialo. Sub tia nocio, homoj estas kostoj, kaj rilato inter dunginto kaj dungitoj estas nur ekonomia kontrakto kiu daŭras dum fiksita periodo.

Konfucea kulturo emfazas humanecon, kolektivismon kaj konservatismon. Pro tio ekonomia entrepreno estas ne nur ekonomia sed ankaŭ socia estaĵo. Ekonomia entrepreno estas humaneca sistemo por atingi deciditan celon pere de ĝusta kombino de laboristoj, administristoj kaj estroj. Sub tia nocio, homoj estas ne kostoj sed la plej valora havaĵo de la firmao, kaj la rilatoj inter dunginto kaj dungitoj estas patrecaj rilatoj en familio sen fiksita kontraktperiodo. La koncepto de "dumviva dungado" devenas de tiu rilato.

En modernaj firmaoj, scio estas pli grava kaj valora havaĵo ol fizika havaĵo. Scio estas en la cerbo de homoj. En tia senco, la nocio de humaneca organizaĵo estas pli taŭga por modernaj firmaoj kaj ekonomia evoluo.

La humaneca nocio ankaŭ havas malavantaĝon. Ofte ĝi kaŭzas malefikecon, neracian decidon, nepotismon aŭ regionismon. Superaj postenoj en firmaoj normale estas okupataj de la anoj de sama familio Tio foje malhelpas kreskon de komercaj kaj ekonomiaj firmaoj. Pro tio, ĉefe malgrandaj firmaoj troviĝas en Tajvano.

En Japanio, la nocio de familio estas pli granda, kaj principe ankaŭ tiuj, kiuj ne devenis el sama familio, povas esti membroj de *iemoto*, etendita familio. Tio kontribuis al la disvolviĝo de grandaj korporacioj en Japanio. En Koreio, la patreca registaro intence kreis grandajn korporaciojn kunliginte mez-grandajn firmaojn, por eviti malavantaĝon de malgrandaj firmaoj. Sed, la bazaj elementoj de la malforto de la familiismo ne malaperis.

(2) Harmonio

En konfucea kulturo, lojaleco al la grupo aŭ familio estas pli grava, ol individua kompetenteco. Ofte homo estas pli taksata per la grupo aŭ familio, al kiu li/ŝi apartenas, ol kiel kapabla li/ŝi estas. Pro tio, humaneca harmonio kun la grupanoj estas multe pli grava ol konkurenco inter grupanoj. Konfuceo diris: "*La nobluloj ne konkuras. Se ili ne povas eviti konkuron, ĝi okazas nur en la arkpafado. Sed eĉ tiaokaze ili salutas sin reciproke, antaŭ ol iri al la pafejo, kaj trinkas vinon por la pafado. Do eĉ dum la konkurado ili restas nobluloj.*" (Analektoj de Konfuceo). Individua konkurado inter grupanoj estas rigardata kiel nedeca afero.

Sed individua talento estas alte taksita. Konfuceo diris: "*Kiam la lando estas bone regata, konsideru malriĉecon kaj malaltan postenon kiel hontindaĵon; kiam la lando estas malbone regata, konsideru riĉecon kaj honoron kiel hontindaĵon.*" (Analektoj de Konfuceo)

3) Edukado

Konfuceismo forte emfazas edukadon kaj lernadon. Konfuceo diris: "*Se mi povus aŭdi la veron matene, mi volonte mortus en tiu vespero.*" Estas devo de gepatroj sinoferi por eduki kaj lernigi iliajn idojn.

En konfucee influitaj aziaj landoj, tradicia socia hierarkio estis tia, ke la intelektulo estas konsiderata je la pinto, kaj la komercisto je la plejmal-supro, t.e. Intelektulo > Terkulturisto > Metiisto > Komercisto. Pro tio, ĉiuj tiel konkuras por atingi la nivelon de la intelektularo, ke edukado estas nepre necesa. Kaj ankaŭ por bonigi reputacion de la familio, oni devas bone eduki gefilojn, por ke almenaŭ ili ne malpurigu "la familian nomon".

Pro tio, gepatroj ne lasas infanojn memelekti, ĉu lerni aŭ ne, sed devigas ilin lerni. Edukado de infanoj estas la pinto de farendaĵoj de ĉiuj gepatroj. La statistika buroo de la korea registaro anoncis en majo 2007, ke koreaj familioj averaĝe elspezas \$370 monate por kromlernado de infanoj, t.e. 14% el la familiaj monataj elspezoj. Por infanoj, lernado estas devo ne nur por si mem, sed por la reputacio de la familio. Preskaŭ ĉiuj lernantoj de elementa lernejo ĝis altlernejo (gimnazio) aparte lernas ĉiutage post reveno el lernejo. La "eksterlerneja lernado" kostas tiom multe, ke la elspezo kaŭzas gravan socian problemon. Pro tio, la registaro malpermesas la eksterlernejan lernadon. Tamen, la gepatra fervoro por edukado estas tiel forta, ke la ŝtata regulo ne havas la celitan efikon.

La rezulto de la fervoro por edukado estas jena:

(Tabelo 2) Tria Internacia Matematika kaj Scienca Studo, 1996
(Averaĝaj poentoj de 13 jaraĝuloj en 41 landoj)

Rango	Matematiko		Scienco	
	Lando	Poento	Lando	Poento
1	Singapuro	643	Singapuro	607
2	Sudkoreio	607	Ĉeĥio	574
3	Japanio	605	Japanio	571
4	Hongkongo	588	Sudkoreio	565
5	Flandrio	565	Bulgario	565
6	Ĉeĥio	564	Nederlando	560
7	Slovakio	547	Slovenio	560
8	Svislando	545	Aŭstrio	558
9	Nederlando	541	Hungario	554
10	Slovenio	541	Britio	552

(Fonto): The Economist, 27 Marto 1997. p. 21.

Ĉar en la moderna ekonomia mondo de altnivela teknologio kaj elektroniko, en kiu homforto fariĝas la plej valora havaĵo de firmaoj, la fervoro por edukado forte kontribuas al ekonomia evoluo.

Tamen, ankaŭ la fervora edukado por akiri prestiĝon kaj altrangajn postenojn montras socie negativajn aspektojn.

(Tabelo 3) Influo de Konfuceismo al Ekonomia Evoluo

Elemento	Influo	
	Pozitiva	Negativa
Lojaleco al grupo	Patreco Daŭra politiko	Diktatoreco Burokratiĝo
Harmonio, ne konkurenco	Harmoniaj rilatoj Longdaŭra rilato	Malefikeco Nepotismo
Fervoro por Edukado	Altigi scion Edukita homforto	Socia problemo Malestimo de manlaboro

2) Afekcia Modelo de Ekonomia Evoluo

Male al la aserto de Max Weber, mirakla ekonomia disvolviĝo en tiuj Aziaj landoj, kiuj estas forte influitaj de konfucea etiko (Japanio, Suda Koreio, Tajvano, Hongkongo kaj Singapuro) montras, ke la racia modelo de okcidenta mondo ne estas nepre universala, sed povas esti alia modelo por ekonomia evoluo.

Eĉ la ekonomio de socialisma Ĉinio, en kiu konfuceismo naskiĝis, tre rapide progresas. La ekonomio de tiuj konfucee influitaj landoj en Azio kreskadas mirakle rapide kaj nun ili kune okupas ĉirkaŭ trionon de la tutmonda ekonomio. Multaj eĉ diras, ke verŝajne Ĉinio estos la plej granda ekonomio en la mondo en ĉirkaŭ la 2020a jaro, kaj kelkaj fakuloj diras, ke la 21a jarcento estos *la jarcento de Azio*.

Do, ĉu konfuceismo havas pozitivajn elementojn por ekonomia disvolviĝo? Kio estas karaktero de konfucea kulturo, kiu influas la ekonomian evoluon de tiuj konfucee influitaj landoj?

La ĉefa komuna elemento estas tiel nomata *afekciismo*, male de la raciismo en Okcidento. La afekcia modelo havas tri elementojn:

Unue, humaneco estas la baza elemento de la afekcia modelo de ekonomia evoluo. Ankaŭ en Oriento, oni rekonas neceson de racia ekonomia efikeco kaj objektivaj decidoj. Sed, oni pli grave taksas humanecajn rilatojn inter homoj, kaj ne emas fordoni humanecan afekcion nur por racia decido. Rilatoj inter homoj konsistas el "*tri fundamentoj de homoj*"(reĝo, nuntempa ŝtato estas fundamento de la regataro, patro estas fundamento de filo, kaj edzo estas fundamento de edzino) kaj "*kvin moralaj reguloj inter homoj*"(rilatoj inter patro kaj filo; reĝo kaj regato; edzo kaj edzino; maljunulo kaj junulo; amiko kaj amiko). Pli ol 2000 jarojn tiu instruo estas preskaŭ sama kiel la sankta biblio de kristanismo, kvankam konfuceismo ne estas religio.

Pro tio, decido sub konfucea etiko dependas ne nur de racia analizo kaj objektiva ekonomia efikeco, sed de subjektiva kaj humaneca konsideroj kaj ankaŭ de specifaj rilatoj inter homoj.

Due, kolektivismo estas alia elemento de la afekcia modelo de orienta ekonomio. En Oriento, aparteno al iu grupo havas gravan socian signifon, ĉar oni ofte mezuras meriton de individuo ne laŭ tio, "kiu li/ŝi estas", sed laŭ tio, "al kiu grupo li/ŝi apartenas, aŭ al kiuj homoj li/ŝi rilatas". La baza grupo estas familio, sed la grupo povas esti kolegoj de sama laborejo, samurbanoj, samregionanoj, samlernejanoj, diversaj samklubanoj aŭ samlandanoj. Kiam oni taksas iun, la prestiĝo de la grupo, al kiu li/ŝi apartenas, kaj ties lojaleco al la grupo grave influas. Se iu ne apartenas al grupo, li/ŝi preskaŭ ne ekzistas.

El la grupoj, familio estas la plej grava. La devo de famiilestro estas protekti kaj prizorgi la familianojn, kaj la devo de familianoj estas lojale obei la famiilestron kaj kontribui al la bono de la familio, ne tro puŝante nur individuan ambicion.

La rilatoj de familianoj aŭ parencoj, etendiĝas al ekonomio. Estroj de komercaj aŭ industriaj firmaoj vole nevole dungas parencojn. Tiuj, kiuj ne zorgas familianojn aŭ parencojn, estas socie ne akcepteblaj. Pro tio, ofte oni devas decidi ne surbaze de racia analizo de la situacio nek nur por maksimuma efikeco, sed surbaze de afekcio kaj subjektiva taksado. Estro de firmao ne tuj maldungas parencon en firmao, eĉ se tiu kulpas. Kompreneble, familianoj devas helpi la aliajn, kiuj suferas de malfeliĉo.

La etendita koncepto de familio en firmao influas aŭ pozitive (lojaleco, fideleco, longdaŭra rilato) aŭ negative (nepotismo, neracia decido, malefikeco).

Kiam la koncepto de familio maksimume etendiĝas, ĝi egalas al samlandanoj aŭ ŝtato. Fakte, Ĉina vorto por *ŝtato* ("guo-ĵia") litere signifas *ŝtatan familion*. Pro tio, lojaleco al la ŝtato (aŭ reĝo) estas nedisputebla devo de *familianoj*. Individuo devas adapti sian rajton por la bono de la *ŝtata familio*. Tiu nocio staras kontraŭ la koncepto de rajtoj de individuoj de protestanta etiko.

La koncepto de la ŝtata familio pozitive kontribuas al stabila registaro (necesa kondiĉo por ekonomia evoluo), aŭ negative kontribuas al la evoluo de demokratio en la formo de toleremo al diktatoreco.

Trie, konservatismo estas alia elemento de la afekcia modelo de ekonomia disvolviĝo en Oriento. Tiu nocio estas kontraŭ la dinamismo en okcidenta kulturo.

Konservatista nocio kontribuas al la tenado de tradicio kaj ne tro rapida ŝanĝo. Tradicio kaj longdaŭra servo al la organizaĵo estas laŭdita kaj oftaj ŝanĝoj estas abomenitaj. Konservatismo ankaŭ konsistas el *ĝusta mezo* aŭ meza vojo. Konfuceo diris: "*Homaj paroloj kaj agoj ne devas esti troaj, nek maltroaj. La transiro de la ĝusta mezo estas same malbona kiel la neatingo.*" Subita ŝanĝo kaj troa agado ne estas ŝatitaj.

(Tabelo 4) Konfucea Etiko:

Afekcia Modelo de Ekonomia Evoluo

Elemento	Enhavo
Humaneco	Humaneca interrilato Humaneca konsidero Kvaliteca decido
Kolektivismo	Lojaleco al la grupo Familia prestiĝo Daŭra servo
Konservatismo	Tradicio Ĝusta mezo Harmonio

1) La Ondo de Tutmondiĝo

Kvankam, la konfucea kulturo harmonie kontribuis al la ekonomia evoluo en la konfucee influitaj aziaj landoj, male de la aserto de Max Weber, la ondo de la tutmondiĝo draste influas al la tradicia kulturo en tiuj landoj. Kiam ekonomio progresas kaj la ekonomia vivnivelo en

tiuj landoj pli altiĝas, la kulturo de konfucee influitaj aziaj landoj tendencas rajdi la ondon de la tutmondiĝo. Tiu ŝanĝo multe influas la tradician kulturon.

En la moderna mondo, "tutmondiĝo" estas preskaŭ sinonimo de "okcidentiĝo", aŭ pli precize dirite, "usoniĝo". En ekonomio, la tuta mondo estas fariĝanta "unu merkato". La tutmonda normo de la ekonomia politiko kaj internacia komerco estas deciditaj kaj kontrolitaj de la Internacia Mon-Fonduso (IMF) kaj la Monda Komerca Organizo (WTO). Ambaŭ organizoj estas kontrolitaj laŭ la proporcio de financa kontribuo. Usono finance kontribuis plej multe kune kun okcidentaj potencaj landoj, kaj pro tio la okcidentaj ekonomiaj politikoj fariĝas la normo de la tuta mondo, kaj la tuta mondo fariĝas "unu granda merkato". Tiasence, la "tutmondiĝo" preskaŭ egalas "okcidentiĝo" aŭ "usoniĝo".

La ĉefaj eroj de la tutmondiĝo estas jenaj:

Unue, individuismo anstataŭ grupismo aŭ kolektivismo disvastiĝas en aziaj landoj. La koncepto de unuopa familio anstataŭas la tradician familian grupon. Kaj ene de unuopa familio, individuismo fare de membroj de la familio rapide disvastiĝas.

Due, ŝanĝigo kaj renovigo anstataŭ konservatismo rapide disvastiĝas. Tenado de la tradicia kulturo estas konsiderata kiel "malnova", kaj ŝanĝigo estas konsiderata kiel "dinamismo". Tio instigas aziajn junulojn fari ion malsimilan ol aliuloj. Eĉ Lee Gun-hee, la estro de Samsung-Grupo, la ekonomia giganto en Koreio, admonis al siaj estraranoj: "Ŝanĝu ĉion, escepte de viaj edzino kaj infanoj!"

Trie, severa konkurenco, anstataŭ harmonia kunekzisto fariĝas pli akra. La tendenco de individuismo kaj renovismo kaŭzas la konkuradon. Eĉ edukado, la rimedo por plibonigi humanecon, fariĝas rimedo por venki en la socia konkurado por estiĝi pli riĉa kaj pli altranga ol aliuloj.

Kiel ni vidas, la ĉefaj eroj de la tutmondiĝo estas okcidentaj aŭ usonaj kulturoj influitaj de protestantismo. Tiu tendenco kaŭzas konfuzon en aziaj landoj kiuj havas longan historion kaj fierindan tradicion.

2) Unueco en Diverseco - Ĝusta mezo

Harmonia kunekzisto kun aliuloj, kun aliaj nacioj kaj kun la naturo estas laŭdinda celo de la homaro. Ĉu tio eblas en la mondo de komerco kaj ekonomio? Eble jes, se oni prenas la vojon de la "ĝusta mezo", kiu estas alia grava ero de la konfucea kulturo.

La ĝusta mezo indikas harmonion kun ĉirkaŭaĵo — harmonio inter homoj kaj naturo, kaj harmoniaj rilatoj inter homoj. Laŭ la konfucea instruo, homoj ne devas kontraŭstari naturon, sed devas harmonie akomodiĝi al ĝi. Laŭ kristanismo, la universo estas *kreita* de Dio, kaj ĝi devas servi por homoj. En Orienta Azio, neniu kreis la universon, sed ĝi jam estis tie, kaj homoj devas harmonie kunekzisti kun la universo.

Ni kompare traktis protestantan etikon de Okcidento kaj konfucean influon de Orienta Azio, kaj traktis ĝian efikon al la evoluo de kapitalisma ekonomio. Ni povas konkludi, ke racia modelo de ekonomia evoluo surbaze de la protestanta etiko certe kontribuis al pli frua disvolviĝo de kapitalisma ekonomio en Okcidento, sed la racia modelo ne estas aplikebla universale sen konsidero de kulturo. La ekonomia evoluo en la konfuceisme influitaj orientaj aziaj landoj indikas, ke afekcia modelo de ekonomia evoluo sukcesis en tiuj landoj.

Sed, kiel ni ekzamenis, la du starpunktoj havas siajn fortojn kaj malfortojn. Por pli stabila kaj humaneca ekonomia evoluo, ŝajnas, ke ambaŭ kulturoj povas lerni kaj trovi la *ĝustan mezon*, kiu harmonie kombinas la du modelojn. Ĝin mi nomas *Racie afekcia modelo de ekonomia evoluo*:

Racia modelo + Afekcia modelo = Racie afekcia modelo

Ekonomia evoluo estas la produkto de laborado de homoj, ne de maŝinoj. Entrepreno en la moderna ekonomio ne estas pure fizika kaj ekonomia sistemo, por kiu homoj estas kostoj, kaj al kiu nur kvantigita kaj objektiva racia modelo aplikiĝas.

Entreprene "organizaĵo" estas "vivantaĵo". La moderna entrepreno estas humaneca sistemo, por kiu homoj ne estas kostoj, sed la plej gravaj kaj produktivaj havaĵoj. Sed objektiva kaj racia analizo estas necesa por fari subjektivan kaj afekcian decidon. Afekcia orienta kulturo bezonas ekzaktan kaj racian pensmanieron, kaj racia okcidenta kulturo profitas de la afekcia modelo por ekonomiaj decidoj. Jen estas la ĝusta mezo, "Racie afekcia modelo" de ekonomia evoluo, kiu kombinas ambaŭ modelojn. Jen estas la esenco de la modelo de la *ĝusta mezo*.

(1) Humaneca efikeco

Efika kaj objektiva analizo estas necesa, sed por la fina decido por administrado de firmao kaj politiko de ekonomia evoluo, oni devas konsideri humanecan aspekton.

(2) Kolektiva individuismo

Homo estas socia estaĵo kaj ne povas ekzisti sola. Ni devas kuraĝigi streĉon de individua talento, sed ĝi devas esti en harmonio kun la komuna bono de la grupo, ĉar la evoluo de la grupo en longdaŭra vidpunkto kontribuas al la bono de la individuoj en la grupo.

(3) Konservativa dinamismo

Dinamismo serĉante plibonon mondon estas ne nur bezonata, sed ankaŭ dezirinda. Sed subita, drasta kaj revolucia ŝanĝo ofte ne daŭras. La ŝanĝo devas esti en harmonio kun tradicio, kaj okazi evolue.

(Tabelo 5) La Ĝusta Mezo
Racie Afekcia Modelo por Ekonomia Evoluo

Racia Modelo	Afekcia Modelo	Racie Afekcia Modelo
Efikeco	Humaneco	Humaneca Efikeco
Individuismo	Kolektivismo	Kolektiva Individuismo
Dinamismo	Konservatismo	Konservativa Dinamismo

1) Modifita de IKU 1997 teksto de la sama aŭtoro.

2) LEE, Chong-Yeong: La Historio de la Komerca Politiko de la Socialisma Ĉinio, 1949-1989,

Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto



YAMASAKI Seiko

Naskiĝis 1929; Matrikuliĝis en 1949 en la universitato de Tokio, fakultato de la Ekonomiko; seminariis sub profesoroj TAKAHASI Kôhatirô kaj TUKA Hisao pri ekonomia historio; disertis pri la industria monopolo en la XVI-a kaj XVII-a jarcentoj en Anglujo (ne publikigita);

Licencio pri ekonomiko en 1952;

Dungiĝis ĉe Mitsui & Co., firmao en internacia komerco kaj deĵoris en ties filioj en Novjorko 1960/64 kaj en Parizo 1976/81, dum kiu interrilatis kun lokaj esperantistoj, precipe en Parizo kun Waringhien kaj Jean Thierry;

Aliĝis en 1982 al la Centro de Trejnado de Entreprenuloj Bussan, filio de Mitsui;

Eksiĝis de Mitsui por koncentriĝi en la tasko de la Centro;

Eksiĝis de Mitsui kaj fariĝis pensiulo en 1999;

Elektiĝis en 1992 al la Akademio de Esperanto ĉefe je la subteno de francaj akademianoj;

Prezidanto de la Estraro de JEI (Japana E-Instituto) 1989-1998;

Komitatano de UEA 1989-1998

Docento ĉe la universitato Dokkyô pri internacia komerco kaj pri la angla lingvo en la komerco 1989-2001.

Verkoj

1989. La artikolo; komparo de ĝiaj uzoj inter Esperanto, la angla kaj aliaj etnaj lingvoj rilate al propraj nomoj kaj abstraktaĵoj, Privata eldono.

1991. Etimologia vortareto pragmata de Esperanto, kaj ĝia suplemento ĝis la 11-a eldono. Libroteko Tokio.

2000. Enkonduko en la japanan. Fonto.

Disertacioj

1994. Individuaj artikoloj. En: Manlibro pri politiko. Flandra Esperanto-Ligo.

2000. Aglutineco de Esperanto. En: Festlibro por André Albault, Iltis.

Resumo

En Japanio okazis la movado "El Eŭropo en Azio" du fojojn. Unue en la malfrua XIX-a jarcento, kaj due post la fino de la dua Mondmilito. La unua estis reakcio al "El Azio en Eŭropon" de Fukuzawa Yukiti, la "Voltero en Azio", kaj la dua fare de la amaso sur la tajdo de la reveno de patriotismo post la flagelantismo. La dua estas akceptata de plimulto de la japanoj, kio simbolas la reakciiĝon de tiu lando.

Mia starpunkto ne estas tia. Oriento kaj Okcidento estas ne geografiaj konceptoj, sed historiaj.

Estas fluo de penso kiu rigardas la historion kiel procedon de la malvolviĝo de la libero. Mi akceptas ĝin kaj rigardas la Okcidenton la patrolando de la libero, dum Azio simbolas la malliberon: Se citi el la filozofio de la historio de Hegelo, en Azio la spirito de la homo estis mergita ankoraŭ en la natureco, kaj la individuo, ne akirinte en si la rajton de la libereco kiel subjektiva personeco, dependas de la naturaj akcidentoj. Tiu azia principo estis bazo de la japana imperiismo kaj ankoraŭ nun de la reakcia reĝimo. La tezo de la nuna Universala Kongreso havas ne pasintan sed prezencan signifon en tiu ĉi kongresa lando.

The West in the East: acceptance and resistance

YAMASAKI Seiko

In Japan there have been movements "From Europe into Asia" on two occasions: firstly in the late 19th century, and secondly after the end of the Second World War. The first time was a reaction against "From Asia into Europe" by Fukuzawa Yukichi, Asia's Voltaire, and the second was a mass movement on the tide of reviving patriotism after the period of self-flagellation. The second is accepted by the majority of Japanese, symbolising the reactionary tendency in the country.

I do not see it like that. East and West are not geographical but historical concepts.

There is a current of thought that regards history as a process of developing freedom. I accept this and regard the West as the fatherland of freedom, while Asia symbolises the lack of freedom: to quote from Hegel's philosophy of history, in Asia the human spirit is still submerged in nature and the individual, who has not yet acquired the right of freedom as a subjective personality, depends on natural accidents. That Asian principle is the basis of Japanese imperialism and even today of the reactionary regime. The theme of the present World Congress has not a historical but a topical significance in this host country.

L'Occident en Orient: acception et résistance

YAMASAKI Seiko

Au Japon le mouvement « d'Europe en Asie » s'est produit en deux occasions. La première à la fin du XIXe siècle, et la deuxième après la fin de la seconde guerre mondiale.

La première fut une réaction à l'injonction « d'Asie en Europe » de Fukuzawa Yukichi, le « Voltaire de l'Asie », et la deuxième fut le fait du peuple sur la vague du retour du patriotisme après la repentance. La deuxième est acceptée de la plupart des Japonais, ce qui symbolise la capacité de réaction de ce pays.

Ma position n'est pas celle-là.

L'Orient et l'Occident sont des concepts non pas géographiques, mais historiques.

Il existe un courant de pensée qui considère l'histoire comme un processus du développement de la liberté. Je l'accepte et considère l'Occident comme la patrie de la liberté, tandis que l'Asie symbolise l'assujettissement: pour citer la *Philosophie de l'histoire* de Hegel, en Asie l'esprit de l'homme était encore plongé dans la nature, et l'individu, ne s'étant pas approprié le droit à la liberté en tant que personnalité subjective, dépend des accidents de la nature. Ce principe asiatique était la base de l'impérialisme japonais et est encore aujourd'hui celle du régime réactionnaire. Le thème de ce Congrès Universel a une signification non passée mais bien présente dans ce pays qui accueille le Congrès.

(Japana resumio)

2007年横浜世界エスペラント大会 大会大学 講義

ヤマサキ セイコー

西と東: 受容と抵抗

要約

日本人の視点からは西は愛情と憎悪の対照であり、日本人を二つの陣営、親ヨーロッパと反ヨーロッパに分けていた。これは、19世紀のなかばこの国が再び外の世界に門戸を開いたときから第二次世界戦争での降伏を通り現在に至るまで変わっていない。日本人はヨーロッパの帝国主義による征服を免れるためには西洋の技術を採用することの必要であることを認識した。われわれは西洋の物質文明を単なる道具として使う、かれらの精神は野蛮である。この態度は急速に西洋の精神文化を尊ぶ考えに変わった。古い思考様式は日本の帝国主義のイデオロギーのなつた。おそらく国際大会大学の指導者たちは西と東を地理学的な概念と考えているのであろう。しかしわれわれはそれを歴史的なもの、すなわち普遍的なものとする。

議論

1.ヘーゲルは東洋的世界をこう考えた。そこでは「精神」が未だ自然性の中に埋没しており、個人が主体的人格として「自由」の権利を自己のうちに獲得するに至らないで、自然的な偶発性に依拠している、このような精神史の端緒段階、直接的な、無媒介の段階は封建的なものから範疇的に区別せらるべきすぐれて「東洋的」なものであり、このような東洋的世界の原理は「意識は家父長のうちにのみ存し、家父長が意思である」ような「家父長制的諸関係」の内に凝集され、それが国家的規模に於いて拡張再生産される場合には「政治と宗教」との未分離として「世俗的支配者は同時に神であるような神政制の構成となる。(高橋幸八郎) たとえば首相は宗教から中立な憲法に違反して神道の機関である靖国神社に参拝する。20世紀の日本をシャーマニズムが支配しているのである。

わたしは日本では親ヨーロッパ的、西洋化ぶれと見なされている。エスペラントはヨーロッパの言語であると言うからである。わたしはエスペラントがワルシヤワで生まれたのは歴史的に必然的であったと考えている。だから日本語の語根を江滑らんに取り入れるのに反対である。天皇は日本独特のものである。だからといって *tennoo* をエスペラントに取り入れる必要はない。日本の君主制は独特のものではあるが科学によって説明できるものである。日本語の語根を取り入れるのはエスペラントの言語的精神に反することである。こういうとそれはヨーロッパ人の人種主義だという。そう言う論者は日本語で日本の国内でそう言っているだけである。わたしはヨーロッパかぶれと言われているが、ヨーロッパ人のヨーロッパ中心主義を国際的な場で発言している。ヨーロッパ人も

ヨーロッパ中心主義を批判している。しかし口先だけである。イギリスの政治家キヤニングのコトバを思い出す。

まっすぐに立つた剛直な男らしい敵を与えよ、
わたしは対決し、反撃するだろう、
だが天よ、容赦せよ、容赦せよ、「率直な友」だけは!

かつてサミュエルハンチントンという男が、「文明の衝突」という本を書いて、エスペランチストでも褒める人がいた。1904/5年の日露戦争は文明の衝突だ、オーストラリアは白豪主義で世界に挑戦したというのである。日露戦争のとき第二インターナショナルのブリュッセル会議で日本の社会主義者荒畑寒村とろ紙や社会民主労働党のグリゴリープレハーノフは壇上で握手して日本とロシアの帝国主義は両国労働者の敵だと言った。同じとき、ロシア人とアジア人のカルムイク族の女の孫ウラジーミルウリヤーノフ、別名ニコライレーニンがイスクラ紙上の「旅順の陥落」という論説でこれはツァーリズムの終わりの始まりだと書いた。どこに人種の戦いがあるか。ハンチントンのごとき無概念的なデマゴグの仮面を剥ぐことは我らの義務である。

2. ヘーゲルは人類の歴史の段階をこう数えた: 東洋的, ギリシヤ的, ローマ的, ゲルマン的世界. 地理学的地域が発展段階を示している. かくして歴史はその祖国, あらゆる低い段階の惨めさをもった祖国ドイツで完成するわけである. (これは日本系のアメリカ人, フランシスフクヤマの「歴史の終わり」と最後の人」を思い起こさせる. ひとはそれをアメリカが人類の進化の最終段階を示すものと誤解している.) ここで西と東は歴史的概念となった.

Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto

YAMASAKI Seiko

De la vidpunkto de japanoj, la okcidento estas objekto de amo-malamo, kaj dividas la japanojn en du kampojn, por- kaj kontraŭeŭropajn. Tiu situacio ne ŝanĝiĝis ekde la malfermo de la lando al la ekstera mondo meze de la XIXa jarcento tra la kapitulaco en la dua mondmilito ĝis la nuna momento. La japanoj agnoskis la necescon de la alpreno de la okcidenta tekniko por ne esti koloniigitaj de eŭropaj imperiistoj. Ni devas uzi la okcidentan materian civilizacion kiel nuran instrumenton, ilia menso estas barbara. Tiu sinteno rapide ŝanĝiĝis al valorigo de la okcidenta spirita kulturo. La malnova pensmaniero fariĝis ideologio de la japana imperiismo. Supozeble, la IKU-aŭtoritatuloj rigardas okcidenton kaj orienton kiel geografiajn konceptojn, ni tamen pensas ke ili estas historiaj, t.e. universalaj.

1. Hegelo priskribas la orientan socion tiel: tie la spirito mergiĝas ankoraŭ en la natureco kaj la individuo ne akiris en si kiel subjektiva personeco la rajton de libereco sed dependas de naturaj akcidentoj. Tio estas stadio antaŭ la antikveco. En Japanio tiu antaŭfeŭda, antaŭantikva principo regis ĝis la fino de la dua mondmilito, kaj ankoraŭ ekzistas en variaj formoj. Sur la stratoj de Jokohamo la okcidentanoj ne rimarkas tion, sed ĝi konsistigas la spiritan fundamenton de la japanoj. Ekzemple, ĉefministroj riverencas la ŝintoisman sanktejon *Yasukuni* malgraŭ la laika konstitucio. Ŝamanismo regas la Japanion de la XXIa jarcento. Mi estas rigardata de japanoj kiel eŭroemulo, eŭropamanto. Ĉar mi deklaras ke esperanto estas eŭropa lingvo. Mi pensas ke esperanto naskiĝis en Varsovio historie necese, neeviteble. Tial mi kontraŭas al alpreno en esperanton de japanajn radikojn, kiel ekz. *tennoo*, pro tio ke kvankam la japana monarĥio estas tre unika, partikulara, ĝi estas klarigebla science, oni povas difini ĝin kiel monarĥio kun *differentia specifica*. Importo de japanaj radikoj kuras kontraŭ la lingva spirito de esperanto. Japanoj pensas ke tia principo naskiĝas el la rasismo de eŭropanoj.

Ili diras tion nur en Japanio en la japana. Mia eŭroemo kontribuas artikolojn akuzantajn la eurocentrismon de eŭropanoj. Eŭropanoj mem diras kaj skribas kontraŭ la eŭrocentrismon, sed tio estas nur lipa. Mi memoras epizodon: brita politikisto George Canning, kiam liaj amikoj kontraŭis lin pro ambicio kaj diris al li ke ili estas honestaj amikoj, kriis:

Donu al mi deklaritan, rekte starantan, virecan malamikon,

Brave mi povas renkonti - eble mi returnas lian baton;

Sed el ĉiuj plagoj, ho Ĉielo, kiun cia kolero povas sendi,

Savu, savu, ho! savu min de honesta amiko.

(*Give me the avowed, the erect, the manly foe* ,

Bold I can meet – perhaps may turn his blow;

but of all plagues, good Heaven, thy wrath can send,

Save, save, oh! save me from the candid friend.)

Iam famiĝis certa Samuel Huntington, kiu skribis libron titolitan *La kolizio de civilizacioj* (*The clash of civilizations*) kaj diris ke la rus-japana milito de 1904/5 estas kolizio de civilizacioj kaj ke Aŭstralio defias la mondon per sia blankrasismo. Dum la rus-japana milito, la japana socialisto ARAHATA Kanson manpremis sur la podio de la kunsido de la 2a Internacio en Bruselo kun la rusoj Georgij Pleĥanov, dirante ke la rusa kaj la japana imperiismoj estas komunaj malamikoj de la rusa kaj japana popoloj. Kie estas batalo de raso? Samtempe skribis iu Vladimir Uljanov, sub la pseŭdonimo de Nikolaj Lenin, nepo de rusoj kaj kalmukino, de azia raso, artikolon “La falo de Porto-Arturo”, priskribante ĝin kiel la komencon de la fino de la carismo. Kie estas batalo de raso? La aŭstralianoj provis nei la blankulan Aŭstralion. Tiuj senkonceptaj (*begrifflose*) demagogoj devas esti pacience senmaskigitaj. Estas nia devo ataki mensogulojn kiel Huntington.

2. Hegelo elnombras ŝtupojn de homa historio jene: la orienta mondo, la greka mondo, la roma mondo, kaj la germana mondo (*die germanische Welt*). Tie geografiaj terpartoj reprezentas samtempe evoluajn ŝtupojn. Tiamaniere estas montrate ke la historio finiĝas en lia patrolando kun ĉiuspecaj malaltŝtupaj mizerajoj. (Tio rememorigas nin ke la japandevena usonano Francis Fukuyama, aŭtoro de “La fino de la historio kaj la lasta homo” (*The end of history and the last man*) estas miskomprenata kiel admiranto de Usono kiel la fina stadio de la homa evoluo.) Ĉi tie jam la okcidento kaj la oriento fariĝis historiaj konceptoj. En la antaŭvorto al la *Kritiko de la politika ekonomio* (*Zur Kritik der politischen Ökonomie*) diras Markso, kie li precizigis sian materiistan koncepton de historio: en granda konturo, povas esti markitaj azia, antikva, feŭda, kaj moderne burĝa manieroj de produktado kiel progresaj epokoj de ekonomiaj sociaj formacioj. (*In grossen Umrissen können asiatische, antike, feudale und modern bürgerliche Produktionsweise als progressive Epochen der ökonomischen Gesellschaftsformationen bezeichnet werden.*) Tie la geografia koncepto “azia” estas uzata kiel pure historia.

Bibliografio

Marx, Karl. Zur Kritik der politischen Ökonomie.

"Formen, die die kapitalistische Produktion vorhergehen", en: Umriss der Kritik der politischen Ökonomie.

Moneypenny & Buckle, Life of Benjamin Disraeli.

Hegel, G.W.F. Vorlesungen über die Philosophie der Geschichte.

Fukuyama, Francis. The end of history and the last man

Esperanto kaj Bakin



ZHU En

Naskita 1965. Dum 1984 -1987 estis studento pri Kemio en Taizhou-a Kolegio por Instruistoj. En 1985 komencis lerni Esperanton postklase en Ĉina Koresponda Esperanto-Lernejo. Fondinto de Esperanto-Asocio sub Taizhou-a Kolegio por Instruistoj (1985), Esperanto-Lernejo por Geknaboj en Linhai (1989) kaj Taizhou-a Esperanto-Asocio(1996). Membro de Ĉina Esperanto-Ligo kaj UEA, membro de konsilantaro de Taizhou-a Federacio de Soci-sciencaj Rondoĵoj kaj Zhejiang-a Esperanto-Ligo, prezidanto de Taizhou-a Esperanto-Asocio. Membro de Ĉina Eduko-Societo, Ĉina Kemio-Societo kaj Internacia Unio de Pura kaj Aplikita Kemio. Studento de Mikroskala Kemio-Eksperimento kaj Eduko de Verda Kemio en mezlernejo. Partoprenis kaj prelegis en la 17a Internacia Konferenco pri Kemio-Eduko kaj la 40a Kongreso de Internacia Unio de Pura kaj Aplikita Kemio en Pekino. Esperanto: studas infan-iteraturon kaj pri la valoro de Esperanto en instruado de fremdalingvoj.

En Oktobro 2005 adiaŭis al S-ro Bakin, kaj poste partoprenis kaj prelegis pri Esperanto kaj Bakin kaj Bakin kaj Taizhou Han-lingve en la 8a Internacia Akademia Konferenco pri Bakin.

Resumo

Unu el la plej konataj ĉinaj verkistoj de la 20-a jarcento, la granda esperantisto Bakin forpasis la 17-an de oktobro 2005.

Bakin aktivis en la Esperanto-movado ekde la 1920-aj jaroj, kiam li ankaŭ tradukis el Esperanto al la ĉina verkojn de E. De Amicis, A.Tolstoj kaj Akita Ujaki. En 1932 li ĉinigis la romanon "Printempo en aŭtuno" de Julio Baghy. Ĝi forte tuŝis lin kaj inspiris lin verki ĉinlingve sian propran romanon "Aŭtuno en la printempo", kies Esperanta traduko aperis en 1980. En Esperanto aperis ankaŭ liaj romanoj "La familio" kaj "Frosta nokto"...

En tiu ĉi artikolo troviĝas jene:

- Lerno de Esperanto
- Influo de la ideo de Esperanto, esperantistoj kaj Esperanto-movado

- Gravaj servoj al la Esperanto-movado

En 1980 Bakin flugis al Stokholmo por partopreni la 65-an UK. Tio surprizis liajn amikojn ĉinajn kaj svedajn. Li diris: "Antaŭ mia vojaĝo miaj amikoj admonis min, ke en tiel granda aĝo mi ne partoprenu tian kongreson. Ili ne sciis, ke en la pasintaj jaroj mi neniam perdis intereson pri la internacia lingvo. Kaj post la kongreso mi havas pli grandan fidon al Esperanto. Esperanto certe fariĝos komuna lingvo de la homaro."

En Stokholmo li diris al siaj svedaj amikoj: "Esperanto sendube disvolviĝos rapide, sed ĝi ludas nur rolon de komuna helpa lingvo, anstataŭante nenium nacian lingvon... Se ĉiuj ellernos Esperanton, aperos tute nova situacio en la mondo." En 1981 Bakin estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Li estis membro de la Honoraj Komitatoj de ambaŭ Universalaj Kongresoj okazintaj en Pekino, en 1986 kaj 2004. Dum la tuta vivo Bakin amis Esperanton kaj batalis por Esperanto. Li enkorpigis la ideon de Esperanto.

Esperanto and Bakin

Zhu En

One of the best known Chinese writers of the twentieth century, the prominent Esperantist Bakin passed away on the 17th of October, 2005.

Bakin was active in the Esperanto movement from the 1920s onwards, when he translated works from Esperanto into Chinese by E. De Amicis, A. Tolstoy and Akita Uyaki. In 1932 he translated Julio Baghy's "Printempo en aŭtuno" into Chinese. It touched him deeply, and inspired him to write his own novel in Chinese "Autumn in spring", the Esperanto translation of which appeared in 1980. Two more of his novels have appeared in Esperanto "The family" and "A frosty night" This article consists of the following:

- Learning Esperanto
- Influence of the idea of Esperanto, Esperantists and the Esperanto movement.
- Important services to the Esperanto movement.

In 1980, Bakin flew to Stockholm to take part in the 65th Universal Congress. This surprised his friends, both Chinese and Swedish. He said "Before I went, my friends told me not to take part in the congress because of my age. They did not know that in the years before I had never lost interest in the international language. And after the congress I have more faith in Esperanto. Esperanto will definitely become humanity's common language." In Stockholm, he said to his Swedish friends: "Esperanto will without doubt spread fast, but it will play the role of a common auxiliary language, not replacing any national language. If everyone learns Esperanto, a totally new world situation will appear." In 1981, Bakin was elected to the Honorary Patrons' Committee of the Universal Esperanto Association. He was a member of the Honorary Committees of both World Esperanto Congresses in Beijing, in 1986 and 2004. Throughout his life, Bakin loved Esperanto, and fought for Esperanto. He encapsulated the idea of Esperanto.

Ba Jin et L'Espéranto

Zhu En

L'un des écrivains chinois les plus connus du 20^e siècle, le grand espérantiste Ba Jin, est décédé le 17 octobre 2005.

Ba Jin militait dans le mouvement espérantiste depuis les années 1920, époque où il traduisait d'espéranto en chinois des ouvrages de E. De Amicis, A. Tolstoï et Akita Ujaki. En 1932 il traduisit en chinois le roman *Printemps en automne* de Julio Baghy. Celui-ci le toucha profondément et lui donna l'idée d'écrire en langue chinoise son propre roman *L'Automne au printemps*, dont la traduction en espéranto parut en 1980. Furent aussi publiés en espéranto ses romans *Famille* et *Nuit glacée*...

Dans le présent article se trouve ce qui suit:

- Apprentissage de l'espéranto
- Influence de l'idée d'espéranto, d'espérantistes et du mouvement espérantiste
- Importants services rendus au mouvement espérantiste

En 1980 Ba Jin se rendit à Stockholm pour participer au 65^e Congrès Universel, à la surprise de ses amis chinois et suédois. Il déclara: « Avant mon voyage mes amis m'ont exhorté, vu mon grand âge, à ne pas participer à un tel congrès. Ils ne savaient pas que lors des années passées, je n'ai jamais perdu mon intérêt pour la langue internationale. Et après le congrès j'ai une foi encore plus grande en l'espéranto. L'espéranto, c'est certain, deviendra la langue commune de l'humanité. » A Stockholm il dit à ses amis suédois: « L'espéranto connaîtra sans doute un essor rapide, mais il joue seulement un rôle de langue auxiliaire commune, ne remplaçant aucune langue nationale... Si tout le monde apprend l'espéranto, apparaîtra une toute nouvelle situation dans le monde. » En 1981 Ba Jin fut élu membre du Comité d'Honneur d'UEA. Il avait été membre des Comités d'Honneur des deux Congrès Mondiaux organisés à Pékin en 1986 et 2004.

Durant toute sa vie Ba Jin a aimé l'espéranto et s'est battu pour l'espéranto. Il a incarné l'idée d'espéranto.

(Japana resumo)

エスペラントと巴金

20世紀における中国最大の作家の一人で、高名なエスペランティストであった巴金は、2005年10月17日にこの世を去った。

巴金は1920年代からエスペラント運動に参加し、E.アミーチス、A.トルストイ、秋田雨雀の作品をエスペラントから中国語に翻訳した。1932年にはユリオ□バギーのエスペラント原作小説*Printempo en aŭtuno*を中国語に訳した。バギーのこの作品にヒントを得て巴金が著したのが『春天里的秋天』であり、これは1980年にエスペラント訳が出版されている。また、エスペラントに翻訳された巴金の作品としては、このほかに『家』『寒夜』がある。

本講演では、次の3点について述べたい。

巴金のエスペラント学習について

巴金における 에스ペラント思想、 에스ペ란ティスト、 에스ペラント運動の影響

エスペラント運動に対する貢献

1980年に巴金は第65回世界エスペラント大会に参加するため、ストックホルムへ赴いた。中国でもスウェーデンでも巴金に近い人々は一様に驚いた。巴金はこう語っている。「旅行の前には、高齢なのだからそのような大会への参加は思いとどまるようにと忠告を受けた。そのように言う人は、わたしがエスペラントに対してずっと関心を寄せてきたことを知らないのである。大会に参加してわたしのエスペラントへの確信はさらに強まった。エスペラントは必ず人類の共通語になるであろう」。

ストックホルムで巴金はスウェーデン人の友人に語った。「エスペラントは急速に普及していくだろう。しかしエスペラントは共通の補助語として機能するのであり、民族語を押しつけるはしない...もし万人がエスペラントを身に付けるとすれば、世界はまったく違ったものになるはずである」。

1981年、巴金は世界エスペラント協会の名誉顧問委員に選出された。また巴金は1986年と2004年に北京で開催された世界エスペラント大会の顧問委員会の一員であった。

生涯を通して、巴金はエスペラントを愛し、そのために戦った。巴金は身をもってエスペラントの思想を体現していたのである。

Esperanto en la vivo de Bakin

ZHU En

(Huipu-mezlernejo, Linhai, Zhejiang, CN-317000, Ĉinio)
entea@163.com, tzesperanto@126.com



Bakin, esperantisto
elstara de Ĉinio

Unu el la plej konataj ĉinaj verkistoj de la 20-a jarcento, la granda esperantisto Bakin forpasis la 17-an de oktobro 2005.

En la 25-a de novembro 1904, Bakin naskiĝis en urbo Chengdu, ĉefurbo de Sichuan-provinco.

Bakin funkciis kiel honora prezidanto de la Ĉina Literaturista kaj Artista Federacio kaj prezidanto de la Asocio de Ĉinaj Verkistoj, vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. La Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio honoris lin per la titolo "Popola Verkisto" en la 25-a de novembro 2003.

Bakin aktivis en la Esperanto-movado ekde la 1920-aj jaroj. En 1929~1932 li funkciis kiel konsiliano de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, instruisto de la Ŝanhaja Koresponda Esperanto-Lernejo kaj redaktoro de la revuo *La Verda Lumo*. Li multfoje publikigis disertaĵojn pri Esperanto.

En 1929~1951 Li esperantigis multe da romanoj, noveloj, poemoj kaj teatraĵoj, ekzemple de E. De Amicis, A. Tolstoj kaj Akita Ujaki ktp. En 1932 li ĉinigis la romanon *Printempo en la Aŭtuno* de Julio Baghy.

En 1951 li estis elektita kiel konsiliano de ĈEL kaj en ĝia vicprezidanto kaj en la sama jaro gvidis la Ĉinan Esperanto-Delegacion partopreni la 65-an UK en Stokholmo.

En 1981 Bakin fariĝis membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Kune kun Chu Tunan, Hujucz, kaj sep personoj li iniciatis la societon *Amikoj de Esperanto* sama jaro.

Li estis honora vicprezidanto de la 1-a Ĉina Kongreso Esperanto en 1986, honora prezidanto de la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto en Qingdao en 1992 kaj la 1-a Kongreso de Esperanto en Ŝanhajo en 1996, membro de la Honoraj Komitatoj de ambaŭ Universalaj Kongresoj okazintaj en Pekino, en 1986 kaj 2004.

Li estis konsiliano de la revuoj *La Mondo*, *Esperanta Literaturo* kaj *Veterana Esperantisto*. Ekde 1989, li estis honora prezidanto de ĈEL. Li penadis por Esperanto pli ol 80 jarojn. Liaj verkoj *Aŭtuno en la printempo*, *La familio* kaj *Frosta nokto* estis tradukitaj en Esperanto.

Urbo Linhai de Zhejiang-provinco estas hejmloko de intima amiko de S-ro Bakin fama biologo Zhu Xi. Januare de 1933, laŭ invito de Zhu, Bakin venis kune kun li al Linhai. Dum la restado en Linhai, Bakin vizitis Huipu-mezlernejon kaj interparolis kun junaj instruistoj pri literaturo, Esp-o kaj aliaj aferoj en la biblioteko de la lernejo.

Novembre de 1934, Bakin ŝipveturis al Japanio unuafoje kaj li loĝis en Jokohamo. Okaze de la 92-a UK, kiel instruisto de Huipu-mezlernejo, mi nur deziras skize prelegi pri Esperanto en la vivo de Bakin jene:

I . Lerno de Esperanto

II . Influo de la ideo de Esperanto kaj esperantistoj

III. Gravaj servoj al la Esperanto-movado

I . Lernado de Esperanto



En 1918 Bakin legis pri Esperanto en iu gazeto el Ŝanhajo, kiam li estis 14-jara knabo. Bakin interesiĝis pri Esperanto kaj komencis memlerni ĝin.

En 1920, Hujucz, Lu Shikai, Stopani, Wang Qianren, Wang Kesui kaj aliaj restarigis la Ŝanhajan Esperanto-Asocion. Bakin skribis leteron al s-ano Hujucz unuafoje pri Esperanto kaj daŭrigis sian E-lernadon.

En 1921, la 17-jara Bakin lernis en la Esperanto-kurso funkciigita de koreo Gao Zixing (Yu Hwayeong) en la Chengdu-a Normala Lernejo.



1980

aliaj
en la

de

Azia

En 1923 Bakin translokiĝis unue al Ŝanhajo kaj poste al Nankino. En aŭtuno de 1924 li studis en la Dependenda Mezlernejo de la Sudorienta Universitato en Nankino. Dum la studado li serioze lernis Esperanton. Poste Bakin skribis pri la lernado de Esperanto en artikolo "Kun firma volo mi lernis Esperanton dum unu horo ĉiutage (iam eĉ pli), seninterrompe. Unue mi legis la lernolibron. Poste mi sendis monon al malgranda Esperanta Librejo en Ŝanhajo, aĉetis librojn en Esperanto eldonitajn eksterlande, inkluzive *Fundamenta Krestomatio* kompilita de Zamenhof, *Pola Antologio*, kaj *Fabeloj de Andersen*. Renkontinte novan vorton en legado de tiuj famaj verkoj, mi tuj konsultis vortaron (Mi havis *Esperanto-Anglan Vortaron* eldonitan en Edinburgo de Anglujo) kaj ne forlasis eĉ unu vorton. Tiel mi legis ilin unu post alia. Post malpli ol jaro mi jam povis libere korespondi kaj verki artikolojn en Esperanto." Bakin legis ĉiujn Esperantajn librojn troveblajn, tiel ke li bonege posedis la lingvon.

En 1980 Bakin diris: "Dum la dek-jara terura plago (1966-1976), *Kvarpersona Bando* pere de Ŝanhaja Kompartia Komitato kondamnis min kiel "kontraŭrevoluciulon" kaj neniigis min je la rajto de verkado. Poste mi faris kelkajn tradukojn en sekreto kaj, neokupite, foliumis Esperantajn librojn troveblajn en mia hejmo. Kaj iom post iom la Esperantaj vortoj, kiujn mi jam forgesis, fariĝis konataj al mi. Ŝajnis, ke mi kvazaŭ troviĝis en miaj junaj tagoj, kaj pli grandiĝis denove mia intereso pri Esperanto."

II. Influo de la ideo de Esperanto kaj esperantistoj

1 Influo de la ideo de Esperanto

En legado de artikoloj en gazetoj pri Esperanto kaj la lernado de Esperanto, la interna ideo de Esperanto, iniciatita de Zamenhof, profunde tuŝis la koron de juna Bakin. Lin interesis tiu ideo de Zamenhof, kiu kreis Esperanton por likvidi la malamon inter la gentoj kaj la septon inter la religioj, kun la celo realigi la idealon pri la mondpaco kaj homaranismo per la akcelo de egaleco, amo kaj amikeco inter la gentoj.

En 1921, la 17-jara Bakin verkis artikolon *Karakterizaĵoj de Esperanto* por revuo *Duonmonato* en Chengdu. Tiam li lernis nur bazon de Esperanto, sed kuraĝigita de la idealoj de Zamenhof, li klopodis disvastigi la lingvon.

Bakin amas Esperanton dum la tuta vivo, kvankam plurfoje li modeste diris, ke li apartiĝis de E-movado jam antaŭlonge, tamen tio signifas nur, ke li ne plu ludis rolon de organizanto de E-movado. Efektive Bakin neniam forgesis Esperanton. En 1982 li diris: "Pasis pli ol 40 jaroj, dum kiuj mi travivis la ok-jaran Kontraŭjapanan Rezistmiliton kaj la dek-jaran Kulturaran Revolucion, tamen mi neniam perdis amon al Esperanto."

2 Influo de esperantistoj

Bakin kaj Hujucz havis profundan amikecon inter si. Bakin diris: "Hujucz estis mia malnova amiko. Esperanto-movado kunligis nin. Nia amikeco daŭris ĝis lia lasta spiro, li ankoraŭ vivas en mia koro."

En 1920 Bakin vivis en Chengdu kaj Hujucz (1897-1986) en Ŝanhajo. Tiam Hujucz, redaktoro de *Orienta Revuo*, plej fama ĉina periodaĵo, publikigis en ĝi siajn artikolojn pri Esperanto. La unua letero de Bakin al Hujucz temas pri Esperanto. Hujucz tuj respondis al Bakin, kaj en 1921 komenciĝis ilia amikeco. En 1922, Hujucz aperigis en ĝi sian longan artikolon *La Idealo kaj la Realo de Internacia Lingvo*, kiu sisteme traktas Esperanton.

En 1927 Bakin veturis al Francujo por studadi. Hujucz vizitis Francion en 1928, kiam la tuta mondo festis la 100-an datrevenon de la naskiĝo de Lev Tolstoj. *La Mondo*, redaktata de Henri Barbusse, aperigis la artikolon *Pri Tolstoj*. Laŭ peto de Hujucz, Bakin tradukis la artikolon en la ĉinan lingvon kaj publikigis ĝin en *Orienta Revuo*, titolitan *Trocki pri Tolstoj*. Dank' al helpo de Hujucz, Bakin sukcesis publikigi en Ĉinio sian unuan tradukon kaj iujn verkojn faritajn en Francio. Pro tio Bakin rigardis Hujucz kiel unu el la plej fruaj redaktantoj de siaj verkoj. Post la forpaso de Hujucz Bakin skribis kun profunda sopiro:

“En la pasintaj jaroj mi malofte kontaktiĝis kun li. Sed ni ofte renkontiĝis, antaŭ ol mi falis en malsanon. Lia fervoro por Esperanto kaj lia kontribuo al la disvolviĝo de la ĉina E-movado hontigis min. Ne estas bedaŭro por li, ke li forlasis tiun ĉi mondon en la aĝo de 90 jaroj. Kvankam mi perdis instruiston kaj amikon, kiu prizorgis min dum longa tempo, tamen lia figuro ĉiam staros antaŭ mi kaj lia voĉo ĉiam aŭdiĝos ĉe miaj oreloj. Multe faru, anstataŭ ĉasi famon kaj profiton; solide laboru, anstataŭ senenhave paroli. La vortoj lumigis mian vivovoĵon.”

Ankaŭ Bakin renkontiĝis kun multaj famaj esperantistoj Wu Xianyou, Sofio, Wang Luyan, Lu Jianbo, Lu Li ktp, kaj estis influita forte de iliaj bonaj ekzemploj.

Alie, verkoj de Eroŝenko (1890-1952) kaj Julio Baghy ktp jam profunde tuŝis lian koron.

En 1930 Bakin kompilis la fabelaron *Ŝipo de feliĉo* de Eroŝenko, kiu enhavas 16 fabelojn tradukitajn de Lusin, Xia Mianzun, Hujucz, Wang Fuquan, Juemin, Bakin k.a., kaj ties honorario kaj kopirajto estis donacitaj al ŜEA. En la antaŭparolo Bakin skribis: “Eroŝenko estas amiko konata kaj estimata de ni, ... tiu rusa blinda poeto prenis la malĝojn de la homaro kiel la sian. Li, kvazaŭ muzikisto, metis amon al homaro kaj malamon al la nuna socia sistemo en muzikilan kordon, kun bela kaj trista stilo li ludis, kaj tuŝas niajn korojn...”

Dun restado en Jokohamo, Bakin verkis fabelon *Turo por Longvivo*, en kiu ni facile trovas influon de Eroŝenko. Bakin diris: “Kiam mi legis *La Silenta Turo de Oogai*, mi subite membris pri *Turo por Fali* de la rusa blinda poeto Eroŝenko, kaj mi diris al mi mem ke mi prove verku fabelon. Antaŭ miaj okuloj aperis ŝanceliĝanta alta turo, kiu ŝanceliĝis nur kelkfoje kaj falis! La enhavo pri *Turo por Longvivo* ankaŭ elpensiĝis.” Plue: “Verdire, mi estas ŝatanto de fabeloj de Eroŝenko... mi ŝatas liajn fabelojn, estas influita de li. Nun mi rememoras ke mia ideo pri homaramo, duone, eĉ plejparte, devenis el li. Almenaŭ tri pecoj el miaj kvar fabeloj estis verkitaj sub lia influo.”

En 1931 aperis romano de Julio Baghy, *Printempo en la Aŭtuno*, kiu tuj kaptis la animon de Bakin. Li diris en la antaŭparolo por la traduko de tiu verko: “kiam mi legis tiun ĉi romanon de Baghy, miaj okuloj plurfoje vualiĝis de larmoj. Tio estis larmoj de kortuŝiteco kaj, kiel diris la maljuna foira komedianto Majstro Baltazar, la animon fekundigas printempa pluveto.” Bakin rapide ĉinigi la romanon, kiu unue estis eldonita de Kaiming-Lernejo en 1932, poste dekkelkfoje reeldonita, kaj kortuŝis, eĉ kortuŝas, animojn de generacioj da ĉinaj junuloj. Bakin mem verkis la romanon *Aŭtuno en la Printempo* pri simila amara am-tragedio influite de Baghy, kiam li finis la tradukon de ties romano.

III. Gravaj servoj al la Esperanto-movado

1 Instruo, redakto, traduko kaj verko por Esperanto

En Francujo Bakin komencis verki sian unuan romanon *La Pereo*, kiu debutis sur paĝoj de la fama gazeto *Novela Monataĵurnalo* en Ŝanhajo kaj libroforme estis eldonita de Kaiming-Librejo en 1929. De tiam Bakin iras sur la vojo de literaturo.

En *Pri Esperanto* Bakin skribis:

Je la komenco de decembro 1928, kiam mi revenis al Ŝanhajo, en hotelo min vizitis Sofio, mia amiko, kiu siatempe servis kiel sekretario aŭ konsilanto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Li diris al mi, “La domo de la asocio estas vaka. Kial ne transloĝi tien por kelkaj tagoj?” Tion mi faris. Endome de la asocio situanta en Strateto Hongxingfang, mi loĝis tie per kanvasa faldebla liteto por proksimume duonmonato. Post kiam mi luis domon en strateto Baoguang, mi forlasis Strateton Hongxingfang. De tiam, mi fariĝis ano de la asocio, kaj iom poste ties konsilanto, kaj ankaŭ donis helpon al la asocio. Intertempe mi elesperantigis kelkajn librojn kiaj unuakta teatraĵo *La Floro de la Pasinto* de itala E. De Amicis, dramo *Morto de Danton* de soveta A. Tolstoj, *Danco de Skeletoj* de japana Ujaku Akita, kaj originala romaneto *Printempo en Aŭtuno* de hungara Julio Baghy. Ĝis kiam, okaze de la evento “la 18-a de Januaro”, la

kanonfajro cindrigis la strateton Hongxingfang, mi transloĝiĝis al Zhaibei, norda distrikto de Ŝanhajo.

Fakte en 1929 Bakin ankoraŭ funkciis kiel konsiliano de ŜEA, instruisto de la Ŝanhaja Koresponda Esperanto-Lernejo kaj redaktis por la asocio la revuon *La Verda Lumo*, en kiu li publikigis siajn artikolojn ĉinlingve *Pri la originala literaturo de Esperanto*, *Pri Esperanta literaturo* kaj la originalajn verkojn *En la Malluma Nokto*, *Mia Frateto* kaj aliajn.

Li Naixi (1908~2003), veterana esperantisto, estis bone konata en la ĉina Esperantujo. Li diris:



En 1925 li legis artikolon pri Esperanto en revuo *Studentoj* kaj ekinteresiĝis pri tiu artefarita lingvo. Post du jaroj li aĉetis Esperantan lernolibron kaj aliajn E-legaĵojn kaj komencis memlerni la lingvon. En 1929 li estis arestita pro revolucia aktivado. En la malliberejo li sin anoncis por partopreni E-korespondan kurson, okazigitan de la Ŝanhaja E-Asocio. Hujucz, Bakin kaj aliaj veteranaj esperantistoj, kiuj kune instruis en la kurso, persone korektis liajn hejmtaskojn. Li sentis ĝojon kaj feliĉon en tio kaj decidis daurigi sian lernadon de Esperanto en la estonteco.

2 Amplenaj zorgoj al posteuloj

Kvankam tre okupita, tamen Bakin mem respondis leterojn de esperantistoj, akceptis ĉinajn kaj alilandajn samideanojn, konsultis ilin pri Esperanto-movado kaj prezentis siajn proponojn por ĝi.

2.1

Armand Su (1936~1991) eklegis verkojn de Bakin en 1949.

En la artikolo *Renkonto Kun Bakin* Su skribis: “Bakin estas mia unua kaj plej amata ĉina verkisto. Mi eklegis liajn verkojn en 1949, estante 12-jara knabo. Liaj tristaj kaj ardpplenaj romanoj, noveloj kaj rakontoj lasis al mi plej profundan impreson, kaj mi ensorbiĝis forgesante manĝadon kaj dormadon. Liaj verkoj fariĝis mia konsolo en mia soleca vivo.” “En printempo de 1951 mi skribis al li la unuan leteron, esprimante mian amon kaj konfidon al li. Li tuj respondis al mi kaj eĉ donacis al mi sian novan libron *Festotagoj en Varsovio* kun dediĉo. Kia granda ĝojo por mi, ke mi ricevis lian personan leteron! De tiam mi ofte revadis lin renkonti.”



Aŭtune de 1979, Armand Su faris Esp-vojaĝon al la suda Ĉinio. Su skribis: “Profitante mian restadon en Shanghai, mi fine trovis lin hejme la 2an de okt. 1979. Li bonvenigis min ĉe la pordo.”

“Kun surprizo mi eksciis Bakin jam delonge aŭdis pri mi kaj legis pri mi. Li unue demandis pri mia sanstato kaj konsolis min: “Vi ja suferis multe pli ol mi.” Mi demandis pri lia estonta laborplano, li diris: “Mi ankoraŭ volas labori almenaŭ 5 jarojn kaj super verkado kaj tradukado.”

“Bakin jam 75-jara kaj ankoraŭ havas tian grandan laborenergion. Rigardante lian tute blankajn harojn, mi eksentis grandan estimon al tiu ĉi aminda oldulo, kiu suferis multe dum la pasintaj jaroj sub persekutado de la Kvar-persona Bando.”

Bakin diris al Su pri lia lernado de Esperanto, verkado en Esperanto kaj tradukado pli el Esperanto ĉinlingven.

Poste Su skribis: “Mi montris al li mian itallingvan poemaron kaj la japanan tradukon pri mi fare de s-ino Simada en Julia n-ro de la Mondo de Esperanto. Bakin ridetis kaj diris ke li ricevis kelkajn leterojn de s-ino Simada, tradukistino de verkoj de Bakin en Japanio.

“Jam tempis disiĝi. Laŭ mia peto, Bakin fotiĝis kun mi en la korto de lia domo. Mi neniam forgesos tiun ĉi renkonton kun mia plej amata ĉina verkisto, kies verkoj akompanis dum 30 jaroj min sur la vivovojo.”

2.2


S-ano HOU Zhiping, eksvicdirektoro de la redakcio, redaktoro de *El Popola Ĉinio* kaj konstanta komitatano de la Ĉina Esperanto-Ligo konatiĝis kun S-ro Bakin unuafoje en 1980. Poste, S-ro Bakin fotiĝis kun s-ano HOU en Pekino, korespondis kun li kaj donacis librojn surskribitaj al li plurfoje.



S-ro Bakin(meze) kun HOU(maldekstre) en Pekino, 1981



s-ano S-ro Bakin(meze) surskribis por s-ano HOU(maldekstre)



S-ro Bakin skribis al s-ano HOU






2.3

Memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Lusin, du poŝtmarkoj estis emisiitaj en la 25-a de septembro 1981. La juna lernanto de Esperanto, PENG Jianjun en la urbo Wuhan de Hubei-a provinco sendis du poŝtmarkojn al S-ro Bakin kaj petis lin por subskribi.

Iun tagon post duonmonato, la juna PENG ricevis leteron de S-ro Bakin de Ŝanhajo kun la subskribitajn poŝtmarkojn.



2.4

Por s-ano Xiao Huoli la 23-a de junio 1985 estas neforgesebla ĉiam, kiam li lernis Esperanton en la Porinstruista Kurso en Ŝanhaja Fremdlingva Instituto. En tiu tago, li vizitis S-ron Bakin kun helpo de profesoro Lu Jianbo, intima amiko de Bakin.

S-ano Xiao skribis en *Vizito al Bakin*: "Post nelonga veturado, mi facile trovis loĝejon de estimata Bakin. Ĉe la pordego mi sonorigis. Momente, la pordo estis malfermita de iu virino, kiu estis fratino de sinjoro Bakin. Sekvante ŝin, mi eniris gastakceptejon, kie mi vidis sinjoron Bakin, dormetanta sur apogseĝo. Vidinte min, li stariĝis kaj gastame manprenis kun mi, dirante, ke li jam informiĝis el la letero skribita de profesoro Lu Jianbo pri mia hodiaŭa vizito, ke li ĝojas vidi en la urbo Ŝanhajo la samlokanon el Siĉuan-provinco."

Sidiĝinte, Xiao diris al S-ro Bakin: “Instruisto Li Shijun petis min transdoni al vi lian bondeziron. Li deziras, ke vi estu ĉiam en sano. Instruisto Li iam tradukis vian romanon *Aŭtuno en Printempo*, li opinias, ke vi sukcese verkis.”

Temante pro tio, sinjoro Bakin modeste diris: “Ne pro tio, ke mi sukcese verkis, sed pro tio, ke li bone tradukis.”

Sekve Xiao diris: “Estimata sinjoro Bakin, ĉifoje, komisiite de la redakcio de la gazeto *Esperanta Literaturo* baldaŭ eldonota, mi speciale vizitas vin por inviti vin kiel la konsilanton de la redakcio, krome la redakcio petas vian surskribon por la libro.”

La inviton kaj la peton sinjoro Bakin akceptis kaj aldonis: “Bone, bona estas la afero. Esperanto bezonas literaturon, kaj literaturo ankaŭ bezonas Esperanton. Mi bondeziras al *Esperanta Literaturo*: Flugu alten kun eksvingintaj flugiloj!”

Ankoraŭ Xiao koncize prezentis la kurson kaj lernadon al S-ro Bakin: “En nia kurso sume estas dek naŭ kursanoj, la plejparto el ili estas instruistoj por fremdaj lingvoj en altlernejoj. Ni venis de diversaj lokoj de la lando. Ĉiuj lernas diligente kaj vivas bone.”


Aŭskultinte, sinjoro Bakin kontente kapjesis: “Jes, vi devu kapti la oran tempon por peneme lerni en la favora medio. Memore, dum mi lernis Esperanton, la lernolibro, vortaro tute mankis. Mi havis nur unu maldikan vortareton. Sed nun—tute male.”

Fine, ĉe la adiaŭo S-ro Bakin fotiĝis kune kun Xiao kaj donacis al li unu libron freŝe verkitan kun surskribo sur la frontispico: “Klopodu por la disvastigo de Esperanto!”

2.5

Novembre de 1994 estis la 90-a datreveno de naskiĝo de Bakin. S-ano Liu Sigong, fotisto de EPĈ veturis al Ŝanhajo por viziti Bakin kun lia kolego s-ro Xu Senrong. Pere de helpo de ŝanhaja samideano ili havis la feliĉon viziti Bakin en la sekvanta tago post ilia atingo al Ŝanhajo.

S-ano Liu skribis en *Mi fotis Bakin*: “Je la 9-a horo ni venis al la hejmo de Bakin kaj vidis, ke li jam estis atendanta nin en la salono. Li varme manpremis kun ni kaj dankis nin pro la vizito.”



“S-ro Xu prezentis al li kelke da numeroj de la revuo EPĈ kaj esperantajn librojn. Li ĝoje prenis unu el la numeroj kaj foliumis. Li diris: “EPĈ aperis tre frue kaj havas longan historion.” Kaj tiam mi tuj kaptis la ŝancon kaj fotis lin legantan la gazeton. Foliumante la gazeton, li interparolis kun Xu en tre bona humoro. Oni ne povis kredi, ke li estas 90-jara maljunulo turmentata de malsano.”

Pasis unu horo. “Konsidere lian nebonan sanstaton, ni leviĝis por adiaŭi lin. Li estis suferanta de Parkinson-malsano kaj liaj membroj ne estis tiel liberaj, sed li insiste akompanis nin ĝis la pordo subapogate de flegisto. La flegisto diris al ni, ke li tion faris por ĉiuj gastoj. Elirinte el la domo en la korton, mi returnis min kaj larme fotis lin ĉe la pordo.”



Ĉe la fino de la vizito estimata Bakin donacis al S-ano Liu subskribitan verkon *Sencelaj Pensoj*.

3 En la 65-a UK

En 1980 Bakin havis 76 jarojn. Kun la romano *Aŭtuno en la printempo* en Esperanto versio li gvidis la Ĉinan Esperanto-Delegacion al la 65-a Universala Kongreso en Stokholmo. Tio surprizis liajn amikojn ĉinajn kaj svedajn. Li diris: “Antaŭ mia vojaĝo miaj amikoj admonis min, ke en tiel granda aĝo mi ne partoprenu tian kongreson. Ili ne sciis, ke en la pasintaj jaroj mi neniam perdis intereson pri la internacia lingvo. Kaj post la kongreso mi havas pli grandan fidon al Esperanto. Esperanto certe fariĝos komuna lingvo de la homaro.”



En la ĝenerala kunveno de la 2-a de aŭgusto, en la nomo de la Ĉina Esperanto-Delegacio Bakin donis emocian salutvortojn al la kongreso kaj ricevis longtempan aplaŭdadon de la tuta ĉeestantaro, 1800 reprezentantoj venintaj el 51 landoj aŭ regionoj.

Inter 14 kunsidaj salonoj, kiuj prenis nomojn de famaj esperantistoj de diversaj landoj kiel sian nomon, troviĝis salono *Venlo*, ĝi estis speciale establita memore al kamarado Venlo Fon, fama ĉina Esperanta pioniro. Ĉio ĉi tio montris zorgadon kaj taksadon de diverslandaj amikoj al la ĉina Esperanto-movado.

Dum la kongreso la Komitato de UEA okazigis kunvenon kaj unuanime aprobis la rezolucion pri akcepto de la Ĉina Esperanto-Ligo kiel asocia membro de UEA. Tio havas profundan signifon por akceli nian kunlaboron kun UEA kaj disvolvi internacian Esperantan movadon.

En sia akcepta kunveno, urbestro de Stokholmo speciale tostis al Bakin dezirante ke la amikeco inter la popoloj de Svedio kaj Ĉinio vivu por eterne. Ili havis intiman interparoladon en Esperanto. Raportistoj de tagĵurnaloj, vesperĵurnaloj kaj televidaj stacioj de Stokholmo intervjuis kamaradon Bakin kaj samtempe faris raportan filmon por televidaj spektatoroj.

En Stokholmo li renkontiĝis kun la malnova amiko, s-ro Bruno Vogelmann. Li diris al siaj svedaj amikoj: "Esperanto sendube disvolviĝos rapide, sed ĝi ludas nur rolon de komuna helpa lingvo, anstataŭante neniun nacian lingvon... Se ĉiuj ellernos Esperanton, aperos tute nova situacio en la mondo."



4 Fondiĝo de la societo Amikoj de Esperanto

Decembre de 1981 fondiĝis la societo *Amikoj de Esperanto*, iniciatite de dek famuloj: Chu Tunan, Hujucz, Bakin, Xia Yan, Zhao Puchu, Ye Shengtao, Xie Bingxin, Bai Shouyi, Ĵelezo kaj Zhu Jiushi. Aliĝis al ĝi pli ol 130 personoj el la tuta lando, subtenantaj Esperanton, inter ili multaj estis reprezentantoj de la Ĉina Popola Kongreso, membroj de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, famaj verkistoj, artistoj, sciencistoj, edukistoj, sociaj aktivuloj kaj famuloj de aliaj sociaj rondoj. Ĝi havas sian celon labori por diskonigi Esperanton al diversaj sociaj rondoj kaj popularigi ĝian influon en la ĉina socio, kaj aliflanke, por doni moralan forton al la internacia Esperanto-movado, por ke ĝia idealo realiĝu kiel eble plej baldaŭ.

Bakin ĉeestis en la fondkunveno de la societo *Amikoj de Esperanto* en Pekino kaj donis salutvortojn.



La unua prezidanto estas Chu Tunan. La fondiĝo de la societo Amikoj de Esperanto altiris al si atenton de la internacia Esperanto-rondo. Prezidanto de UEA Grégoire Maertens, ĝia ĝenerala sekretario Flora Szabo-Felsö kaj prezidanto de la Sveda Parlamento Ingemund Bengtsson tuj sendis gratulan leteron.

La nuna prezidanto estas Chai Zemin, fama diplomato kaj la unua ambasadoro de ĈPR en Usono. En la pasintaj pli ol 20 jaroj la societo Amikoj de Esperanto ludis gravan rolon en populariĝo de Esperanto, plialtigo de ĝia socia pozicio kaj akirado de la registara subteno.


En 1965 S-ro Bakin ankoraŭ vizitis la Vjetnaman Pacdefendan Esperantistan Asocion kaj Hanojan Esperanto-Klubon kaj estis varme bonvenigata de vjetnamaj esperantistoj.




S-ro Bakin ankoraŭ renkontiĝis kaj korespondis kun esperantistoj de Japanio kaj aliaj landoj. Decembre de 1978 li skribis al S-ro Tokuda Rokuro: “...Pardonu mian longan silenton, ĉar mi estas malsana. Mi ricevis vian afablan leteron, kaj dankas vin por tio, ankaŭ por la kopiaĵo de Verda Lumo, kiun mi redaktis antaŭ kvardek sep aŭ ok jaroj, kaj kiu min rememorigis pri la tagoj pasintaj. Multan dankon!” plue: “La renkontiĝo kun vi kaj via delegacio ĝojigis min multe. Mi ne povas forgesi la agrablan posttagmezon, kiun ni pasigis kune. Mi esperas ke vi vizitos Ŝanhajon venontan jaron...”




“Kvankam al mi mankas energio por fari tion kion mi faris antaŭe, tamen mi ankoraŭ zorgas la aferon de Esperanto, kaj volonte por ties disvastigo oferas mian forton”. S-ro Bakin ankoraŭ zorgis la Esperanto-movadon. Pro malsano, li ne povis ĉeesti diversajn E-kongresojn, sed li donis varmajn gratulajn leterojn al la kongresoj. Ekzemple S-ro Bakin skribis: “Esperantistoj de Ĉinio kaj la aliaj landoj de Azio kreu mano en mano la superban 21-an jarcenton” kaj sendis ĝin al la 1-a Azia Kongreso de Esperanto en Ŝanhajo en 1996.




gratula letero al la 71-a UK de S-ro Bakin, membro de la Honoraj Komitatoj de la UK



S-ro Bakin, honora prezidanto de la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto en Qingdao en 1992



S-ro Bakin, honora prezidanto de la 1-a Azia Kongreso de Esperanto en Ŝanhajo en 1996






la revuo *EPC*

gratulo al la 45-jara S-ro Bakin, konsiliano de la jubileo de *EPC* de S-ro revuo *Veterana Esperantisto* Bakin




surskribo de S-ro Bakin por la gazeto *Esperanta Literaturo*



la 2-a numero de *Esperanta* la libro *Bakin kaj Esperanto* kompilita de s-ano Xu Shanshu

S-ro Bakin faris grandajn kontribuojn al la ĉina Esperanto-movado kaj ĝuis altan prestiĝon. De la 2-a ĝis la 5-a de oktobro 2003, en Yanji de Jilin-provinco okazis la 5-a Ĉina Kongreso de Esperanto, kiun ĉeestis 230 samideanoj el 26 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. La kongresa temo estis "Universala Kongreso de Esperanto kaj Ĉina Esperanto-movado an la Nova Jarcento". La partoprenantoj de la 5-a Ĉina Kongreso de Esperanto sendis al S-ro Bakin salutleteron por gratuli lin pro lia 100-jariĝo.



En 2004, okazis en Pekino la 89-a Universala Kongreso de Esperanto. S-ro Bakin estis membro de la Honoraj Komitatoj de la UK. La kongresa temo estis "Lingva egaleco en internaciaj rilatoj". Salutletero en la nomo de ĉiuj kongresanoj estis voĉlegita en la solena fermo de la 89-a UK kun jenaj vortoj al Bakin: "Ni, 2000 esperantistoj, kiuj venis el diversaj landoj por ĉeesti la 89-an UK en Pekino, salutas vin kun plena respekto. Via fideleco al la idealo de Esperanto ĉiam inspiros nin antaŭenmarŝi!" Dum la tuta vivo Bakin amas Esperanton kaj batalis por Esperanto. Li enkorpigis en si la ideon de Esperanto. Kvankam

**第89届国际世界语大会
向巴金衷心致敬**

在7月31日上午举行的第89届国际世界语大会闭幕式上，国际世协主席科尔塞蒂代表大会组委会向中国知名世界语者巴金先生的百岁生日表示祝贺，对巴金为世界语所做的贡献致谢。新当选的国际世协领导成员，中华全国世界语协会秘书长于涛宣读了给巴金的贺信。

贺信全文如下：
尊敬的，亲爱的巴金先生。
在您一百岁生日之际，我们两千多个世界语者向您表示衷心的敬意！在上个世纪的20年代，您就为世界语运动做出巨大的贡献，为世界语和平做出不懈努力，您为世界语所做的贡献将始终鼓舞我们继续向前。
第89届国际世界语大会全体与会者向您衷心敬意！

Salutletero al Bakin, membro de la Honora Patrona Komitato de la Universala Esperanto-Asocio

Estimata kaj kara s-ro Bakin,
Okaze de la centjara jubileo de via naskiĝo, ni, 2000 esperantistoj, kiuj venis el diversaj landoj por ĉeesti la 89-an UK en Pekino, salutas vin kun plena respekto.
Ekde la dudekaj jaroj de la pasinta jarcento, vi ne nur faris grandan kontribuon al la progrese kultura afero de Ĉinio kaj mondopaco, sed ankaŭ dediĉis grandan energion al la ĉina kaj internacia Esperanto-movado. Via fideleco al la idealo de Esperanto ĉiam inspiros nin antaŭenmarŝi!
Partoprenantoj de la 89-a UK
La 31-an de julio 2004
Pekino, Ĉinio

Bakin forpasis, por la ĉinaj esperantistoj li ankoraŭ vivas. Brilas Bakin-stelo, ni devas labori diligente por la movado!

Bibliografio

ĈEL, Paroladoj de L.L.Zamenhof, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1982.

SHI Chengtai, Esperanto en Bakin, Esperanto, 1994 (10-11).

Armand Su, Renkonto kun Bakin, Oomoto, 1979.

LIU Sigong, Mi fotis Bakin.

XIAO Huoli, Vizito al Bakin, Esperanta Literaturo, Wuhan, 1986 (1).

ZEN Hojau, Raporto pri la 65-a UK de Esperanto.

CHEN Yuan, Nia Bakin, nia lingvo, EPĈ, Pekino, 1995 (3).

XU Shanshu, Bakin kaj Esperanto, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1995.

HOU Zhiping, Esperanto-Movado en Ĉinio, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1985.

HOU Zhiping, Hujucz kaj Esperanto, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1999.

HOU Zhiping, Cent Jaroj de Esperanto en Ĉinio, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1999.

HOU Zhiping, Konciza Historio de la Ĉina Esperanto-Movado, Eldonejo Nova Stelo, Pekino, 2004.

Ĉu malplimultaj lingvoj estas ekonomiaj malvenkintoj?



KIMURA Goro Christoph

Akademia grado: doktoro (Dr. phil.)

1974 naskiĝo en Nagoya, Japanio

1992--1997 studento de Tokia Universitato pri Fremdaj Studoj

1997--2002 studento ĉe Hitotsubashi-Universitato en Tokio

2002 doktoriĝo ĉe Hitotsubashi-Universitato

2002--2004 docento ĉe Keio-Universitato en Huzisawa, apud Tokio

2004-- docento ĉe Sophia-Universitato en Tokio

Esplorkampoj:

lingva sociologio, precipe lingvaj rajtoj kaj lingva politiko

Resumo

Prilingvajn esplorojn, kiuj koncernas la ekonomian aspekton, oni povus subsumi sub la nomo "ekonomiko de lingvoj". En tiu esplorkampo troviĝas provoj starigi ligojn inter mono kaj lingvo. Tiaj provoj kutime metafore aplikas pensojn pri mono al lingvoj, por klarigi kaj pravigi disvastiĝon de grandaj lingvoj. Male, en tiu ĉi prelego mi provos utiligi pensojn pri t.n. komunumaj monoj por valorigi malplimultajn lingvojn kaj lingvan diversecon. La prelego celas alporti al "ekonomiko de lingvoj" pli kritikan kaj kreivan aliron ol la ĝis nun praktikatan.

KIMURA Goro (2003) "Kune por pli solidareca mondo - Komunuma mono kaj Esperanto", Japana Esearo 3, Libroteko Tokio, p. 66--70.

Gengo-tuuka ron saikô tiikitûka ron ga gengo no keizaigaku ni toikakeru koto [Repensi la komparon inter lingvo kaj mono el vidpunkto de komunumaj monoj], en: MASIKO Hidenori (red.): Kotoba, Kenryoku, Sabetu gengoken kara mita zyôhōzyakusya no kaihō, Sangensha 2006, p. 79--106.

ARE minority languages economic losers? Perspectives on an alternative "economics of language" from the viewpoint of community money

KIMURA Goro Christoph

Language research relating to the economic aspect can be subsumed under the title "economics of language". In this field there are attempts to make a link between money and language. These usually metaphorically apply ideas concerning money to language in order to explain and justify the spread of major languages. In contrast, in this paper I will try to use ideas concerning so-called community money to give value to minority languages and linguistic diversity. The paper aims to bring to the "economics of language" a more critical and creative approach than has been practised hitherto.

Les langues minoritaires sont-elles des perdantes économiques? — Perspectives d'une "économie des langues" alternative du point de vue de la monnaie communautaire.

KIMURA Goro Christoph

Les études qui concernent l'aspect économique des langues pourraient être regroupées sous l'appellation « économie des langues ». Dans ce domaine de recherche existent des tentatives pour établir un lien entre la monnaie et la langue. De tels essais appliquent habituellement aux langues, de façon métaphorique, des réflexions sur la monnaie, pour expliquer et justifier l'expansion des grandes langues. Au contraire, dans la présente conférence, je tâcherai d'utiliser des réflexions sur les monnaies communautaires pour valoriser les langues minoritaires et la diversité linguistique. La conférence vise à apporter à « l'économie des langues » une approche plus critique et créative que celle pratiquée jusqu'à maintenant.

(Japana resumo)

少数言語は経済的敗者か—地域通貨の観点からみた代替的な「言語の経済学」の可能性

言語の経済的な側面を研究する分野は「言語の経済学」と呼ぶことができる。この研究分野においては、言語状況を説明するために通貨論が援用されることがある。そのようなばあい、通貨論が果たす役割は、大言語の拡大を説明し合理化することである。それに対して本報告では「地域通貨」の発想をとり入れることによって、従来の言語の経済学よりも批判的かつ創造的な観点から多言語状況を考察する可能性を提示することをめざす。

Ĉu malplimultaj lingvoj estas ekonomiaj malvenkintoj? — Perspektivoj de alternativa “ekonomiko de lingvoj” el vidpunkto de komunuma mono

KIMURA Goro Christoph

1. Kial ligi lingvon kaj monon?

Rilate al la nuna tutmondiĝo multe diskutata estas la estonteco de lingva diverseco. Unu grava alirebleco al tiu problemo estas la ekonomia. Prilingvajn esplorojn, kiuj koncernas la ekonomian aspekton, oni povus subsumi sub la nomo “ekonomiko de lingvoj”. En tiu esplorkampo troviĝas provoj starigi ligan inter mono kaj lingvo. Oni uzas monon ekzemple por mezuri kostojn aŭ utilojn de multlingvecoⁱ. Sed troveblas ankaŭ uzo de mono por kompreni aŭ klarigi evoluojn de lingvaj situacioj. Ĉi tiu prelego celas prilumi ĉi lastan aspekton el alia vidpunkto ol la kutimaⁱⁱ.

Kutime, pensoj pri mono estas metafore aplikataj en “ekonomiko de lingvoj” por klarigi kaj pravigi disvastiĝon de grandaj lingvoj. Male, ĉi tie ni provos utiligi pensojn pri mono por valorigi minoritatajn lingvojn kaj lingvan diversecon. Tiucele la artikolo fokusigas al provoj de t.n. komunuma mono.

Komence ni konstato kelkajn similecojn inter funkcioj de mono kaj lingvo. Sekve ni rigardos tipajn ekzemplojn de pensoj, kiuj metafore rilatigas nuntempan oficialan monon kun lingvo. Kaj poste ni ekzamenos bazajn trajtojn de komunuma mono, por fine ĉerpi el tio alian ligan inter mono kaj lingvo. Ĉar temas pri metaforo, ni devas esti konsciaj, ke la metaforo nur koncernas specifajn aspektojn. Oni ne povas kompari lingvaj kaj monajn fenomenojn kiel tuton. Necesas esti singardaj, kiam oni uzas metaforon. Tamen metaforoj povas helpi por renovigi kaj profundigi niajn pensojn. Peter Mühlhäusler montras ke lingvistiko evoluis per metaforoj. Li taksas la rolon de metaforoj en lingvistiko kritike sed pozitive, mem proponante novan metaforon pri studado de piĝinaj kaj kreolaj lingvoj (Mühlhäusler 1995). Malsame kiel Mühlhäusler, mi ne intencis aldoni novan metaforon, sed alporti al ofte uzata metaforo novan dimension, kiu ebligas kontribui al “ekonomiko de lingvoj” per pli kritika kaj kreiva vidpunkto.

2. Lingvo kaj mono – bazaj funkciaj similecoj

Kvankam temas pri du tute alitipaj sistemoj, en la funkcioj, kiujn lingvo kaj mono plenumas en homa socio, ekzistas interesaj similecoj. Unue, kaj lingvo kaj mono servas kiel perilo por interŝanĝo: Lingva komunikado ebligas vastan interŝanĝon de mesaĝoj; mona ekonomio ebligas fleksiblan interŝanĝon de varoj kaj servoj. Plie, ambaŭ sistemoj havas la komunan trajton, ke ilia uzebleco baziĝas ne sur la valoro de la perilo mem, sed sur interkonsento: Kaj lingvoj kaj (hodiaŭaj) mono funkcias, ĉar la uzantoj interkonsentis pri certa signifo/valoro de simboloj/monunuoj.

Alia simileco estas la identiga funkcio. Ne nur lingvoj funkcias kiel identigilo, sed ankaŭ mono. La sociologo Ottheim Rammstedt diras, ke “la signifo de mono superas la limigitan komprenon kiel ekonomian perilon. Oni povas kompreni monon kiel kristaligitan formon de interŝanĝo. Interŝanĝo ne estas nur prototipo de ĉiaj interagoj, sed kunligas homojn, kreas socion. Socion oni povas rigardi kiel lokon kaj kadron de interŝanĝado, kiel sumon de interŝanĝantoj. Tiel mono sociigas individuojn”(Rammstedt 1997). Simile la socilingvisto Louis-Jean Calvet atentigas, ke “ankaŭ mono havas semiologian signifon kaj funkcias kiel

simboloj de identeco”(Calvet 2000: 32).

3. Metafora uzo de mono por “ekonomiko de lingvoj”

Tiaj similecoj en esencaj aspektoj de mono kaj lingvo facile allogas al komparo inter tiuj du periloj. Jen ni vidu kelkajn ekzemplojn el ekonomiismaj studoj pri lingvo. Tre simplan, sed tipan komparon faras la socilingvisto Inoue Humio, unu el la pioniraj figuroj de “ekonomiko de lingvoj” en Japanio. Li ekzemple skribas:

“La baza principo de la merkata valoro de lingvo estas la valoro kiel valuto. Ju pli vaste uzebla kaj stabila (aŭ profitdona) la valuto estas, des pli ĝi estas ĝoje akceptata. Tiu fakto paralelas kun la vasta uzado de la dolaro en la mondo.” (Inoue 2000: 33)

Ĉi tie la baza ideo estas, ke, same kiel mono, ankaŭ lingvo estas pli valora, se ĝi estas vaste uzata. La metafora uzo de mono havas la rolon raciigi la disvastiĝon de grandaj lingvoj. Similan ekzemplon de analogio inter mono kaj lingvo prezentas François Grin en sia superrigardo de antaŭaj studoj pri “ekonomiko de lingvoj”. Li kritikis la tro simplisman vidpunkton de tia “lingvo-kiel-valuto” hipotezo, kiu ŝajne rigardas lingvon nur kiel simplan komunikilon por transdoni informojn (Grin 1996: 23, 28-29). El nia komenca konstato ni povas aldoni, ke tia simpla komparo inter lingvo kaj mono kiel nuraj komunikiloj estas tro simplisma ne nur rilate lingvon, sed ankaŭ pri mono.

Pli detalan kaj profundan komparon ol la tendenco kritikata de Grin faras Florian Coulmas en sia vojmontra libro “Language and Economy ”[Lingvo kaj Ekonomio]. La unua ĉapitro de la libro estas plene dediĉita ĝuste al la metafora ligo inter mono kaj lingvo. Prezertante antaŭajn studojn de John Locke ĝis hodiaŭ, li atentigas al la esencaj komunecoj inter tiuj du interŝanĝistemoj. Sekve, en la dua ĉapitro li montras, ke lingvo kaj mono simile kondutas por evoluigi socion, komparante la evoluon de merkato kaj komuna lingvo:

“Ambaŭ, nome la mona ekonomio kaj komuna lingvo alportas kvalitan evoluon al socio. Ĉar ambaŭ reciproke rilatigis individuojn per nova maniero kaj donas al ili novan eblecon partopreni en ekonomia, socia kaj kultura vivo.”(Coulmas 1992: 41)

Plie li rimarikigas ke “ne estas koincido, ke la vastiĝo de ekonomiaj sferoj paralelis kun normigo de lingvoj sojle de moderniĝo”(samloke) kaj diskutas ankaŭ pri realaj ligoj inter lingvaj kaj monaj sistemoj.

Tiel Coulmas skizas pli komplikitan bildon pri la rilato inter mono kaj lingvo, ol Inoue kaj aliaj. Sed la rolo, kiun la komparo inter mono kaj lingvo ludas, tute similas. Nome, ankaŭ ĉi tie, la mencio de mono estas uzata por akceptigi disvastiĝon de grandaj lingvoj kiel racian evoluon. Konstatinte, ke la normigo de eŭropaj lingvoj kontribuis al ekonomia evoluo, li “precizigas” la eldiron “lingvo estas riĉaĵo” al “komuna lingvo estas riĉaĵo”(Coulmas: 33). Konsekvence, malpligrandaj lingvoj estas traktataj kiel ekonomiaj malvenkintoj. Fine de sia libro li prognozas ilian malhelan estontecon:

“Eĉ minoritataj etnoj loĝantaj en foraj regionoj pli kaj pli integriĝas en [pli kaj pli vastiĝanta] ekonomia procezo kaj devas teni komunikajn ligojn kun la ekstera mondo. (...) Ĉar al multaj tiaj lingvoj mankas funkciaj necesajoj esencaj por moderna komunikado, tiuj lingvoj havas nur limigitan valoron por homoj, kiuj volas partopreni en moderna vivo. Tial ne malmultaj malgrandaj lingvoj rapide malpli uziĝos kaj iuj tute malaperos el la komunikada repertuaro de ilia komunumo.” (Coulmas: 293)

Jen ni vidis tipajn ekzemplojn, kiamaniere la nuna oficiala monsistemo estas analogiebla al “ekonomiko de lingvoj”. Mi povus plilongigi la listigon, sed tio ne indus, ĉar ĝis nun mi eĉ ne unu ekzemplon de rilatigo inter mono kaj lingvo trovis, kiu ne celas pravigi la venkon de grandaj lingvoj.

Tiu ĉi tendenco parte jam estas antaŭdecidita je la komenco de tia paraleligo. Nome, kiam oni komparas monon kun lingvo, oni ja kutime komparas ŝtatajn monojn kun ŝtataj (naciaj) lingvoj. Por neŝtataj lingvoj tute ne troviĝas loko en tiu komparo. Do, ne mirigas, ke minoritataj lingvoj, kiuj ja konsistigas la plejmulton de lingvoj, estas stampitaj kiel senvaloraj. Sed tia ekonomiko de lingvoj ne povas klarigi, kial tiom multaj homoj en la tuta mondo insistas je uzo de tiaj lingvoj kaj eĉ foje klopodas revivigi jam ne plu uzatajn lingvojn.

4. Komunumaj mono

Por eviti tian unuflankan rigardon al lingvoj, kiun manifestas la nun praktikata komparo inter mono kaj lingvo, ekzistas du vojoj. La unua estas tute forlasi tian metaforon, atentigante al la multaj diferencoj inter lingvo kaj mono. Tio certe estas pli konsilinda ol resti ĉe la nuna komparo. Sed nun mi volas montri, ke ekzistas ankaŭ alia vojo, nome alimaniere ligi la du sistemtipojn.

Do ni turnu nin al alia vidpunkto pri mono, kiun malfermas movadoj por komunuma mono. Komunumaj mono estas monsistemoj, kiujn nek ŝtato nek banko, sed ordinaraj homoj mem kreas por uzi inter si. Kiel komunan celon de diverstipaj komunumaj mono ekonomikisto Nisibe Makoto listigas jenajn ses punktojn (Nisibe 2000):

- 1 interŝanĝo surbaze de reciproka fido
- 2 ekonomia cirkulado ene de difinita regiono (komunumo)
- 3 nenia (aŭ minusa) rentumado
- 4 vigligo de nemarkataj servoj
- 5 kooperado de NRO-oj kaj NPO-oj
- 6 Konstrui reciprokajn fidon anstataŭ nur trankviligi homojn

Sume, komunumaj mono estas provoj de ordinaraj homoj, mem krei monsistemon por stimuli interŝanĝon ene de difinita komunumo kaj per tio fortigi homan soliderecon en la komunumo. Movadoj por komunuma mono volas doni alternativon al la nuna nacia mono, kiu sendepende de realaj varoj kaj servoj monstre pliiĝante cirkulas en la mondo kaj postulas senhaltan ekonomian kreskonⁱⁱⁱ. Komunumaj mono rigardeblas kiel provoj, konstrui sekurigajn retojn por gardi homecan vivon antaŭ pli kaj pli universaliĝanta logiko de merkata ekonomio, kiu distranĉas homecajn rilatojn (Kaneko 1999). En la lastaj jardekoj de la 20a jarcento rapide kreskis la nombro de provoj enkonduki komunuman monon. Nuntempe oni supozas, ke ekzistas kelkmiloj de tiaj alternativaj monsistemoj diversloke en la mondo.

5. Alia vidpunkto por “ekonomiko de lingvoj”

La ideo de komunuma mono donas novan vidpunkton al metafora ligo inter mono kaj lingvo. Ĉi tie mi nek volas nek povas diskuti pri la signifo, eblecoj aŭ limoj de komunumaj mono mem. Ni koncentriĝu al la demando, kion implicas la vidpunkto de komunuma mono por “ekonomiko de lingvoj”. Mia opinio, almenaŭ prezentblas sekvaj ses punktoj.

5.1 Hegemonieco

Kutima penso pri mono, sur kiu baziĝas ankaŭ la kutima komparo inter mono kaj lingvo,

emas rigardi monon kvazaŭ ĝi estus neŭtrala ilo de interŝanĝo: la mono mem nek estas bona nek malbona. “*Non olet*”[ĝi ne odoras], retorike deklaris jam romia imperiestro Vespaziano (regis 69-79 p.K.). Laŭ tiu pensmaniero bonas aŭ malbonas do nur la homo, kiu uzas ĝin. Kontraŭe, movadoj por komunuma mono asertas, ke monsistemoj entenas hegemoniecon, sendepende de tio, por kio oni uzas la monon. La kerna punkto de ilia kritiko malsamas de aliaj sociaj kritikoj kiuj postulas redistribuon de mono, ĉar ĝi atentigas, ke la baza problemo ne estas la konduto de monhavantoj aŭ maljusta ekonomia politiko, sed la monsistemo mem. La nuntempa oficiala mono estas kritikata, ke ĝia rentuma mekanismo “kaŝe formanipuladas monon de tiuj kiuj havas malpli ol ili bezonas al tiuj kiuj havas pli ol necese” (Kennedy 2001: 21). Internacive aldoniĝas la kritiko al la valuta hierarkio, precipe al la hegemonio de internacie uzataj valutoj. Ekzemple Usono vaste profitas el la fakto, ke en la tuta mondo oni uzas la dolaron kiel bazan valuton (Douthwaite 2001: 96-): la hegemonio de la dolaro do ne estas nur la rezulto de la usona hegemonio, sed ĝi esence subtenas la politikan kaj ekonomian hegemonion de Usono. Mono tute ne kondukas neŭtrale!

Tia kritika vidpunkto al monsistemo, kiu atentigas nin pri ŝajne neevitebla hegemonieco de periloj, instigas nin kritike ekzameni ankaŭ hegemoniecon de lingvoj. Homoj ja emas kredi, ke lingvoj estas senkulpaj rilate al regado kaj ekspluatado. Oni asertas, ke kulpas ne lingvoj, sed homoj, se iu lingvo estas uzata por diskriminacio. Tamen lingva diskriminacio koncernas ne nur diskriminaciajn eldirojn de iuj homoj, sed antaŭ ĉio la fakton, ke la lingva situacio mem estas diskriminacia. En modernaj naciaj ŝtatoj ofte parolantoj de neoficialaj lingvovariaĵoj aŭ minoritataj lingvoj estas subpremataj sub hegemonio de ŝtata lingvo. Tiel lingvoj ne nur peras hegemonion, sed konsistigas hegemoniajn situaciojn. Simile pri la monda situacio. Defendantoj de mondanglismo asertas, ke la anglan kiel mondlingvon oni povus uzi por subpremi, sed ankaŭ por emancipi homojn. Sed lingvoj ne nur “spegulas” sociajn hegemoniojn, sed estas esencaj kolonoj de hegemoniaj potencoj (Phillipson 1992). Ankaŭ lingvoj ne kondukas neŭtrale sed estas unu el la bazaj eroj de monda malegaleco, kiel apogantoj de lingvaj rajtoj emfazas.

5.2 Ideologieco

Kiel ni supre vidis (ĉap. 4), movadoj por komunuma mono ne kaŝas, ke ili sekvas certajn ideologiojn kaj celojn. Samtempe ili malkaŝas, ke ankaŭ la nuna nacia mono entenas ideologion. Ekzemple la apero de senrentumaj monoj rekonstatigas al ni, ke rentumsistemo ne estas natura trajto de mono. Ankaŭ historie ne ĉiuj monsistemoj donis rentumojn. La ideo, ke tiuj, kiuj pruntedonis monon, rajtas ricevi rekompenson pro ilia reteno uzi la propran monon nun, estas nur unu pensebleco (Morino 2000: 40). Plie la movadoj por komunuma mono asertas, ke la ekzisto de rentumoj malebligas vidi la longdaŭrajn konsekvencojn de ekonomia evoluo, kaj tiel baras racian planadon (Lietaer: 243-252). Monsistemo tiel influas la pensmanieron kaj konduton de homoj. La movadoj por komunuma mono malfermas niajn okulojn al la fakto, ke ne ekzistas senideologia mono.

Tiu vidpunkto, ke interŝanĝo per mono entenas ideologion, pensigas ankaŭ pri “ekonomiko de lingvoj”. La kutima metafora uzo de mono por klarigi lingvajn situaciojn (kiel ni vidis en ĉap. 3), aspektigas lingvajn evoluojn simple kiel racian ekonomiecon. Sed paroli pri ekonomieco preterlasante ideologion estas tro surfaca kiel klarigo de lingvaj fenomenoj. Ekzemple, formiĝo kaj disvastiĝo de naciaj lingvoj ne estas klarigebla per simpla ekonomieco, sed estis kaj estas forte ligitaj al politikaj pensaroj pri moderna nacia ŝtato. Studoj en lingva antropologio montras, ke oni povas kompreni lingvan ideologion kiel esencan parton de lingva uzo (Schieffelin 1998, Kimura 2001a). Antaŭ ol argumenti per ekonomiaj terminoj pri lingvaj situacioj oni devas demandi, kiaj ideologioj kuŝas malantaŭ

konceptoj kiel “ekonomieco” aŭ “racieco”^{iv}.

5.3 Ŝanĝebleco

Tamen eĉ se ni konsentus pri la hegemonieco kaj ideologieco de mono aŭ lingvo, ni kutime ne penas, ke oni povas ŝanĝi la situacion. Sed la verkisto Michael Ende, kiu profunde agnoskis la monan problemon, rimarkigis bazan fakton:

“Homoj pensas ke oni ne povas ŝanĝi monon, sed ili malpravas. Oni povas ŝanĝi monon. Ĉar monon kreis homoj.” (citita el Kaŭamura k. a.: 222)

Tiu eldiro de Ende konsciigas nin, ke naciaj kaj internaciaj monsystemoj ja ne estas neŝanĝeblaj naturaĵoj, sed homaj produktoj. Lastatempe la kreo de eŭro klare montris, ke laŭ socia interkonsento eblas ŝanĝi monsystemon. Laŭ Ende, se la socio sufiĉe konscius pri la mona problemo, eĉ pli profunda ŝanĝo eblus. Tiupunkte la provoj de komunuma mono malfermas novan perspektivon. Nome, ili montras, ke ordinaraj civitanoj ne devas atendi, ĝis la ŝtato reformas la nunan systemon. Ili jam nun povas komenci mem krei alternativan monsystemon.

Pri lingvoj estas disvastigita la pensmaniero rigardi lingvan situacion kvazaŭ veteron, kiun oni ne povas ŝanĝi (Kimura 2001b). Sed ankaŭ lingva situacio estas rezulto de homaj agadoj kaj tial principe ŝanĝeblas per konstanta uzo de ordinaraj homoj. Tiusence lingvoj entute pli similas al komunumaj mono ol al ŝtataj mono, kiujn monopole emisias centra institucio.

Nuntempe troviĝas diversloke en la mondo multaj provoj revivigi minoritatajn kaj lokajn lingvojn. Kutima vipunkto de “lingvo-kiel-valuto” sugestas, ke tiaj provoj estas senperspektivaj, ke ili eĉ povas esti kontraŭlegaj (falsado!?). Male, la provoj de komunuma mono povas kuraĝigi tiujn paŝojn kiel utiligon de la principa ŝanĝebleco de systemoj, kiuj esence baziĝas sur interkonsento de uzantoj.

5.4 Malfermita limigiteco

La tri punktoj traktataj ĝis nun rilatas al principaj trajtoj. Se temas pri la praktika uzo, interesa karakterizaĵo de komunuma mono kompare kun nacia mono estas, ke la limigita uzebleco estas pozitive taksata. Ĉe naciaj mono, ju pli vaste iu valuto uzeblas, des pli valora ĝi estas. Kontraŭe, ĉe komunumaj mono, la limigiteco de uzantaro alportas certan valoron. Ekzemple, Thomas Greco diras, ke “oficiala valuto de ŝtato estas ideale konvena pro ĝia vasta uzateco kaj fleksibleco”, sed “tiu ĉi trajto estas el vidpunkto de memstara regiona ekonomio terure malkonvena”(Greco 2001: 85-86). Ankaŭ la reciproka fido, kiun komunumaj mono volas nutri, malfacilas, kiam la uzantaro vastiĝas senlime. Aliflanke, ni ne miskomprenu, ke komunumaj mono celas fermitan, izolecan komunumon. Tute male, ili celas komunumon, kiu estas principe malfermita al novaj interesitoj.

Miaopinie, tia perspektivo de “malfermita limigiteco” estas ankaŭ signifoplena por minoritataj lingvoj. Unue pri limigiteco. En la kutima “ekonomiko de lingvoj”, la nombro de la lingvouzantoj estas baza kriterio de sukceso: ju pli da homoj uzas la lingvon, des pli la lingvo estas rigardata valora. Sed laŭ la pensmaniero de komunuma mono, la limigiteco de uzantoj povas gajni pli pozitivan signifon, rilate al la solidariga funkcio de lingvoj. En ekonomiaj terminoj dirite, la limigiteco de la uzantaro povas kontribui al malgrandigo de “kostoj de fidindeco.” Due, pri malfermiteco. La analogio kun komunuma mono tiurilate unuavide ne aspektas tiom sencohava. Estas ja pli malfacile eniri lingvan komunumon ol monan komunumon. Aparteno al lingva komunumo estas ofte rigardata kiel donita fakto decidita je naskiĝo. Sed multaj movadoj de minoritataj lingvoj nun celas gajni novajn

parolantojn sendepende de ilia etna deveno, ekzemple per t. n. mergiĝaj metodoj^v. Ankaŭ plenkreskuloj estas invititaj aliĝi al alia lingva komunumo lerninte la koncernatan lingvon. En tiu senco, “malfermita limigiteco” povas esti valida devizo ankaŭ por minoritataj lingvaj komunumoj, por kiuj vasta uzado aŭ agnosko kiel ŝtata lingvo ne estas realeca celo.

5.5 Diverseco de ekzistformoj

Alia praktika trajto de komunumaj monoj estas, ke depende de la ideo, celo aŭ sociaj kondiĉoj, ekzistas plej diversaj formoj. Inter alie distingeblas inter centrismaĵaj kaj pli malcentrigitaj tipoj, inter individuismaj kaj pli komunismaj tipoj. Ne ekzistas iu “norma(la)” formo. Komunumaj monoj tiel montras, ke la nuna ŝtata mono ne estas la sola ebleco de monsistemo. Ekzistformoj de monoj povas esti tre diversaj.

Analogio de la ideo de komunumaj monoj, kiu valorigas diversajn ekzistformojn, povus ŝanĝi la vaste troveblan lingvokomprenon, kiu rekte aŭ nerekte rigardas modernajn ŝtatajn lingvojn kiel modelon por ĉiuj lingvoj. Kutimaj komparoj inter mono kaj lingvo ja eĥas tiun ĉi komprenon. Oni apreas nacian aŭ ŝtatan lingvon kiel idealan staton de lingvo, kaj minoritataj lingvoj estas ofte taksataj kiel nesufiĉe evoluitaj aŭ eĉ sentaŭgaj. Sed ĉiu lingvo servas unikajn celojn kaj alprenas propran ekzistformon laŭbezzone. Minoritataj lingvoj ne devas fariĝi malgrandigitaj kopioj de ŝtataj lingvoj. Ankaŭ diasporan lingvon aŭ gestan lingvon oni ne plu devas rigardi kiel esceptan fenomenon, sed kiel ekzistformon plej taŭgan por la uzantaro.

5.6 Plurismo

Se ni apreas diversecon de monsistemoj, la logika konkludo estas, ke ne plu validas unumonismo. Laŭ ĝisnuna moderna kompreno, la ideala situacio estas, ke ekzistas en unu ŝtato unu valuto. Kunekzisto de pluraj monsistemoj estis rigardata neefika. Sed apogantoj de komunuma mono asertas, ke havi nur unu monsistemon estas neracia. Ili asertas, ke diversaj monoj taŭgas por diversaj celoj. Ili do celas plurisman monsistemon. Detalaj konceptoj varias, sed tipa argumentado pledas por paralela laŭcela uzo de almenaŭ tri monsistemoj: neŭtrala internacia mono, nacia mono kaj komunumaj monoj (ekz. Lietaer, Douthwaite).

Se ni tian plurisman koncepton pri mono aplikas al lingvoj, la metaforo de mono ne plu ludas rolon nur pravigi disvastiĝon de grandaj lingvoj, sed povas valorigi lingvan diversecon. Tia “ekonomiko de lingvoj” kongruas kun la baza konstato de socilingvistiko, ke homoj uzas diversajn lingvojn aŭ lingvovariaĵojn por diversaj celoj. La hodiaŭan kreskon de movadoj por revivigi minoritatajn lingvojn ne povas kompreni “ekonomiko de lingvoj”, kiu vidas raciecon nur en unuecan sistemon.

6. Al alia “ekonomiko de lingvoj”

Ĉi supre ni listigis kelkajn eblajn implicojn de komunuma mono al “ekonomiko de lingvoj”. Apliki la vidpunkton de komunuma mono povus kontribui al alia “ekonomiko de lingvoj”, kiu ne aperigas unulingvismon kiel neeviteblan rezulton de ekonomiaj procezoj, sed kiu juste taksas kaj eble ankaŭ subtenas la lingvan diversecon en la mondo, kritike analizante la tendencojn de lingva maldiversiĝo. Metafora uzo de mono, ĝis nun ripetadas la samajn argumentojn, kiuj ŝajnas esti objektivaj. Sed fakte per simplismaj komparoj ĝi akceptigas difinitajn tendencojn kiel neeviteblajn kaj senvalorigas aliajn. Se “ekonomiko de lingvoj” volas eviti tian unuflankan aliron, ĝi devas almenaŭ konsideri la supre menciitajn ses punktojn por pli taŭge kaj profunde klarigi la evoluon de lingvaj situacioj. Kompreneble, por atenti pri

tiuj punktoj oni ne bezonas metaforan komparon kun mono. Sed por malkaŝi malatentatajn punktojn de la kutima komparado de lingvo kaj mono, tiu alia aliro povas esti helpa.

Kaj mi aldonu, ke tiu alternativa rilatigo inter mono kaj lingvo ne devas limiĝi al metafora nivelo. Ankaŭ en realeco movadoj por komunumaj monoj kaj movadoj por komunumaj lingvoj sekvas sufiĉe similan celon: igi la mondon pli solidareca (Kimura 2003a). Ambaŭ frontas similajn malfacilaĵojn, kiel ekzemple stagnado de interŝanĝo aŭ disiĝo de komunumo. Kunlaboro de lingvaj ekonomikistoj kun pensuloj kaj praktikantoj de alternativaj monoj mi povas imagi sufiĉe fruktodona por ambaŭ flankoj.

7. Apliko: Esperanto kiel “komunuma lingvo”

Por iom konkretigi la ĝisnunan teoriumadon pri mono kaj lingvo, fine ni provu apliki la supre menciitajn pensojn al konkreta lingvo konata al ĉiuj legantoj de ĉi tiuj linioj: Esperanto^{vi}. Simile oni povus fari pri aliaj neŝtataj lingvoj, precipe minoritataj.

Unue pri *hegemonieco*. Ke lingvoj ne kondukas neŭtrale, ankoraŭ ne estas ĝenerale agnoskita en la socio. Sed por esperantistoj tio tute ne estas novaĵo. Ĝuste el tiu konscio Zamenhof alcelis ja “neŭtralan lingvon”. Kaj parolantoj de Esperanto kunhavas prikomunikadan *ideologion* kiu valorigas dialogon inter ordinaraj homoj el malsamaj lingvaj kaj kulturaj fonoj (Kimura 2003b). Esperanto kiel planlingvo ekestis vaste utiligante la principan *ŝanĝeblecon* de lingvaj sistemoj kaj sukcesis krei propran lingvokomunumon. Kaj precipe pri la valoro de *malfermita limigiteco* la esperanta komunumo donas bonan ekzemplon: Pasporta Servo kaj aliaj infrastrukturoj en Esperantujo funkcias ĝuste pro tiu ĉi eco de la lingva komunumo. Kiel lingvo, kiu ne baziĝas sur specifa regiono aŭ etno, Esperanto prezentas *unikan ekzistoformon* de homa lingvo. Laste, *plurlingvismo* estas baza trajto de esperantistoj.

Tiuj ĵus menciitaj ecoj estas tute malatentataj en kutimaj pensoj pri mono kaj lingvo, sed sen konsideri tiujn ecojn tute ne eblas analizi la fenomenon Esperanto.

Bibliografio

- Calvet, Louis-Jean (2000): “Gengoseitaigaku no zyuusooteiki tyuusin-syuuhen moderu” (un modèle gravitationnel pour une écologie des langues) [gravita modelo por ekologio de lingvoj], trad. Nisiyama Noriyuki, en: Miura Nobutaka / Kasuya Keisuke (red.): *Gengoteikokusyugi to wa nani ka*, Huziwarasyoten, p.27-38
- Coulmas, Florian (1992): *Language and Economy [Lingvo kaj Ekonomio]*, Oxford UK: Blackwell
- Douthwaite, Richard (2001): *Kahei no seitaigaku(The Ecology of Money)[Ekologio de mono]*; trad. Bato Tyuuzi/ Tukada Koozoo, Hokutosyuppan
- Greco, Thomas H. (2001): *Tiikituuka Runesansu (New Money for Healthy Communities) [Nova Mono por sanaj komunumoj]*, trad. Oonuma Yasusi, Honnoizumisya
- Grin, François (1996): “The economics of language: survey, assessment, and prospects” [Economiko de lingvoj], *International Journal of the Sociology of Language* 121, p.17-44
- Inoue, Humio (2000): *Nihongo no nedan[Kostoj de la japana lingvo]*, Taisyuukansyoten
- Kaneko, Masaru (1999): *Han guroobarizumu[Kontraŭ tutmondismo]*, Iwanamisyoten
- Kaplan, Robert B. / Baldauf, Richard B. Jr. (1997): *Language Planning. From Practice to Theory[Lingva planado]*, Clevedon k.a.: Multilingual Matters
- Kaŭamura, Atunori k.a. (2000): *Ende no yuigon[Testamento de Ende]*, NHKsyuppan
- Kennedy, Margrit (2001) *Ekonomio sen rento kaj inflacio (Interest and free money)*, trad. Märtha Andréasson kaj grupo de la Esperantoklubo de Kungälv, Skövde: Al-fab-et-o

- Kimura, Goro C. (2001a) „Intentionale Eingriffe in den Sprachgebrauch — Perspektiven und Probleme einer umfassenden Theoriebildung”, Sabine Fiedler / Liu Haitao (red.): *Studien zur Interlinguistik / Studoj pri Interlingvistiko*, Praha: Kava-Pech, p.19-29
- (2001b) “Gengo wa sizen gensyoo ka”[Ĉu lingvo estas naturaĵo?], *Syakaigengogaku* 1, p.39-55
- (2003a) “Kune por pli solidareca mondo - Komunuma mono kaj Esperanto”, *Japana Esearo* 3, Libroteko Tokio, p.66-70
- (2003b) “The metacommunicative ideology of Esperanto: Evidence from Japan and Korea”[La prikomunikada ideologio de Esperanto: Japanaj-koreaj manifestiĝoj], *Language Problems and Language Planning*, Vol. 27, No. 1, Spring 2003, p.71-83
- (2005) *Gengo ni tote Zin'isei to wa nanika* [Kian rolon ludas la intenco ĉe lingvaj agoj? *Lingvokonstruado kaj lingvaj ideologioj, traktitaj ĉe la ekzemplo de la soraba kaj kornvala lingvoj*], Sangensya
- (2006) “Gengo-tuuka ron saikoo – tiikituukaron ga gengo no keizaigaku ni toikakeru koto” [Repensi la komparon inter lingvo kaj mono – el vidpunkto de komunumaj mono], en: Masiko Hidenori (red.): *Kotoba, Kenryoku, Sabetu*, Sangensya, p.79-106
- Lietaer, Bernard A. (2000) *Manee hookai (Das Geld der Zukunft)*, trad. Kobayasi Kazuki / Hukumoto Hatuo, Nihonkeizaihyooronsya
- Morino, Eiiti (2000) “Tiiki tuuka – rentai to sinrai no okane”[Komunuma mono], *Syakaiundoo* 238, 39-43
- Mühlhäusler, Peter (1995): “Pidgins, Creoles and Linguistic Ecologies”[piĝinoj, kreoloj kaj lingvaj ekologioj], in: Baker, Philip (ed.): *From contact to creole and beyond*, London: University of Westminster Press, p.235-250
- Nisibe, Makoto (2000) “Tiikituuka no igi to kanoosei”[Signifo kaj perspektivo de komunumaj mono], *Asution* 53, p.127-162
- Phillipson, Robert (1992): *Linguistic Imperialism [Lingva imperiismo]*, Oxford University Press
- Rammstedt, Ottheim (1997): „Die gesellschaftliche Modernisierung und die Dynamik nationaler Identität”[Socia moderniĝo kaj dinamiko de nacia identeco], Internationales Symposium „Globalisation und Lokalisation“, Doitubunkasyakaisigakkai / Doitusyakaigakukenyuukai, 2.6.1997, Tokyo [manuskripto]
- Schieffelin, Bambi B. k.a. (1998): *Language Ideologies. Practice and Theory [Lingva ideologio]*, Oxford University Press

ⁱ Diversaj tipoj de “kosto-analizoj” estas prezentitaj en Kaplan / Baldauf 1997, p.94.

ⁱⁱ Tiu ĉi prelego alprenas kaj evoluigetas la ideojn prezentitajn en Kimura 2003a kaj Kimura 2006.

ⁱⁱⁱ Laŭ vidpunkto de apogantoj de komunuma mono, la problemon ĉefe kaŭzas la rentuma sistemo. Tial ilia alternativa mono kutime ne donas rentojn. Por detala klarigo vidu Kennedy 2001.

^{iv} La preleganto montris surbaze de esploroj en la german-soraba dulingva regiono en orienta Germanio, ke la uzado de la germana lingvo fare de sorablingvanoj ne klarigeblas per simpla “racieco”, sed ke tiu konduto estas akompanata de asimilismaj ideologioj, kiuj pravigas la uzadon de la dominanta lingvo (Kimura 2005).

^v En la kazo de la soraba lingvo, mergiĝa programo por infanoj lanĉita en 1998 nomiĝas “WITAJ”, kio signifas sorablingve “bonvenon”.

^{vi} Pri specifaj similecoj de komunuma mono kaj Esperanto vidu Kimura 2003a.